

Betty Salt



*Lito apud
la fenestro*

UEA

LITO APUD LA FENESTRO

LITO APUD LA FENESTRO

Rakontoj, teatraĵetoj, poemoj

BETTY SALT

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Rotterdam 1999

© Universala Esperanto-Asocio 1999

ISBN 92 9017 068 9

Kompostita en la Centra Oficejo de UEA
Kovrilo kaj ilustraĵoj de Francisco Veuthey
Presita ĉe Drukkerij Bariet bv, Nederlando

Enhavo

RAKONTOJ	7
Lito apud la fenestro	9
Supersensa percepto.....	10
La malfeliĉulo.....	15
La ringoj.....	17
Ŝia unua kongreso.....	22
La morsa kodo.....	24
Veraj rakontoj de instruistino.....	27
Unufoje en vivodaŭro	36
Mistera malapero	38
Ŝi eniros la ĉielon bela	42
Forturnita embaraso.....	45
La vivo estas tia.....	48
La malpacienca motoristo	52
Reĝo Davido.....	53
Ŝanĝo de celo	56
La kvinjara avo.....	61
TEATRAĴETOJ	65
Merkurio kaj la arbohakisto.....	67
La alia saĝulo.....	70
Kvar teatraĵetoj pri frua Kalgario.....	75
POEMOJ	85
Releviĝo.....	87
Homo sapiens.....	89
La kantanta birdeto.....	91
Aŭtuna odo	92
Printempa heroldo	93
Lamento	94
TRADUKOJ	95
Tre gaja kristnasko (Morley Callaghan)	97
Du poemoj (E. J. Pratt)	102
Peria anemono (Annora Brown)	104

RAKONTOJ

LITO APUD LA FENESTRO

Jen rakonto aŭdita antaŭ multaj jaroj pri ĉambro en malsanulejo kaj pri la tri senhelpaj kriplaj viroj kiuj okupis ĝin. Tiu, kiu dum la plej longa tempo estis tie, kuŝis en la lito apud la fenestro; tiu, kiu lasta alvenis, okupis la liton plej proksiman al la pordo. La viro apud la fenestro ne havis la povon levi sin ĝis sidpozicio, kaj cetere estis preskaŭ blinda, do ĉio kion li povis vidi tra la fenestro estis la ĉielo, kiu ŝajnis esti ĉiam griza.

Estis la viro en la meza lito, kiu faris la vivon tolerebla por la aliaj du per siaj konstantaj viglo kaj optimismo, kvankam li certe havis nenion pri kio feliĉi. Sur tableto apud lia lito staris eta botelo kun medikamento. Dum la nokto, se li havis kor-spasmon kaj ne tuj sukcesis venigi flegistinon, li povis malfacilege atingi la botelon kaj trinki sufiĉon por malrapide forigi la doloron.

Dum malvarma vintro la viro apud la fenestro mortis, kaj la aliajn oni movis laŭvice, ankaŭ forigante la trian liton. Baldaŭ la neestingeblo optimisto distris sian senhelpan kunulon per rakontoj pri la aĝoj videblaj tra la fenestro... aŭtomobiloj, ludantaj infanoj, balonvendistino, florĉareto kaj belulinoj kies jupoj flirtis pro la vento. Iom post iom tiuj homoj, kiuj ĉiutage preterpasis, ricevis nomojn, kaj la viro en la dua lito aŭdis tiel multe da anekdotoj pri iliaj faroj, ke li komencis senti ilin kvazaŭ geamikojn. Tio helpis pasigi la horojn kaj li estis tre dankema.

Tamen, subite, nova penso eniris lian kapon. Se io okazus al ĉi tiu viro apud li, li mem ricevus la liton apud la fenestro! Kuŝante senhelpe tie, tagon post tago, li ne povis eviti ke tiu ideo finfine fariĝu obsedo. Li avida atendis taŭgan momenton.

Post kelkaj noktoj la viro en la unua lito komencis suferi tre severan kor-atakon. Li malfacile etendis la brakon al la botelo, sed la alia viro, per preskaŭ superhoma peno, sufiĉe levis la torditan korpon el la lito por puŝi la botelon sur la plankon...

La postan tagon oni donis al li la liton apud la fenestro. Finfine! Tremante pro ekscito li tuj rigardis tra la fenestro. Kvar metrojn for de ĝi, plenigante la tutan distancon de lia horizonto, staris alta griza muro!

SUPERSENSA PERCEPTO

Multe da homoj ŝajne havas sesan senson. Ĝi varias laŭ tipo kaj grado de persono al persono. Al iuj ĝi ebligas antaŭvidi la estontecon, al aliaj ĝi permesas esplori en la pasinteco. Iuj aŭdas per ĝi avertajn voĉojn, aliaj kapablas legi pensojn. Iuj scias tion, kion persono diros, antaŭ ol tiu persono parolas; aliaj iel ekscias pri malsano aŭ akcidento antaŭ ol ili efektive ricevas la novaĵon. Preskaŭ ĉiuj homoj iam en la vivo sentas ke ili jam vizitis tute nekonatan lokon, kaj ke ili povas eĉ priskribi tion, kio staras nevidata post la stratangulo.

Ĉi tiu mistera kapablo povas esti beno aŭ malbeno al la posedanto. En fruaj tempoj multajn homojn, precipe virinojn, oni mortigis pro tiaj povoj. Kial? Pro timo, ĉefe. Tion kion oni ne komprenas, oni timas; kaj tion kion oni timas, oni se eble detruas. Dum la lastaj relative malmultaj jaroj ni lernis suficon pri supersensa percepto, ke ĝi ne plu timigas nin, do nun malmultaj “gesorĉistoj” suferas punon. Jen pluraj rakontaj ekzemploj de diversaj tipoj de tiu supera percepto.

1. Dum promenado

Estas eble ke vi jam legis ĉi tiun rakonton. Ĝi estas bone konata ekzemplo de supersensa percepto.

En bela somera vespero angla geedza paro malrapide marŝis laŭlonge de kampara vojo. Ili atingis la piedon de malalta monteto, kiam subite el la distanco venis la brua sono de motorbiciklo. Tiuj estis la tagoj de malmulta trafiko, do ili marŝis meze en la vojo. Tamen ili movis sin al la vojflanko ĝustatempe por vidi motorbiciklon rapidegantan preter ili sur la malĝusta flanko de la vojo. Ĝi atingas la supron de la monteto precize je la sama momento kiel aŭtomobilo venanta de la kontraŭa direkto. La du veturiloj renkontiĝas kun teruraj krako kaj kriegoj.

La piedirantoj rigardis unu la alian, scivolante kiel plej bone trakti tian situacion. Sed atendu! Kio estis? De malantaŭe venis la brua sono de motorbiciklo. La maŝino preterpasis ilin sur la malĝusta pado. Ĝi atingis la supron de la monteto je la sama momento kiel aŭtomobilo venanta de la kontraŭa direkto. Kun teruraj krako kaj kriegoj ili trafis unu la alian. Nur tiam okazis la vera akcidento, kiun la marŝanta paro jam antaŭvidis.

2. La kazo de Arnold

Mi havis propran kazon de antaŭvido, sed bonŝance ne tiel spektakla. Iam meznokte mi vekigis memorante bildoplenan sonĝon. En la sonĝo mi renkontis la patrinon de du antaŭaj lernantoj miaj. La filino estis bela kaj inteligenta knabino, plena de vivĝojo. La filo, pli juna, suferis pro kormalsano kaj estis pala kaj ĉiam laca. En tiu tempo nia urbo estis malgranda, kaj dum la jaroj post kiam mi instruis la infanojn, mi ofte renkontis la patrinon en unu butiko aŭ alia.

Nu, en mia sonĝo ŝi kaj mi renkontiĝis kaj, kiel kutime, babilis dum kelkaj minutoj. Ni parolis pri la vetero kaj urbaj okazaĵoj, kaj tiam mi demandis pri la filino.

“Tre bone ŝi fartas, f-ino Salt. Ŝi nun havas tre afablan fianĉon kaj baldaŭ edziniĝos. Ni tre ĝojas pro la afero.”

“Kaj kio pri Arnold?” estis mia posta demando.

“Ho, f-ino Salt, ĉu vi ne aŭdis? Arnold mortis antaŭ ses monatoj.”

Mi ne scias kiel la sonĝo finiĝis. Mi nur memoras ke mi, kuŝante en la lito, severe admonis min ke mi ne demandu pri Arnold kiam s-ino B. kaj mi denove renkontiĝos. “Ili mem sciigu vin,” mi ordonis al mi.

Longa tempo pasis antaŭ ol mi denove vidis s-inon B. Tiam, tute neatendite, tie ŝi staris antaŭ mi en butiko. Ni parolis pri la vetero kaj urbaj okazaĵoj, kaj poste mi demandis pri la filino. Mi ricevis la ĝojan novaĵon, ke ŝi baldaŭ edziniĝos.

“Kaj kio pri Arnold?”

“Ho, f-ino Salt, ĉu vi ne aŭdis? Arnold mor...”

Nur tiam mi memoris mian sonĝon, tro malfrue por ke ĝi utilis.

3. La ciganino

Oni certe ne povis nomi amikininon mian parapsika, sed unu fojon en la vivo ŝi havis ege frapan travivaĵon. Dum preĝeja bazaro ŝi konsentis vesti sin kiel ciganininon kaj legi sortojn el te-tasoj. Ĉiu vizitantino al ŝia budo devis kunporti sian uzitan tason, kaj mia amikino antaŭdiris belajn estontecojn per la te-folioj. Tiuj kiuj ricevis la prognozojn foriris ŝajne tute kontentaj, kaj la somera posttagmezo pasis plazure.

Sed subite mia amikino aŭdis sin kun hororo diri al tute fremda virino:

“Vi havas... dek tri geinfanojn... kaj vi atendas plian!”

Ŝi konsterniĝis tiom, kiom la alia virino, kiu povis nur balbuti: “Kiel vi... povis... scii tion?” kaj rapidi el la budo rigardegante la ciganininon,

RAKONTOJ

kvazaŭ ŝi estus la diablo mem. Ankaŭ mia amikino sentis sin tiel kaj ĝis hodiaŭ ne komprenas kiel ŝi povis doni al iu tian monstran antaŭdiron.

4. *Novaĵo el kalgaria ĵurnalo*

Mateo Sanders estis lokomotivestro sur la vagonaro inter Kamlups kaj Norda Kurbigo, Brita Kolumbio. Iam en 1912 li rigardis la relojn, kiam subite li aŭdis laŭtan krion: "Haltigu la trajnon!" Li entiris la kapon kaj rigardis sian hejstiston, sed tiu nur daŭrigis ŝoveli karbon en la ruĝvarmegan fornon. Evidente ne estis li la parolinto.

Mirante, Mateo denove kliniĝis eksteren kaj rigardis antaŭen. Denove venis la ordono: "Haltigu la trajnon!" Li tuj funkciigis la bremsojn kun laŭta grinco. Ĝustatempe! Tie, tuj antaŭ la lokomotivo, grandegaj rokoj bruege falis de supre, rompante metrojn da reloj kaj tute blokante la vojon.

La mistera voĉo el nenie savis almenaŭ cent homojn de sufero aŭ morto tiun tagon.

5. *Finfine, respondo*

Jen vera historieto rakontita al mi de mia patrino.

Estis la jaro 1888. La granda aŭditorio en Manĉestro estis plenplena, kaj la etoso estis ege streĉa. La homamaso atendis la aperon de fama klarvidantino kaj povis apenaŭ reteni sian eksciton. Precipe onklino Maria nervozis, ĉar ŝi jam sendis skriban peton, kune kun paro de manubutonoj, por ke la parapsika virino donu al ŝi respondon al delonga demando.

Dum preskaŭ dudek jaroj mia onklino aŭdis nenion pri la edzo, maristo, kiu vojaĝis longajn distancojn ĉirkaŭ la mondo. Ŝi ne sciis ĉu li mortis dum ŝippereo, perdis la memoron pro akcidento, aŭ intence trovis novan hejmon en alia lando. Se ŝi povus nur ekscii la veron! La aliaj membroj de la familio ridis kiam ŝi menciis la vizitontan klarvidantinon. Kion tiu fremdulino povus scii! Kaj ne, ili ne akompanos ŝin al Manĉestro; ne, ili ne volos esti vidataj en tia loko inter tiaj kredemuloj. Tamen ili ne protestis kiam mi proponis min kiel akompananton.

La daŭra bruo de subigitaj voĉoj abrupte ĉesis. La fama virino paŝis sur la estradon kaj stranga, misteroplena vespero komenciĝis. Por mi, okjara, estis samtempe streĉe kaj enuige. Nur unu respondo vere interesis min, kaj dume mi nerveze mordetis truojn en la fingrojn de miaj novaj gantoj. Finfine ĝi venis. La mesaĝon de mia onklino la virino malrapide legis, dume fingrumante la manubutonojn en siaj manoj.

“Ho, strange,” ŝi subite kriis. “Hm, ĉi tiu ne estas mano.” Paŭzo dum ŝi konsideris tion. “Ho... jes... ĝi estas pinĉilo.” (Tia ĝi estis ĉe mia onklo.) “Mi estas maristo.” Tiam ŝi forte tenegis la gorĝon kaj ŝajnis strangoli. “Ho, ve... ve... mi dronas... mi dro... !”

Mi eĉ ne memoras, ĉu ŝi falis aŭ povis atingi seĝon. Onklino Maria mem estis provizore venkita de emocio kaj mi devis prizorgi ŝin. Sed baldaŭ ŝi regajnis sian trankvilon kaj ni povis hejmeniri. Ekde tiam ŝi vivis kontenta, nun finfine sciante kio okazis al la amata edzo.

6. *Mesaĝo el Grekio*

Estis preter kompreno tio, kio okazis al Merla Braŭn tiun tagon. Ĝi lasis ŝin ŝanceliĝanta sur la rando de nerv-abismo dum preskaŭ jaro. Post sia reiro al pli-malpli normala vivo ŝi tute rifuzis paroli pri la afero. Estas nur lastatempe, post dudek jaroj, ke oni povas ekscii kiel mensrompa estis ŝia travivaĵo. Psikologoj ankoraŭ miras pri ŝia stranga kazo. Jen ĝi.

Merla estis sekretario ĉe bone konata importisto en Londono, Britio. Ŝi estis diligenta, modesta kaj ĝentila. Ŝia malgranda ĉambro apudestis la grandan oficejon de ŝia ĉefo. Tamen, kiam necesis iri al li por diktaĵo aŭ subskribo, ŝi neniam eniris sen frapi. Ŝi estis tute ordinara juna virino. Sufiĉe bone ŝi regis la anglan lingvon por tajpi netajn, senerarajn leterojn, sed ŝi konis neniun alian lingvon kaj ĝis tiam neniam vojaĝis ekster sia propra lando.

Des pli stranga do estis ŝia konduto tiun tagon, kiam du grekoj vizitis la oficejon por diskuti estontan ekspedon de oliv-oleo el sia rafinejo en Grekio. Ŝi kondukis ilin en la grandan ĉambro kaj kviete fermis la pordon.

Kiam ŝi denove sidis antaŭ la tajpmaŝino, ŝi subite sentis sin kvazaŭ en nebulo. Ŝi ne plu povis klare pensi, ŝi eĉ ŝajnis esti en alia mondo. Tamen tiu stato daŭris nur kelkajn momentojn, post kiuj ŝi sentis sin pli ol kutime energia kaj vigla. Ŝi rapidis en la grandan ĉambro sen frapi kaj tuj komencis paroli al unu el la grekoj. Ŝi memoris nenion post tio, ĝis ŝi denove sidis en la propra ĉambro kaj iu demandis, ĉu ŝi nun fartas pli bone.

Evidente, laŭ la raporto de la tri viroj, ŝi greklingve kaj flue parolis al s-ro Viliatis, dirante ke ŝi havas por li malbonan novaĵon. Ŝi tiam milde, tamen firme, sciigis lin ke lia dudekjara filo suferis motorbiciklan akcidenton kaj, jes, tuj mortis. Ŝi nomis la grekan urbeton, la straton kie la akcidento okazis, kaj la hospitalon al kiu oni portis lin.

RAKONTOJ

Kompreneble la viro ege ekscitiĝis kaj akuzis ŝin pri kruela ŝercado. Tamen ŝi insistis ke la novaĵo estas vera kaj ke li ricevos konfirmon pri ĝi post eble unu horo.

Laŭ la viroj la konversacio estis tute en la greka lingvo, kiun la juna virino ne konis. Post transdono de la mesaĝo Merla denove ege konfuziĝis. Iel ŝi sukcesis reatingi sian propran ĉambron kaj kun forta ŝoko sidiĝi apud la tajpotablo. Tie oni poste trovis ŝin tute nekohera kaj malsana.

Meze en la konfuzo sonis la telefono. La ĉefo levis la ricevilon, aŭskultis momenton kaj transdonis ĝin al s-ro Viliatis. La voko estis el Grekio, kaj virina voĉo singultante sciigis lin ke ilia amata filo ĵus mortis pro motorbicikla akcidento.

LA Malfeliĉulo

(vera rakonto)

Li estis soleca viro, bonaspekta kaj plaĉa, sed preskaŭ ĉiam sola. Li loĝis en la unuĉambra apartamento apud la mia. Kiam ni renkontis unu la alian en la koridoro ni ĉiam parolis kelkajn vortojn, sed ni ne vere konatiĝis. Nur poste mi eksciis lian nomon... Tom Karson. Li estis, mi pensas, ia vendisto, kaj lia apartamento estis ankaŭ lia oficejo. Lia laboro postulis pertelefonan reklamon kaj oftajn vojaĝojn dum longaj periodoj.

En semajnfinoj knabo ok- aŭ naŭjara restis ĉe li. Estis lia filo. Kiel tiu dormis mi ne scias, ĉar troviĝis en la ĉambro nur unu "taglito". Sed la planko estas sufiĉe komforta dormloko por juna knabo, mi supozas. Mi ne sciis, ĉu li kaj la edzino nur disiĝis aŭ eksgeedziĝis, ĝis unu somera nokto kiam mi ne povis endormiĝi pro la varmeĝo. Mia fenestro estis larĝe malferma, kiel li povis facile rimarki, sed ŝajne tio faris neniom da diferenco kiam li malplenigis la koron al vizitantino. Lia balkona kuŝ-seĝo staris tre proksime al mia fenestro, kaj mi ne povis ne aŭdi ĉion diratan. Jes, li eksedziĝis kaj jes, li ege rimarkas la mankon kaj de la edzino kaj de filo. Plue, li diris ke li alte taksas la okazon diri ĉion ĉi al ŝi, kaj esperas ke ŝi denove venos... kaj ofte. Ĉu ŝi ja faris tion mi ne scias, ĉar la vetero subite ŝanĝiĝis kaj ne plu permesis sidadon sur balkonoj.

Kompreneble s-ro Karson estis ebria tiun nokton... Li ofte ebriis. Unufoje mi vidis lin, kiam li preskaŭ ne povis atingi kaj malŝlosi la pordon. Alian fojon li havis terurajn kontuzojn sur la vizaĝo pro falo aŭ trafo kontraŭ meblon. Mi tre kompatis lin, havantan nur botelon kiel amikon.

Fruvespere en aŭgusto li frapis sur mian pordon. Lia vesto estis tre eleganta, ĉar li ĉeestos formalan vespermanĝon. Li diris ke, tuj kiam li sukcesis ligi la kravatton, butono falis de lia ĉemizo. "Ĉu vi estos tiel afabla rekudri ĝin por mi?" — li petis. Dum mi faris tion, mi menciis ke estas eble aĉeti etajn skatolojn enhavantajn fadenojn, kudrilojn, tondilon ktp por ĝuste tiaj okazoj, kaj mi diris kiel utila tia aĵo estas kiam oni vojaĝas. Li dankis min kaj foriris. Du-tri tagojn poste li montris al mi etan ripar-ekipaĵon kiun li ĵus aĉetis. Ĝi ege plaĉis al li, kaj li agis kiel infano kun nova ludilo.

Nelonge post tio du homoj de nia etaĝo subite mortis, ambaŭ post longaj kaj doloraj malsanoj. Okazis ke Tom Karson kaj mi laboris en la apartamentara lavejo samtempe, kaj ni iomete parolis pri la mortoj. Neklarigeble la etoso fariĝis peza. Por mildigi la neatenditan streĉon mi ŝerce diris: "Kaj ankaŭ vi kaj mi ne tro bone sanas, ĉu?" Lia sekva stranga rigardo iom mirigis min.

RAKONTOJ

Kelkajn tagojn poste iu frapis. Kiam mi respondis, tie staris mia “amiko” kun velkanta, longtiga ruĝa rozo en la mano. Li aspektis iom embarasita kiam li diris: “Mi volas ke vi havu ĉi tion. Ĉu eble vi aŭdis ke mi faros longan vojaĝon al Norvegio?”

“Jes, mi aŭdis, kaj mi esperas ke vi ege ĝuos ĝin,” mi elkore ridetis, skuante lian manon. “Feliĉan vojaĝon kaj sukceson por via entrepreno!”

“Multan dankon,” li kviete diris, kaj iris for.

Ŝajnis nur tagojn post tio, kiam venis la terura novaĵo pri li, ne el Norvegio, sed el Havajo. La raporto estis ke oni trovis lin sur la plaĝo, morta... pro sunfrapo, oni diris. Mi konis lin dum nur kelkaj monatoj, sed mi funebras lin preskaŭ kiel filon.

LA RINGOJ

La du sinjorinoj kuŝantaj apude sur la ferdeko de krozŝipo malmulte parolis. Nur de tempo al tempo ili murmuris kelkajn vortojn unu al la alia, la okulojn fermitaj kontraŭ la lumo, kaj la iom dikajn korpojn lukse etenditaj sub la mediteranea ĉielo. Estis dolĉe varma tago. Molaj blankaj nubetoj ludis supre, foje amasiĝante kaj kaŝante la brilan sunon dum longaj periodoj, kaj subite disiĝante por ĉasludi inter si.

Estis dum unu subita sunmontriĝo ke la najbarino de s-ino Tejlor movis la maldekstran brakon kaj ekpafis preskaŭ nepriskribeblan desegnon de koloro, kiu dancis kaj flugetis en la sunbrilo.

“Ho,” pretervole ekkriis s-ino Tejlor, “mia fianĉinringo!”

“Kion vi volas diri?” — surprizite demandis la alia.

“Nu... mi ne... scias kiel diri,” hezite venis la respondo, “. . . sed tiu estas la sama desegno... kiun faris mia propra fianĉinringo.”

“Via propra ringo... ? Mi vidu ĝin,” diris la najbarino, etendante la manon por teni la maldekstran manon de la alia virino. “Ĝi ja similas la mian, ĉu ne?” Ŝi plu rigardis ĝin kun neatendita intereso.

“Jes,” kriis s-ino Tejlor, rigardante ĉiun ekbrilon de la ringo de la alia kaj preskaŭ plorante. “Sed ĉi tiu ne estas mia propra ringo...”

“Ne via propra?” miris la alia. “Sed kial vi ne portas la propran? ... Ho, pardonu al mi...” Subite ŝi embarasiĝis. “Tiu estas privata afero kaj mi certe ne intencis trudi la nazon en fremdan vazon.”

“Tio ne gravas. Efektive plaĉus al mi rakonti la historion al iu... sed ĝi estas iom longa.”

“Estas bela tago kaj mi havas nenion por fari ĝis la vespermanĝo,” respondis la alia virino. “Ne kiel hejme, kie ĉiam troviĝas io farenda,” ŝi aldonis kun grimaco.

“Do, bone,” ridetis la alia. “Sed unue ni konatiĝu, ĉu? Mi estas Roz Tejlor kaj mi vojaĝas kun mia edzo, Ĝon.”

“Ankaŭ mi ferias kun mia edzo, Alfred Klajn. Mi estas Hana Klajn. Mi ĝojas ekkoni vin, Roz. Do, nun, al la rakonto.”

La du virinoj eĉ pli malstreĉis sin, kaj post mallonga paŭzo s-ino Tejlor iom hezite komencis paroli. Jen ŝia rakonto.

Kiam ni decidis geedziĝi, mia edzo insistis ke mi mem elektu la fianĉinringon. Mi supozis ke tio estos malfacila afero, sed ne. Male. Apenaŭ

ni atingis la elmontroŝrankon de fama juvelejo, kiam unu ringo ŝajne ridis kaj gestis al mi. Ĝi ŝajnis diri: “Jen mi, atendanta vin.” Mi memoras ke mi eĉ ne rimarkis la aliajn ringojn, pro la preskaŭ magia desegno kiun tiu elĵetis. Ekster la ŝranko ĝi eĉ pli brilis sub la multaj lumoj de la granda butikio. La ringo estis tre multekosta laŭ niaj normoj, kaj mi hontis kiam mi pensis pri la necesajoj kiujn tia monsumo povus aĉeti por ni. Sed estis tiu ringo, kiun mia kara edzo efektive aĉetis por mi.

(Denove paŭzo. Roz Tejlor evidente revivis la memoron de tiu travivaĵo.)

Mi devas konfesi ke mi certe ne estis bona dommastrino, almenaŭ komence. Mi ne ŝatis kuiradon kaj bakadon; mi prokrastis tolaĵlavadon kaj gladadon; kaj mi tute malamis lavadon de la manĝilaro. Sed polurado de la planko kaj meblaro estis tute alia afero. Farante tion mi surlasis la ringojn, kaj la belega kolora desegno brilis ĉie. Ĉe unu speciala angulo, kie sunstrio trafis la diamanton, la beleco estis rava. Mi ekstaziĝis. Baldaŭ mi konstatis, ke la ĝojego kiun mi sentis pro la ringo, valoras la originan prezon de mia juvelo.

Post eble du jaroj, mi rimarkis ke unu pinĉileto estas malfirma, do mi reportis la ringon al la butikio kie ni aĉetis ĝin, kaj petis ekzamenon kaj riparadon. Post semajno mi iris por rehavi ĝin. Tuj kiam mi ekvidis ĝin, mi sentis ke io estas malĝusta. Ĉi tiu ringo ne povis esti mia; ĝi ne fulmetis, kaj ia spriteco mankis al ĝi.

“Ĉu vi donis al mi alian ringon?” mi demandis. “Ĉi tiu ne ŝajnas esti la mia.”

“Sinjorino,” fi-impone riproĉis la viro servanta min, “ni neniam eraras pri diamantoj!” Kaj li foriris.

Mi eliris sentante min tre malfeliĉa. La ringo sur mia fingro ŝajnis fremda, ne mia amata sprita juvelo. Hejme ambaŭ ni rigardis ĝin. La muntaĵo certe aspektis sama, eĉ se iomete malpli delikata, kaj mi eĉ imagis ke la ringo estas iom pli peza ol kutime. Krome, kaj plej malbone, la ekscita luma desegno ne plu estis tie. Tiu ja ne estis mia ringo.

Mia edzo kaj mi revizitis la butikon. Ĉi-foje ni postulis paroli kun la butikestro. Ĉi tiu viro estis eĉ pli fi-impona ol la antaŭa komizo. Li streĉis sin ĝis sia tuta alto kaj, parolante kvazaŭ ni estus infanoj, li diris: “Ĉi tiu firmao faris sian reputacion pro sia sperto pri diamantoj. Tiaj gemoj estas tro valoraj, kaj ringoj tro intimaj, por ke ni faru erarojn. Se ni redonis al vi ĉi tiun ringon, sinjorino, estu certa ke ĝi ja estas via. Bonan tagon.”

Ni povis fari nenion. Kiel ni povus pruvi antaŭ tribunalo ke fama firmao faris eraron? La ĝuo foriris el mia vivo... ho jes, mi iom troigas la aferon... sed mi rimarkis grandan mankon pro la foresto de mia propra amata ringo.



“Ni iru al alia juvelisto,” diris mia edzo iom da tempo poste. “Ni diru nenion pri la okazaĵo, nur petu ke oni taksu la ringon.”

Tion ni faris. La juvelisto afable salutis nin kaj sperte kontrolis la diamanton. “Fju!” li fajfis. “Vi havas ĉi tie tre valoran gemon.” Li rigardis nin dirante nenion, tamen estis evidente ke li konsideras nin neriĉuloj kaj scivolas pri nia posedo de tia ringo. Mi parolas pri tempo antaŭ preskaŭ kvindek jaroj. Por mia bela ringo ni pagis ducent kvindek dolarojn, kiam la plimulto pagis nur cent.

“Kiom, do, valoras tiu ringo?” malpacience demandis Ĉon.

“La diamanto sola almenaŭ okcent kvindek dolarojn,” respondis la juvelisto, “sed pro la beleco de la muntaĵo eble oni povus vendi ĝin je preskaŭ mil.”

Ĝis tiu punkto la najbarino sur la alia ferdekseĝo estis restinta silenta, nur rigardante de tempo al tempo la du ringojn. Sed ŝia vizaĝesprimo subite ŝanĝiĝis kaj la okuloj plilarĝiĝis pro nekredo... kaj pro io alia.

“Do, vi portas ringon kiu valoras almenaŭ sescent dolarojn pli ol la propra!”

“Jes... kaj ricevas nenian ĝojon pro tio. Ni metis reklamojn en la ĵurnalojn dum tuta semajno, kaj mi traserĉis la kolumnojn de multaj ĵurnaloj dum longa tempo, sed senrezulte. Finfine mi cedis al la sorto kaj rezigne portis ringon, kiu signifas nen. . .”

“Kie tio okazis?” interrompis s-ino Klajn. “Kaj kiam?”

“En K-o, kie ni loĝis... Mi pensu... Ni aĉetis la ringon en 1939 ĵus antaŭ la Dua Mondmilito... do, eble en la somero de 1941.”

La okuloj de s-ino Klajn denove plilarĝiĝis. “Estis dum tiu sama somero, kiam mia edzo foriris al la milito. Ni loĝis en Usono sed li volis adiaŭi la gepatrojn en K-o. Ni restis tie tri pliajn tagojn, dum oni kontrolis mian fianĉinringon. Unu pinĉileto pikadis ĉion. Ĉu...?”

La du virinoj fiksrigardis unu la alian. Ĉu estis eble? Zorge ili komparis la du ringojn. Vere ili ege samaspektis, sed tiu sur la fingro de Hana Klajn brile fulmetis.

“Dum via rakonto mi komencis memori ke, post la riparo de mia ringo, mi ja rimarkis iom pli da brilo, sed mi supozis ke tio estas pro bonegaj purigado kaj polurado. Kaj, se mi sentis malpli da pezo, mi ne efektive rimarkis tion pro la malĝojo rilate la foriron de mia edzo. Mi scias nur ke li pagis fabelan prezon por tiu ringo, sed li neniam diris kiom.”

“Ni konsultu niajn edzojn,” sugestis s-ino Tejlor, “kaj proponu ke ni ĉiuj iru al bona juvelejo en Marsejlo por retaksigi ambaŭ ringojn.” Tiel estis aranĝite.

La postan tagon la du geedzaj paroj renkontiĝis. Ambaŭ edzoj nun jam aŭdis la rakontojn pri la diamantoj. Post prezentiĝoj estis s-ro Klajn, kiu la unua parolis. “Tiun fianĉinrington, kiun portas Hana, ŝi intencas donaci al nia nepo, Hari, kiu baldaŭ edziĝos. Estas la deziro de ni ambaŭ. Hari povas aŭ vendi ĝin aŭ donaci ĝin al la fianĉino... laŭ ilia plaĉo. Sed, kion ajn li faros, tiu ringo devus valori grandan monsumon. Eĉ antaŭ pli ol kvardek jaroj mi pagis pli ol okcent dolarojn por ĝi; nun ĝi devus valori almenaŭ duoble. La lastan vesperon mi faris diskretajn demandojn al la ŝipestro, kaj li sugestis ke mi konsultu iun en la firmao J-o en Marsejlo. Li eltrovis por mi ankaŭ la adreson.”

“Bone farite,” kriis Ĝon Tejlor. “Do postmorgaŭ eble longedaŭra enigmo solviĝos.”

“Se okazus ke ni du vere havas la ringon de la alia,” tuj diris Hana Klajn, profunde rigardante en la okulojn de la alia virino, “kiel vi reagus al tiu novaĵo, Roz? Ĉu vi preferus reteni la ringon, kiun vi portis dum tiom multaj jaroj, aŭ rehavi iun malpli multekostan?”

“Ho, kiel multe mi ŝatus havi mian propran ringon, kiun Ĝon donacis al mi!” fervore respondis Roz.

“Kaj vi?” demandis Klajn al la alia viro. “Ĉu vi estus kontenta?”

“Ne estas mia decido,” respondis Tejlor. “Tio, kio feliĉigos Roz, feliĉigos min.”

En Marsejlo la nekredetblaĵo okazis. Post zorga ekzameno afabla juvelisto taksis la du ringojn laŭ kanadaj dolaroj. Tiun de la fingro de Hana Klajn li taksis je preskaŭ mil dolaroj. “Estas la bela ora muntaĵo, krom la diamanto mem, kiu difinas la prezon,” li diris. Tiam, rigardante la alian ringon, li admire kriis: “Sed por ĉi tiu vi devus ricevi almenaŭ tri mil kvincent en iu ajn bazaro!”

Ekster la juvelejo la du virinoj interŝanĝis du belajn diamantojn. Unu virino estis ege feliĉa pro sia nepo kaj la fianĉino, la dua pro la belega dancanta desegno de sia propra ringo... tiu kiun la amata edzo donacis al ŝi.

Tiun tagon du feliĉaj geedzaj paroj interŝanĝis ne nur ringojn sed ankaŭ daŭran amikecon. Ankoraŭ ili skribas leterojn kaj, kiel eble plej ofte, faras vizitojn. Por Roz la sprita fulmeto sur ŝia fingro estas daŭra ĝojo, kaj por Hana la vido de ŝia ringo sur la bo-nepina fingro donas korvarmigan feliĉon. Koncerne la edzojn, tiuj du ankoraŭ miras pro la kaprica sorto kiu okazigis ĉion!

ŜIA UNUA KONGRESO

(vera rakonto)

Kiel afablaj ĉiuj estas! Kiel helpemaj! Kiam ŝi surteriĝis ĉe la flughaveno, du junaj esperantistoj bonvenigis ŝin kaj veturigis al la kongresejo, kie du aliaj helpis registri ŝin kaj trovi la ĝustan ĉambron. Ho, kiel kontenta ŝi estas, ke ŝi decidis veni ĉi tien!

Ŝi estas nur komencanto. Estis antaŭ apenaŭ ses monatoj, kiam ŝi atakis la unuan lecionon de koresponda kurso. Kaj ŝi estas ĉi tie sola el sia lando. La intenco estis ke ŝi akompanu fluparolan esperantistinon, sed la virino malsaniĝis lastmomente kaj ŝi, Lisa, devis vojaĝi sola. Tre bonŝance, oni uzas la saman lingvon en ĉi tiu lando kiel en la ŝia, sed jam ŝi konstatis ke esperantistoj ne ŝatas tiujn kiuj “krokodilas”. Tamen dum la interkonatiĝa vespero, hieraŭ, helpis la fakto ke geedza paro povis, en ŝia propra lingvo, dufoje rapide klarigi la malfacilaĵojn al ŝi.

Tiu estis tre ĝoja vespero. Dum la ludoj, la kantado, kaj la posta manĝado, ĉiuj traktis ŝin ne kiel fremdulinon, sed kiel malnovan amikininon. Kiel afablaj homoj ja estas esperantistoj!

La sekvan tagon dum kunsidoj ŝi sukcesis kompreni la esencon de ĉiuj diskutoj, perdante nur kelkajn detalojn. Sed ĉar, antaŭ la kongreso, ŝi eĉ ne unufoje estis en grupo, kiu parolis nur Esperanton, ŝi ege surpriziĝis ke tiom estas komprenebla al ŝi. Tian simplan lingvon la tuta mondo ja devus koni kaj uzi.

Ne estis eble ne rimarki etan viron, preskaŭ kalvan kaj tre miopan. Li strabis ĉirkaŭ si kvazaŭ perdita kaj soleca. Se li havis tieajn geamikojn, tiuj ŝajne lasis lin, kaj li vagis preskaŭ ĉiam sola. Lisa tre kompatis lin.

Venis la bankeda horo. La granda ĉambro brilis per lumoj kaj la belaj roboj de la virinoj. Grupoj trovis sidlokojn kaj feliĉe babilis, atendante la komencon de la festo. Fine envenis anser-vice la prezidanto kaj la aliaj ĉeftablaj gastoj. Ĉiuj krom la prezidanto sidiĝis; li tenis la mikrofonon por paroli.

En tiu momento figuro aperis ĉe la enirejo. Estis la eta viro, sola kiel kutime. Ŝirmante la okulojn kontraŭ la lumoj, li serĉis sidlokon. En tia granda plena ĉambro tio estis, kompreneble, preskaŭ ne ebla. Subite Lisa, kompatante la viron kaj memorante la afablon kaj amikecon de ĉiuj al ŝi mem, duonstariĝis, gestis al la viro, kaj fingromontris seĝon apud si. Okazis ĝenerala aŭdebla enspiro dum la viro trovis sian vojon tien, kaj simila elspiro kiam li fine sidiĝis.

Kvankam la eta viro ne odoris je drinkaĵo, certe li ebrie agis dum la tuta vespero. Apudaj gastoj ege amuziĝis kaj ridis, kaj Lisa iom embarasiĝis.

La sekvan tagon tiu stranga homo sekvis Lisan kiel hundido. Iel li sukcesis trovi sidlokon apud ŝi dum la matena kunsido. Poste li vidis viron kun fotilo kaj petis ke tiu faru du bildojn de li kaj Lisa kune. Li tuj pagis por ili kaj donis unu al ŝi.

Alvenis la lasta posttagmezo de la kongreso. Ĉe la domo de la prezidanto ĉiuj kiuj ne jam devis hejmeniri, pasigis horon aŭ du kantante. Subite la eta viro aperis meze en la granda homcirklo. Dirante ion pri veturo kun amiko, se li tuj iros, li subite kaj mallerte kliniĝis super la genuoj de Lisa kaj laŭte ŝmacis ŝin. Tiam, denove dum tuta silento, li estis for.

Semajnon post la reveno hejmen de Lisa, ŝia patrino ricevis leteron lian. Li skribis ke li posedas bienon de pli ol ducent kvadrataj metroj, ke li havas cent kvindek mil dolarojn en la banko, kaj ke li volas “peti la manon de via filino, Lisa, por geedziĝo.”

Ne estis facile klarigi al tiu kompatinda viro ke, kiam ŝi gestis al li ĉe la bankedo, ŝi volis nur repagi, per afablo al iu alia, la multajn afablaĵojn ricevitaĵojn de ŝi mem dum la kongreso.

LA MORSA KODO

“R-r-r-r-r-r.” La telefono sonoris. Maria Paten respondis al ĝi. “Saluton,” ŝi diris.

Plaĉa vira voĉo ĉe la alia fino de la drato diris: “Saluton, ĉu hazarde vi iam estis Fraŭlino Boran, kiu instruis ĉe la Centra Lernejo?”

“Jes. Tiu estis mi. Kiu parolas?”

“Mi estas antaŭa lernanto via, Erik Sparo. Vi verŝajne ne memoras min, sed...”

“Erik Sparo! Ho jes, mi memoras vin... blonda, rondvizaĝa kaj bluokula... kaj vi atingis preskaŭ ĝis mia ŝultron.”

La viro elkore ridis. “Bona priskribo. Sed vi apenaŭ rekonis sur la strato viron, kies ŝultron vi certe ne atingus, kaj kiu havas malhelbrunajn hararon kaj lipharojn.” Li paŭzis kaj tiam aldonis: “Sed, por esti serioza, mi telefonas al vi por sincere danki vin, pro leciono kiun vi antaŭ jaroj instruis al mi.”

“Ho, kiu leciono estis tiu?”

“Ĉu vi memoras certan posttagmezon, kiam apuda klaso gimnastike ekzercis sin por estonta programo kaj la bruo estis tiel laŭta ke vi diris: ‘Nu, jen bona okazo instrui parton de la morsa kodo al vi?’”

“Mi instruis tion al ĉiuj klasoj, se eble. Mi ne memoras tiun apartan okazon.”

“Nu,” la vira voĉo diris, “iamaniere, super la bruo, vi sukcesis klarigi ke ĉiuj homoj devus scii kiel venigi helpon. Vi diris ke SOS (Helpon!) estas punkt’ punkt’ punkt’, strek’ strek’ strek’, punkt’ punkt’ punkt’. Tiam vi laŭte frapis vian skribotablon per tri mallongaj, tri longaj, tri mallongaj frapoj de via pugno. Ravite, ni ĉiuj same faris. Poste ni batis la piedojn kontraŭ la plankon. Ni batis preskaŭ ĉion en la ĉambro. Kia bela, ĝoja bruego!”

“Jes, nun mi memoras tion.”

“Poste vi klarigis kiel uzi la saman principon por fari fumsignalon. Kaj, ĉar iuj el la knabinoj havis spegulojn, vi permesis nin amasiĝi ĉe la fenestro, kaj vi montris al ni kiel uzi la reflektion de sunlumo sur vitro, aŭ sur io ajn brila, por elsendi signalojn.”

“Kaj kial vi nun mencias ĉion ĉi, Erik?” demandis la instruistino. “Vi certe havas trafan kialon.”

“Ĉar vi preskaŭ certe savis mian vivon pro tiu leciono,” venis la respondo.

“Vidu, Erik, mi tre multe volas aŭdi la tutan rakonton,” diris Maria, “sed mi ege ŝatus vidi vin. Ĉu vi povas viziti min kaj fini ĝin ĉe mi?”

“Bedaŭrinde ne,” respondis la viro. “Mi kaj mia familio estas ĉe la flughaveno kaj atendas aviadilon al Vankuvero. Sed, estante en Kalgario, mi ne povis ne kontakti vin, se eble. Bonŝance mi eksciis ke via edzina nomo estas Paten. Mi jam telefonis du Patenojn... sensukcese... kaj ĝojas ke via nomo ne estas Braŭn; troviĝas kolumnoj da tiuj en la telefonlibro!”

Ambaŭ ridis. Fine Maria diris: “Nu, Erik, daŭrigu la historion, mi petas. Mi apenaŭ povas atendi.”

“Certe vi legis, aŭ aŭdis, pri la lastatempa tertremego en Armenio. Nu, okazis ke amiko mia, kuracista kolego, invitis min pasigi kelkajn tagojn ĉe li en la ĉefurbo. Dum pluraj jaroj ni estis korespondintaj, kaj li volis montri al mi sian novan laboratorion. Do mi lasis la familion en Budapeŝto kaj iris tien.

Por fari longan rakonton mallonga, mi diros nur ke unu tagon ni du iris en alian kvartalon de la urbo por renkonti medicinan spertulon. Ni neniam vidis lin. Subita tertremego skuis lian altan apartamentejon, kaj ni estis tuj sub kilogramoj da masonaĵo. Lumo tute estingiĝis, la aero estis plena je polvo kaj la doloro en mia brusto estis preskaŭ netolerebla. Mi ne povis movi min.

Kiam mi povis regajni iom da spirkapablo, mi vokis al mia amiko. Neniu respondis. Denove mi kriis lian nomon. Denove silento. Mi ne scias kiom da tempo mi kuŝis tie... ŝajnis kvazaŭ tagoj. Mi ja scias ke mi senkonsciigis kaj rekonsciigis plurajn fojojn, sentante min pli malforta ĉiun fojon.

Dum unu el tiuj periodoj de rekonsciigo mi aŭdis, aŭ imagis ke mi aŭdis, bruon ie supre... etan, malklaran bruon. Mi streĉis min por aŭskulti. Ĉu ĝi estis vera sono aŭ nur reva? Denove ĝi venis. Nu, ĉu vera aŭ ne, kun ĝi venis io el mia pasinteco, kio diris al mi: ‘Vekiĝu. Ne necesas morti. Faru ion por helpi vin mem. Tuj, ion faru.’

Per preskaŭ superhoma peno mi sukcesis movi mian maldekstran manon por palperĉi. Post kio ŝajnis kvazaŭ horoj, mi trovis pecon de io malmola. Estis tiam, ke venis al mi la ĝusta memoro. ‘Uzu la morsan kodon,’ ĝi diris. La sono kiun mi kapablis fari estis tre mallaŭta kaj mi kelkfoje senkonsciigis, tamen iu evidente fine aŭdis mian frapadon kaj liberigis min. Do, dank’ al Dio, pere de vi, jen mi ankoraŭ, viva kaj bonsana.”

“Ho, Erik, mi tiel multe ĝojas. Sed kio pri via amiko?”

“Li mortis,” venis malfeliĉe la respondo. “Mi opinias ke li estis morta kiam mi la unuan fojon vokis al li, kaj pro tio mi estas dankema, ĉar lia korpo estis ege frakasita. Ankaŭ lia sperta kolego pereis, mi poste aŭdis.”

RAKONTOJ

“Kia travivaĵo, kara Erik. Mi multe ĝojas ke vi telefonis al mi. Certe mi ofte pensos pri vi en la estonteco kaj mi esperos vidi vin, kaj eble vian familion, iam.”

“Kaj mi vin, kara instruistino, mia savantino. Ĝis tiam.” Kaj li estis for.

VERAJ RAKONTOJ DE INSTRUISTINO

1. A.U.

Unu matenon f-ino D. finis la klarigon de minora punkto en matematiko kaj tuj igis la klason komenci sidlokan ekzercadon. Ŝi iris tien kaj reen inter la pupitroj, helpante iun elserĉi krajonon, alian trovi sian skrapgumon, alian trapensi problemon ktp. Baldaŭ ĉiu infano diligente laboris. Tiam f-ino D. sidigis ĉe sian propran pupitron kaj klopodis korekti kajerojn.

La klasĉambro silentis. La tiktako de la horloĝo sur la muro, kaj la okazaj frapeto de kraĵono kaj sopireto de lernanto estis la nuraj sonoj.

Subite f-ino D. ekkonsciis ke antaŭ ŝia pupitro staras la juna Brajan, li kun la profunde bluaj okuloj kaj la longegaj okulharoj. Ĉi tiuj tremetis, kiam ŝi suprenrigardis.

“Nu, Brajan, kion vi volas?” demandis la instruistino ridetante pro lia serioza mieno.

“F-ino D...,” iomete hezitis Brajano kun ege tremetantaj okulharoj, “. . . viaj komencliteroj estas A.U... Ĉu ili eble povus signifi Anĝela Uendi?” Esperege kaj kun brilegaj okuloj li atendis.

“Kiel belegaj nomoj!” afable respondis la instruistino. “Ĉu vi mem elpensis ilin?”

“Jes... Ĉu ili ja estas viaj nomoj?” Li eĉ forgesis diri ŝian nomon.

“Ne, Brajan... domaĝe.”

Kun kurbigintaj ŝultroj tre malfeliĉa knabeto reiris al sia sidloko.

2. Infana malavaro

Ĉi tiu estas malnova rakonto, ĉar, kiel vi legos, kutimoj multe ŝanĝiĝis ekde tiu tempo.

Juna instruistino kutimis ricevi je Kristnasko, de siaj unuagradaj lernantoj, donacojn, precipe de kosmetikaĵoj, kiel ekzemple haŭtkremo, sapo kaj malmultekosta parfumo. Ŝi mem ne povis uzi la tuton, do ŝi devis elpensi rimedojn liberigi sin je iom da ĝi.

La plejparton de la parfumo ŝi retenis en la lernejo por tiea uzo. Ĉiun matenon, kiel parto de la sanprogramo, ŝi ekzamenis la purecon de la infanaj manoj. La gelernantoj devis stari en cirklo ĉirkaŭ ŝi kaj montri unue la polmojn kaj poste la mandorsojn. Se kaj manoj kaj ungoj estis puraj, la infano ricevis tuŝon da parfumo. Tre malmultaj revenis al la sidloko sen odoro kaj rideto.

RAKONTOJ

Unu matenon, kiam f-ino C. estis okupata per tia ekzamenado, la pordo kviete malfermiĝis. Momenton poste aperis antaŭ la surprizitaj okuloj de la instruistino granda manparo, sin turnante unue polmojn supren kaj poste dorsojn, kaj vira voĉo demandis: “Ĉu ankaŭ mi meritas iom?”

F-ino C. suprenrigardis, kaj tie staris la ĉefestro mem de la tuta lerneja sistemo. Antaŭ ol ŝi pro surprizego povis respondi, sesjara knabeta voĉo urĝe petis.

“Ho, donu al li iom, tamen.”

3. *Estis tia tago*

Unu matenon Roberto ellitiĝis laŭ “la malĝusta flanko de la lito”. Tion lia juna instruistino povis je la unua ekvido rimarki. Robert ofte estis malbonhumora, kaj tio ĝenis ŝin. Ĉu indulgi lin aŭ puneti lin, tio estis la problemo kiun ŝi ankoraŭ ne solvis kontentige.

Kaj nun, jen la sama. Hodiaŭ li ne volas partopreni la legadon kun la aliaj klasanoj. Per dolĉaj vortoj kaj kuraĝiga maniero f-ino M. provis persvadi lin, sed li ankoraŭ ne volis. Ŝi pripensis la aferon. Ĉu li malsanas? Lia koloro estas normala; krome tiel ofta malsano ne estas kredebla. Eble li nur obstinas. Eble oni devus haltigi tiun obstinon, antaŭ ol ĝi troiĝus. Cetero lia konduto estas tre malbona ekzemplo por la aliaj. Espereble ankaŭ ili ne adoptos tian konduton.

Ŝi decidis insisti ke la infano faru kiel ordonite. Do, parte trenante permane la ankoraŭ plorantan knabeton, parte puŝante lin de malantaŭe, ŝi firmigis la voĉon kaj severe ordonis: “Ĉesigu tiun sensencaĵon. Sidiĝu sur vian seĝon kaj tuj legu kiel la aliaj!”

La vizaĝo de la knabeto tute ŝanĝiĝis. La plorado ĉesis kaj la tuta esprimo lumiĝis. Surprizite li suprenrigardis en la okulojn de sia nun respektata instruistino, brile ridetis, kaj afable respondis: “Certe, f-ino M. . . . mi legos.” Sed, ĝustatempe memorante ne tute cedi sian aŭtoritaton, li sprite aldonis: “. . . Tamen mi legos spasme!”

4. *Per duonoj*

Monatojn antaŭ la evento mem, aperis superabunde en gazetoj kaj ĵurnaloj bildoj de Princino Elizabeta kaj Princo Filipino kaj iliaj familianoj. Ĉiutage miaj lernejoj geinfanoj kunportis bildojn al la lernejo kaj montris ilin, dirante, kutime, kelkajn vortojn. Neniam antaŭe estis klaso mia tiel bone informita pri la reĝa familio.

Unu tagon granda dika flegma knabino, kun senesprima vizaĝo kaj senbrilaj okuloj, staris antaŭ la klaso. Ŝi havis tre grandan bildon el la mezo de gazeto, difektitan pro trofaldado kaj metalaj krampoj. Precize kiam ŝi volis montri ĝin, ĝiaj du duonoj disiĝis. Sekvis do, en monotona voĉo, la vortoj: “Jen la supra duono de Princo Filipo.”

Estis momento de admirado kaj amikaj ridetoj, ĉar la infanoj konsideris Filipon heroo kaj tre bonaspekta.

Sed la ridetoj cedis al rideo ĝis plorado, kiam la klaso subite ekvidis strion de jako kaj du longajn pantalonajn krurojn, kaj aŭdis la saman monotonan voĉon diri: “Kaj jen la malsupra duono.”

5. *Necesa scipovo*

Tre multe la gelnantoj de la tria klaso amis sian instruistino. Ili estis plejparte okjaraj, kaj en la klasĉambro f-ino D. anstataŭis la patrinon. Ŝi laŭdis ilin pro pureco, pro bonaspektaj kajeroj kaj pro bona laboro. Foje ŝi “frapetis la orelojn” pro malbonkonduco. Ŝi eĉ avertis ilin iri al la necesejo dum la paŭzoj. Ofte ili forgesse nomis ŝin Panjo aŭ eĉ Avinjo.

La lerneja jaro preskaŭ finiĝis. Unu tagon dum la lasta semajno, post la kutimaj studhoroj, iu frapis sur la pordon de la triagrada klasĉambro.

“Envenu,” vokis f-ino D.

Tri infanoj sinĝene envenis... kaj restis ĉe la pordo.

“Venu ĉi tien al mi,” afable diris f-ino D. “Nu, miaj karaj etuloj, kion vi deziras?”

“Ni... ĉiuj en la klaso...,” respondis la tri, ĉar antaŭe ili ekzercis kune por diri la ĝustajn vortojn, “. . . ŝatus, ke vi... dum la venonta jaro... denove...”

Paŭzo kaj hezito, post kiu nur unu kuraĝis atingi la veran celon.

“. . . ke vi, dum la venonta jaro, denove instruu nin. Sed ni scivolos... ĉu vi konsideras vin nun sufiĉe sperta por instrui la kvaran gradon?”

6. *Lia bonŝanca tago*

La lerneja paŭzsignalo ĵus sonis. El la triagrada klasĉambro elkuris hurlante amaseto da okjaruloj. Ŝajnis post nur momento kiam la blonda elfo, Greg, starigis sin rekte antaŭ sian instruistino kaj, kun radiant vizaĝo, konfidis al ŝi: “Kiom da bonŝanco oni povas havi! La unua ĉe la akvofonto kaj la unua ĉe la urinejo!”

7. *La fizika ekzameno*

Estis la kutimo en nia eduka sistemo ekzameni ĉiujn komencantojn, ne nur pri inteligento sed ankaŭ pri fizika stato. Ĉiun duan jaron poste tiuj samaj gelernantoj ricevis pluajn fizikajn ekzamenojn. Tiu tempo venis por la triagrada klaso, koridore aliflanke de mia propra, kaj ĉio estis en ekscito. Mia amata amikino kaj kolegino faris sian plejebilon por trankviligi la infanojn kaj pretigi ilin kiel eble plej multe.

Fine ŝi avertis ilin: “Vi scias, ke nia nova ĉi-jara flegistino venis antaŭ nur tri monatoj el Skotlando. Ŝi ne bone konas niajn landon kaj kutimojn, kaj ŝi verŝajne juĝos ĉiujn kanadajn geinfanojn laŭ via konduto. Do estu ĝentilaj kaj kuraĝaj, miaj karuletoj, kaj konduku kiel etaj gesinjoroj.”

Post la ekzameno la infanoj revenis al la klasĉambro en grupetoj bobelantaj pro ekscito. Komprenante ilian streĉon, f-ino D. permesis al ili libere babili pri la travivaĵo. Kelkaj ankoraŭ ŝajnis krieti pro la piko; kelkaj menciis la odoron de la ĉambro; du knabinoj subridis ĉar la kuracista barbo tiklis ilin kiam li ekzamenis la orelojn; ktp. Sed estis la nekutima komento pri la flegistino, kiu ĉefe interesis mian amikininon.

“Vere, f-ino D.,” diris Vilĉjo serioze, balancante la kapon, “tiu flegistino nia estas mirindaĵo! Vi diris ke ŝi venis al Kanado antaŭ nur tri monatoj, sed, malgraŭ sia stranga parolmaniero, ŝi ja scipovas paroli nian lingvon!”

8. *La alvenonto*

Kristnasko proksimiĝis. Pri la sankta naskiĝtago la triagrada klaso ĝoje aŭskultis fojon post fojo. La geinfanoj estis plejparte okjaraj kaj multaj havis en la hejmo bebojn, kiujn ili ege amis kaj terure dorlotis. La nehavantoj enviis la aliajn kaj deziris nenion pli multe ol novan fraton aŭ fratinnon kiel kristnaskan donacon.

Inter ĉi tiuj lastaj estis ĝemelinoj, du belaj viglaj knabinoj. Semajnon antaŭ Kristnasko unu el la du sciigis min ke la patrino baldaŭ havos bebon.

“Ho,” mi diris, “kia feliĉo por vi ĉiuj. Post kiom da tempo, ĉu vi scias?”

“Je Kristnasko!” venis la respondo.

“Ho, tio estos bonega kristnaskdonaco por la familio,” mi diris. “Donu al via panjo miajn plej sincerajn bondezirojn!”

Dum la plenokupaj tagoj ĵus antaŭ Kristnasko mi tute forgesis pri la aperonta bebo. Estis nur je la komenco de la novjara semestro, ke la du feliĉaj ridetantaj vizaĝoj de la ĝemelinoj memorigis min pri tio.

“Nu, karuletoj, kiel pri la bebo? Ĉu vi nun havas etan fraton, aŭ fratineton?”

“Hm...” hezitis la pli babilema, “estis jene... Dum la ferioj panjo gastigis tiom da homoj, ke ŝi ne havis tempon por bebo. Ŝi decidis do havigi ĝin anstataŭe en julio.”

Ĉar tiu familio baldaŭ poste transloĝiĝis al alia urbo, mi neniam eksciis, ĉu la bebo estis vere atendata, aŭ ĉu la tuta afero estis nur fikcio de okjaraj imagopovoj.

9. *Leciono pri ĝentileco*

Nova lernanto aperis iun matenon en la unuagrada klaso de f-ino G. Ŝi kaj la klasanoj tuj ŝatis lin kaj feliĉe bonvenigis lin en la rondon. Li estis normala sesjarulo, vigla, bonhumora kaj eĉ bonaspekta. Nur kiam temis pri ĝentileco mankis iom al li. Dum la aliaj ĝeinfanoj respondis al demandoj per “Jes, f-ino G.” aŭ “Ne, f-ino G.”, tiu aplombe respondis per “Na-a-a” aŭ la germantipa “Ja-a-a,” longe daŭrigataj kaj kun nenia peno uzi la nomon de la instruistino.

La sonefiko de tiu ĉiama ja-a-a, na-a-a tre malplaĉis al f-ino G. Cetere estis ŝia devo instrui, krom legado, skribado kaj aritmetiko, iom da ĝentileco al la knabeto. Do sekvis intensa instrukcio pri la uzo de nomo dum respondo. Ĉe ĉiu forgeso juna Georgo akceptis la admonon kun rideto kaj bonhumora ripeto, tamen lia posta respondo ofte restis ankoraŭ naŭze na-a-a, kaj la admona instruado devis rekomenciĝi. F-ino G. ĝojis, ke la knabo elmontris neniajn signojn de ofendiĝo pro la daŭra kontrolado.

Iun tagon Georgo devis iri al la necesejo. Li estis for dum tiom da tempo, ke f-ino G. komencis maltrankviliĝi. Je konvena paŭzo ŝi iris al la knaba necesejo por kontroli. Malferminte la eksteran pordon ŝi enrigardis. Ĉiu ĉelo havis pordeton kiu ne atingis la plankon, do estis facile rimarki en unu el ili svingiĝantan kruroparon. Estis egale facile aŭdi el tiu ĉelo monotonan sonon kiel ĉanton. Nu, almenaŭ la knabo ne malsanis. Malŝarĝite f-ino G. senmove staris kaj aŭskultis. Subite larĝa rideto aperis sur ŝia vizaĝo, sekvata de grimaco pro penego ne ridegi. De sub la pordeto venis la vortoj, en ŝia ĝusta voĉtono, kaj punkciataj per piedfrapoj: “Jes, f-ino G. Ne, f-ino G. Jes, f-ino G. Al infero, f-ino G.!”

Piedpinte ŝi eliris kaj atingis la stabĉambron ĵus antaŭ ol eksplodi pro ridego.

RAKONTOJ

10. *Infana kverelo*

La du knabinetoj dancis brak-en-brake laŭlonge de la strato al la lernejo. Ili ŝatis la lernejon, ŝatis sian instruistinon, ŝatis unu la alian, kaj estis tiel senzorgaj ke ili ne povis alie ol danci. La vivo estis tiel feliĉa afero, ĉu ne!

Dum la posttagmeza paŭzo la du knabinoj, kune kun aliaj, ludis “La Farmisto en la Val’”, la plej ŝatatan ludon. Kiam venis la vico de Elsa, ŝi ne elektis sian amikininon, Patrican. Tio estis grava eraro. Patrica tuj ekkoleris kaj frapis la vangon de Elsa. Tiu redonis ĝin duoble, kaj baldaŭ la ludado tute interrompiĝis, kaj la du estis pretaj por vera batalo.

Ili estis “savitaj de la sonorilo”, kiu vokis ĉiujn reen al la klasĉambroj. Je la tagfino Elsa eĉ ne rigardis Patrican, kaj la du junaj najbarinoj aparte hejmeniris.

Tiun vesperon ĉiu knabino rakontis kio okazis... la propran version, kompreneble. Nun la gepatroj ekkoleris. “Ŝi frapis vian vangon? Ŝin oni devus aliloke manfrapi! Ekde nun ignoru ŝin; ŝi ne valoras vian amikecon.”

Estis bela vespero en malfrua majo, kaj la du patroj laboris en la ĝardenoj. Ne eblis esti tiel proksime sen diri ion. Bedaŭrinde ili diris tro multe kaj koleriĝis tiom ke ili suprenŝovis la manikojn pretaj por batali. Denove sonorilo savis la situacion... grava longdistanca telefonvoko por unu. La batalo ne okazis.

La sekvan posttagmezon la patrino de Elsa iris al la oficejo de la lernejestrino, f-ino M., ĵus antaŭ la fino de la lerneja tago. Kolere ŝi rakontis la historieton laŭ la versio de la filino.

F-ino M. estis tre saĝa virino. Ŝi senvorte aŭskultis ĉion, ĝis la vizitantino perdis iom de sia kolero kaj fariĝis pli trankvila. Tiam, ridetante, ŝi fingromontris tra la fenestro. “Rigardu,” ŝi diris milde.

Tie, dancante brak-en-brake tien kaj reen sur la strato iris du knabinetoj. Ili estis Elsa kaj Patrica.

La vizitanta sinjorino ruĝiĝis, iom honte ridetis, kaj senvorte eliris.

Tiom por infanaj kvereloj!

11. *Bedaŭrinda manko*

Mi iam instruis en lernejo proksima al la urbolimo. Estis dum la milito, kiam multaj familioj transloĝiĝis el la urbo mem por eviti altajn domimpostojn. Pluraj domoj en tiu periferia distrikto estis nur kabanaj sen internaj necesejoj, kaj kelkaj sen fluanta akvo. El unu el tiuj domaĉoj venis al mia klaso la aminda, tamen tre malpura Gregoro.



Gregoro estis sprita, nigrokula elfo. Ofte mi scivolis kiel li efektive aspektas sub la koto, kiu ŝajnis esti parto de lia haŭto. Mi suspektis, ke sube loĝas itala anĝelo.

Kelkfoje mi admonis lin pri pureco. “Viaj vestaĵoj estas puraj, Gregoro, kaj via korpo ne odoras, do via patrino ne neglektas sian devon. La kulpo do estas tute via. Rigardu tiujn manojn! Kaj kiaj kubutoj! Vere vi estas sufiĉe aĝa por pli bone purigi vin.”

Kelkajn tagojn poste, evidentiĝis ke Gregoro faris veran penon purigi sin... ne tro sukcese, mi devas aldoni. Sed iom post iom li malsuprenplitis ĝis sia antaŭa malalta nivelo de pureco.

Okazis iun tagon, ke la lerneja flegistino eniris la klasĉambron ĝuste kiam mi denove rimarkis la malpurecon de mia “anĝelo”. Kiam ŝi kviete demandis, ĉu mi havas hodiaŭ ion raportindan, mi estis ĉi-foje pretpreta.

“Jes, mi certe havas. Mi havas knabon, kiu estas tiel malpura ke oni povus terpomojn kreskigi sub liaj ungoj. Ĉu vi bonvolus admoni lin, mi petas?”

Tuj la afabla sinjorino rapide ekzamenis la manojn de la tuta klaso. Kiam la infanoj rekomencis labori, ŝi preskaŭ nerimarkite kondukis Gregoron al mia pupitro. Sidiĝante kaj tirante al si la knabon, ŝi mallaŭte demandis: “Ĉu vi havas sapon en via domo?”

“Jes, sinjorino.”

“Kaj ĉu vi havas lavtolaĵon kaj bantukon?”

“Jes.”

“Ĉu troviĝas en la domo fluanta varma akvo?”

“Ne varma akvo, sinjorino, nur malvarma.”

“Nu, vi eble havas akvoboligilon kaj povas varmigi iom da akvo, ĉu ne?”

“Jes, sinjorino.”

“Nu, mi volas ke vi, ja ĉi tiun vesperon, petu permeson varmigi akvon, kaj ke vi lavu kaj frotegu manojn, brakojn kaj kubutojn, ĝis ili brilos ruĝaj pro pureco. Ĉu komprenite?”

“Jes, sinjorino,” respondis mia “anĝelo” larĝe ridetante.

“Bone. Mi ripetos... kaj ne forgesu... uzu varmegan akvon, sapon, kaj (emfazante ĉiun vorton) iom – da – kubuta – graso!” (Anglalingve, “kubuta graso” signifas diligentan laboron.)

“Ha, sinjorino,” malĝoje venis la respondo, “mi estas preskaŭ certa, ke ni ne posedas kubutan grason.”

Venis subita sono de eksplodridego el la koridoro, kiun la flegistino atingis tute ĝustatempe.

12. *La netaŭgulo*

S-ino F. havas ĉarman personecon. En grupo de homoj ŝia kvieta voĉo estas tiel alloga, ke ĉiuj aliaj silentas kaj aŭskultas ŝiajn vortojn. Kaj ŝiaj vortoj ĉiam valoras tian aŭskultadon.

Tiu kvalito de voĉo kaj ŝia trankvila mieno bonege servis ŝin dum la jaroj kiam ŝi estis instruistino en mezlernejoj. Necesis nur du-tri tagoj post komenco de la lerneja jaro por ke la lernantoj atentu kaj respektu ŝin. Kaj post pliaj du-tri la plimulto ege ŝatis, eĉ amis ŝin.

Do estis des pli surprize kiam iun jaron unu knabo, preskaŭ junulo, ŝajnis esti tuta netaŭgulo. Kiel ajn ŝi traktis lin, li ne konformiĝis. Dum lecionoj li frapis la pupitron per krajono aŭ mallaŭte fajfis inter la dentoj, aŭ eĉ interrompis la lecionojn por fari netaŭgajn demandojn. Estis por s-ino F. tre nekutime kaj tre ĉagrene. Ŝi penis alvoki lian pli bonan memon, sed ŝajne li ne posedis tian. Kion fari? Ŝi preskaŭ malesperis.

Iun tagon, meze de leciono, iu frapis. Tie ĉe la pordo staris la ĉefestro de la tuta lerneja sistemo. Li amike salutis s-inon F. kaj petis ke ŝi iru en la vestiblon por paroli.

Ŝi faris unu paŝon kaj aŭdis tujan moveton kaj brueton malantaŭ ŝi. El la okula angulo ŝi ekvidis Roberton jam starantan ĉe ŝia kutima loko. "Ho, nun kion faros tiu knabo?" estis ŝia unua penso. Ŝi atendis la plej malbonan kaj iom hezite antaŭeniris.

Sed surprizo. La voĉo de Roberto atingis ŝin ĵus antaŭ ol ŝi fermis la pordon. "Ho, vi geuloj," ĝi aŭtoritate kriis. "Kion vi volas ke s-ino F pensu pri vi? Vi scias, kion vi devus studi... do, studu!" Kaj ili ja faris.

Larĝa rideto montris sin sur la instruistina vizaĝo. Malgraŭ ĉio Roberto havas pli bonan memon. Ĉio bone iros.

UNUFOJE EN VIVODAŬRO

(vera rakonto)

Dum mia vivo mi ĉeestis multajn operojn, sed neniam iun tiel ridige komikan kiel tiun viditan antaŭ kelkaj jaroj en Irlando. Ke ĝi estis tiel komika estis tute hazarde, ĉar tiu opero vere estas tragedio pri vestala virgulino, kiu, pro amo, forgesas sian respondecon gardi la sanktan flamon.

Wexford [ŭeksford], kie ĝi okazis, estas nur malgranda marborda urbeto en sudorienta Irlando. Ĉar ĝi estas malgranda, ĝi havas nek gastejon por gastigi multajn vizitantojn, nek monon por pagi mondfamajn kantistojn. Anstataŭe, do, ĝi utiligas junajn gekantistojn kiuj jam pruvis sian talenton. Kaj ĝi prezentas operojn kiujn la ĉeestantaro ne bone konas aŭ eble neniam antaŭe vidis. Ĝia semajnlonga festivalo okazas ĉiun aŭtunon en oktobro.

En 1979 mi havis la bonŝancon esti en Irlando je la ĝusta tempo, kaj sukcesis aĉeti sidlokon por la lastvespera prezentado. Ĝi estis La vestalo, de la komponisto Spontini.

La scenejo por la unua akto devis ŝajnigi la internon de la templo. Iel la desegnisto sukcesis krei plankon kiu aspektis kiel polurita marmoro. Por doni efekton de pli granda amplekso kaj ebligi al la ĉeestantaro pli bonan vidon de la scenejo, li faris la malantaŭan plankon je triona metro pli alta ol tiu apud la planklumoj. Do la tuto havis iom da deklivo. Li sciis ke la planko estos tro glita, sed trovis tre simplan solvon por tio. Li simple ordonis ke la kulis-ŝovistoj verŝu sur ĝin kelkajn botelojn da glueca populara trinkaĵo... kaj ĉio funkciis perfekte!

Tamen oni ne kalkulis je la teatra ĉefpurigistino. Tiun posttagmezon ŝi rimarkis la aĉan staton de la scenejo kaj, kun profesia fiero, purigis kaj poluris ĝin ĝis brilo. (Kompreneble, estis nur poste, kaj per onidiro, ke mi eksciis ĉi tiujn faktojn.)

Nu, venis la vespero. La kurteno leviĝis. Tie flanke, kaj apud la rando de la scenejo, staris la heroo, evidente en malfeliĉa humoro. Li faris unu paŝon... kaj trovis sin kuŝanta plata sur la dorso. Kun malfacilo li regajnis pli-malpli vertikalan pozicion, dume kantante sen mankigi unu solan noton. Poste li faris sian vojon for de la planklumoj, ŝajne esperante ke la atendita amiko divenos ke io estas malĝusta kaj envenos ĉe taŭga loko por renkonti lin. Jes, li ja divenis kaj faris. Sed kiel! La viroj devis saluti unu la alian per ĉirkaŭpremo, sed la amiko glitegis al li kun draŝantaj brakoj kaj aŭdebla obtuza bato. Je ĉi tiu punkto la ĉeestantaro ne plu eĉ penis kaŝi sian subridadon, sed hurlis pro ridego.

Tenegante unu la alian, la du iris kiel montgrimantoj en la direkto de la sola firma konstruaĵo sur la scenejo... malgranda altaro, sur kiu brulis la sankta flamo. Kompreneble ilia kantado seninterrompe, sed iom senspire daŭris, ĉar la muziko ne haltis.

Fine ili atingis sian celon. Dume, tamen, la ĥoro envenis. Havante la saman malfacilon kiel la unuaj du, ili glitis per propra liberstila koreografio, tenante la altaron se eble, aŭ tenegante ion ajn, kio havis fingrotenon sur si. Kiam ĉiuj finfine ie trovis lokon, la tuta efiko estis kiel granda ventmuelilo kantanta freneze! Estis tiel ridige, ke ĉiuj kvarcent ĉeestantoj ridegis kaj ploregis senhelpe, histerie.

La unua akto finiĝis kun tia aklamo, kian mi neniam antaŭe aŭdis ĉe iu ajn prezentado de ia ajn speco. Ĉiuj bezonis la tutan interakton por regajni eĉ ŝajnon de sia normala stato.

Dume, kompreneble, oni verŝis grandan kvanton de la necesa likvaĵo sur la scenejon, kaj ankaŭ ĝi regajnis sian "normalan" staton. La resto de la opero ne povis ne esti malklimakso. Sed tio ne gravis. Tiu netaksebla unua duonhoro sendube restos en ĉies memoro kiel speciala donaco de la dioj... aŭ de la leprehaŭnoj, tiuj etaj irlandaj koboldoj. Dankon, kiuj ajn!

MISTERA MALAPERRO

(mondfama rakonto)

Okazis en Parizo en 1889, la jaro de la grandioza Monda Ekspozicio. La konstruado de la Eĵfel-Turo estis ĵus finita, kaj svarmis en la urbo homamasoj el ĉiuj partoj de la mondo por vidi tiun mirindaĵon kaj la aliajn allogaĵojn.

Meze de tiu ĥaoso junulino kaj malsaniĝanta patrino atingis la urbon post longa kaj malfeliĉa vojaĝo el Hindio. La patro, angla oficiro, antaŭ nelonge estis mortinta, kaj la du virinoj intencis hejmenvojaĝi al Anglio. Tamen, sciante ke ŝi iam havos en Parizo gravajn dokumentojn subskribendajn rilate la heredaĵon de sia edzo, la vidvino lastmomente decidis iri rekte al tiu urbo. Do la du surteriĝis el la velŝipo en Marsejlo kaj poste veturis per trajno al Parizo.

Mirakle, telegramo el Marsejlo havigis por ili ĉambron en granda hotelo; pro profesiaj kialoj alia gasto devis subite lasi ĝin. Nek patrino nek filino konis la francan lingvon, sed la hotelmastro tre afable bonvenigis ilin per gestoj kaj aranĝis ĉion. Ĉar la patrino nun estis tro malsana eĉ por stari, la filino devis iel ajn fari la registradon por ambaŭ. Post tio juna servisto kondukis ilin al granda luksa ĉambro, kie la kompatinda patrino povis finfine enlitiĝi.

La filino (ni nomu ŝin Helena) tuj petis helpon de la domkuracisto. Li nur hezite parolis la anglan, sed sufiĉe por fari kelkajn demandojn kaj ekzamenon. Ŝajne li rekonis la malsanon laŭ la simptomoj. Rapide li komencis skribi leteron, dume penante klarigi al la junulino ke li bezonos specialan medikamenton el sia hejmo ĉe la kontraŭa flanko de la urbo. Li ne havas telefonon, li diris, kaj, se la knabino portos la leteron al lia edzino, tio ŝparos multan tempon. Dume li prizorgos la malsanulinon.

La kuracisto parolis kun la hotelmastro kaj ambaŭ ŝajnis esti tre ekscititaj. Poste la mastro ĝentile helpis Helenan en fiakron kaj donis detalajn ordonojn al la veturigisto. Fine la veturilo malrapide komencis moviĝi. Ŝajnis al la jam affliktita junulino ke la veturigisto serpentumigas sian fiakron en kaj ekster la stratojn, eĉ kelkfoje irante en tute kontraŭa direkto ol tiu atendita. La homamasoj plenplenigis ne nur la trotuarojn, sed ankaŭ la stratojn, kaj bloke malrapidigis ilin.

Post tre longa tempo la veturilo haltis antaŭ malnova, tri-etaĝa domo, kie la laca junulino dankeme tiris la sonorilon. Ŝi aŭdis ĝian sonon kvazaŭ de tre malproksime. Nur post longa tempo maljuna virino malfermis la pordon.

Dufoje, kaj grimacante, ŝi tralegis la leteron antaŭ ol konduki Helenan al ĉambro soleca kaj preskaŭ malplena. Tie malpacience devis resti la kompatinda junulino.

La minutoj pasis, pasadis. Subite tra la solida, ligna pordo klare penetris la sono de telefono. Estis je tiu momento, kiam subita sento de ekstrema paniko trafis la junulinon. Kio okazis? Kion oni faras al ŝi? Kiel fartas la patrino, sola en fremda hotelĉambro? Ĉu ŝi devus tuj forkuri kaj ne malŝpari pluan tempon? Sed kien? Ŝi ne konas la vojon reen al la hotelo kaj ne povas pridemandi ĝin. Krome ŝi jam atendis tiom da tempo; ĉu ŝi ne atendu iomete plue? Poste ŝi havis kialon ege bedaŭri sian heziton kaj la neutilan malŝparon de valoraj minutoj.

Fine la virino revenis kaj donis al ŝi paketon, scivole rigardante la knabinon kiam tiu eliris el la domo. Nun okazis denove daŭra vagado tra la troplenaj stratoj. Kiam la fiakro alproksimiĝis la urbocentron, ĝi ŝajnis intence esti malĝuste direktata, kaj la frenezigita junulino finfine ĵetis sin el la veturilo kaj kuris en densan homamason. Nun kion fari? Subite ŝi ekvidis botojn kaj aliajn vestaĵojn, kiuj povis signifi nur samlandanon; neniu franco portus tiajn. Sen plua penso ŝi tuj tenegis lian brakon kaj preskaŭ histerie elverŝis sian rakonton. Kompreneble juna anglo devas helpi junulinon en aflikto, do li tuj perkubute faris vojon antaŭen, kaj ili fine atingis la ĝustan hotelon... kvin horojn post ŝia foriro el ĝi.

Sed kio okazis? Tiu sama komizo, kiu tiun matenon tiel multe helpis ŝin dum registrado, nun rigardas ŝin kvazaŭ ŝi estus tuta fremdulino, eĉ kvankam ŝi rekonas la nekutiman ringon sur lia fingro. Kaj la hotelmastro, kiu tiel ĝentile helpis ŝin en la fiakron, rigardas tute tra ŝin. La angla viro postulis vidi la registrolibron, sed tiu paĝo sur kiun ŝi, antaŭ kvin horoj, tiel hezite skribis, ne plu estas tie. Ŝi diris la numeron de la ĉambro en kiu estas la patrino. Ho ne, tiun ĉambron geedza paro havas dum almenaŭ du semajnoj. Sed, ĉar ŝi estas juna kaj sola en granda urbo dum ekspozicio, la mastro opinias ke li povas trovi ĉambreton por ŝi ie ajn... ĝis kiam ŝi memoros la ĝustan nomon de la hotelo, kie devas esti la patrino kaj pakaĵoj.

Dum manĝo ĉe proksima restoracio Helena rakontis pluajn detalojn al la juna viro. Ŝi priskribis la ĉambron 215, ĝitajn pezajn, malhelruĝajn kurtenojn ĉe la du fenestroj, la rozfloran murpaperon, la malhelan tapiŝon kaj altdorsajn seĝojn, kaj la balkonon superrigardantan la Champs Elysées (larĝan bulvardon). Kaj ŝi menciis la ringon de la komizo kaj la etan, preskaŭ nerimarkeblan, verukon sur la nazo de la kuracisto.

Kune ili revenis al la hotelo kaj la juna brito lasis Helenan ĉe ŝia pordo, promesante frumatene reveni. Ju pli li pripensis la tutan aferon, des pli li suspektis ian komploton kontraŭ la anglino. Sed kial? Ĝi estas neriĉa, nekonata, neimpona fremdulino, kiu nur hazarde trovas sin en Parizo. Kio povas esti la subkuŝanta kialo por tia komploto?

Kiam venis la mateno li, Roberto, kaj Helena kontaktis la kuraciston. Tie li staris, la eta veruko videbla sur la nazo, deklarante ke li ne konas ĉi tiun knabinon, ke li neniam antaŭe vidis ŝin. Ili rakontis la historion al policisto el la strato, sed tiu, pro la reagoj de la hotelaj servistoj, nur levis la ŝultrojn kaj foriris. La posta celo de la du junaj homoj estis la ĉefpolicejo, kie ili donis ĉiujn detalojn... kun la samaj rezultoj. Tie oni definitive donis al ili la impreson, ke la junulino sendube suferas pro perdo de la memoro. Finfine ili iris al la brita ambasado. Tie oni diris ke jes, oni jam sciigis ilin pri la kazo. Ili jam konas la faktojn, sed povas nenion fari krom sugestii ke la juna virino restu tie kie ŝi estas, dum ili daŭrigos la serĉon de la patrino.

Nenio! Ĉiu vojo kondukis al senelirejo; ili sentis sin kvazaŭ en labirinto. Fine Roberto, kiu, parenteze, havis helpeman amikon en la ambasado, insistis ke oni permesu ilin enrigardi la ĉambron 215. Nova skuo... la ĉambro malsimilis tiun priskribitan de la junulino en ĉiu detalo!

Anstataŭ nun pridubi la tutan rakonton, Roberto eĉ pli kredis ĝin. Li indignis kaj furioziĝis. Ju pli li scivolis pri tia precize elpensita komploto, des pli li miris ke oni tiom laboros por ŝanĝi ĉion kaj kaŝi la veron. Devas esti io ege grava. Nelonge poste li ekvidis farbiston kun portebla ŝtuparo. Li sekvis lin kaj, per granda subaĉeto, persvadis lin skribe deklari ke li laboradis dum la tuta nokto kun farbo kaj peniko, kune kun aliaj uloj, kiuj pendigis kurtenojn kaj ŝanĝis la tapiŝon kaj meblaron.

Kun ĉi tiu pruvo enmane la juna brito devigis sian ambasadon konfesi la veron. Ĝi estis kortuŝa rakonto. Laŭ la kuracisto la kompatinda angla virino evidente havis ĉiujn simptomojn de la timegiga nigra pesto. Intence li sendis la junulinon tra la urbo por gajni tempon pritrakti la situacion. Dum ŝi estis for, la patrino mortis. Oni sekrete forigis la korpon, kaj la policistoj tute malpermesis iun ajn mencion de la morto. Ili timis neregeblan panikon de la loĝantaro kaj tujan foriron de ĉiuj vizitantoj... kun grandegaj financaj perdoj al miloj da urbaj entreprenistoj.

La detaloj de ĉi tiu historio ankoraŭ kuŝas en la arkivoj ĉe la pariza ĉefpolicejo. Tamen tiuj diras nenion pri la posta sorto de la juna orfino, sola en granda urbo. Ni povas nur esperi ke la juna brito, kiu amikiĝis kun

ŝi dum ŝia freneziga travivaĵo, daŭrigis sian helpon almenaŭ ĝis ŝia alveno en la hejmlando kaj ŝia trovo de geamikoj. Povus esti ke ili eĉ enamiĝis kaj geedziĝis. Kiel ajn, post tuta jarcento ili sendube ne plu vivas.

ŜI ENIROS LA ĈIELON BELA

(vera rakonto)

Ĉiuj scias pri doktoro Norman Bethune, la kanada kuracisto kiu faris tiel multe da mirakloj en Ĉinio dum la japana invado. Sed eble malmultaj konas la nomon de la farinto de tre nekutima miraklo, la usona kirurgo d-ro Franciskus. Studento lia, Rikardo Selzer, rakontas tiun miraklon en sia libro *Leteroj al juna kuracisto*. Jen adaptaĵo de tiu rakonto.

D-ro Franciskus ne estis populara viro. Li estis profesoro de plastika kirurgio en usona universitata malsanulejo, viro detalema je vesto kaj perfektema je laboro. Certe li estis tre kapabla kirurgo sed, ĉar li malmulte kaj iom lakone parolis kaj malofte ridetis, liaj kolegoj kaj studentoj konsideris lin aroganta. Li havis do malmultajn geamikojn.

Unu tagon en la koridoro iu tuŝis la studenton, Rikardo Selzer, ĉe la ŝultro. “Ĉu vi parolas la hispanan?” abrupta voĉo demandis. Antaŭ ol Rikardo povis respondi la parolinto aldonis: “Mi iros por trisemajna restado al Honduraso kaj bezonos interpretiston.”

“Jes, mi loĝis du jarojn en Hispanio,” respondis la studento.

“Nu, mi kaj membroj de mia teamo iras ĉiun someron ien por fari operaciojn inter la indiĝenoj. Ni iros post semajno. Ĉu tio interesas vin?”

Tiel okazis, ke ok tagojn poste Rikardo Selzer troviĝis en urbeto en la monta regiono de centra Honduraso. Tie en odora, kaduka malsanulejo la medicina teamo laboris dum tri varmegaj semajnoj strebante plibonigi la sanstaton de miloj da suferantaj homoj. Ĉiun tagon grandega homamaso plenplenigis la korton antaŭ la malsanulejo. Multaj havis monstrajn kreskaĵojn sur brakoj, gamboj aŭ vizaĝoj. Multaj havis rompitaĵojn ostojn. La pliparto frotis ruĝajn, infektitajn okulojn. Preskaŭ ĉiuj, plenkreskuloj kaj infanoj, elmontris gapantajn ulcerojn. Ili estis venintaj el foraj arbaraj kaj montaj regionoj. Nur Dio sciis kiamaniere ili atingis la malsanulejon.

La tasko de Rikardo estis fotografi ĉiun pacienton antaŭ kaj post la operacio kaj fari interpretojn por d-ro Franciskus. Ĉiun tagon tiu ekzamenis tiujn pacientojn kies operacio okazos la postan tagon. Ĉiun li traktis pli kiel objekton ol kiel homon. Kiam iu hazarde tuŝis lin, li nevolonte kuntiriĝis. Li ŝajne ne sciis kiel montri afablecon, tamen li sukcesis iel rekuraĝigi ĉiun.

Estis dum la tria semajno ke Rikardo rimarkis la figuron de maldika knabino, kiu konstante premadis malpuran tukon kontraŭ la buŝon kvazaŭ ŝi volus vomi. Ŝi estis la lasta el la tiutagaj pacientoj kaj estis atendinta tie

dum horoj por la ekzameno. Laŭ ŝia karto ŝi nomiĝis Ismelda, estis dekkvarjara kaj havis fenditajn lipojn kaj palaton. Ŝia ĝenerala sanstato estis normala. Kiam venis ŝia vico ŝi lasis la patrino kaj alproksimiĝis al la doktoro.

“Forigu la tukon,” diris li.

La knabino kuntiriĝis reen kaj la patrino devis admoni ŝin pro ŝia konduto. Denove ŝi faris paŝon antaŭen kaj denove hezitis.

“Ĉi tiu estas stulta,” kriis la kirurgo malpacience. “Sciigu ŝin ke aŭ ŝi forigos la tukon, aŭ ŝi devos foriri.”

Rikardo parolis al ŝi kiel eble plej milde, sed ŝi ne obeis, ne povis obei. Franciskus etendis la manon kaj kun ekskuo mem forigis la malpuran tukon. Ja terura estis la malperfektaĵo nun vidata, kvazaŭ ruĝa insekto rampis sur la vizaĝo. Malgraŭ jaroj da medicina sperto eĉ Franciskus ne povis kaŝi iom da ŝoko. Sed kun kuntiro de la brovoj li regis sin. Li ekzamenis la aĉaĵon ekstere kaj interne, ordonis ke Rikardo faru diversajn fotografaĵojn, kaj diris nur: “Morgaŭ mi riparos vian lipon.”

La postan matenon ĉio estis preta por la operacio. Frotlavado estis finita, anestezo estis jam donita, kaj la kirurgo postulis la skalpelon. “Ĉu ĉio en ordo?” li fine demandis la anesteziston.

“Ne! Atendu!” La voĉo estis akra.

“Kio estas?”

“Mi ne certas. La sangopremo estas multe tro alta, kaj la temperaturo estas... kvardek du? Mi ne kredas tion!” Tiam: “Glacion,” li ordonis. “Multan glacion!” Pluraj rapidegis por plenumi la postulon, sed tro malfrue... nekredeble la knabino estis jam morta, kaj neniom da klopodo povis revivigi ŝin.

Kiel sciigi la atendantan patrino sidantan ekstere kaj premantan la malpuran tukon kontraŭ la propran vizaĝon? “Mi faros la paroladon,” fine diris la kompatinda kirurgo. Tiom por si mem kiom por la patrino, per iaj hispanaj vortoj, li devis klarigi la tragedion al ŝi.

“Neniu povus antaŭvidi kio okazis,” li diris. “Ŝi havis malbonan reagon al la medikamento por dormado... Ĝi venenis ŝin... Ŝi ne vekigiĝis.” Tiuj lastaj vortoj estis apenaŭ flustro.

“Morta,” la virino anoncis al si.

“Jes, morta.” Li fermis la okulojn. Nur kiam li sentis malpezan tuŝon sur la brako li malfermis ilin kaj vidis la aflikton sur la virina vizaĝo. Silente ili rigardis unu la alian dum longa tempo. Tiam ŝi parolis, malrapide, por certigi sin ke li komprenas.

RAKONTOJ

“Mi hejmeniros. Miaj filoj venos kaj forportos mian filinon... Ne estu malfeliĉa, sinjoro doktoro. Dio decidis. Tiel multe mi ĝojas, ke vi riparos la difekton. Nun ŝi eniros la ĉielon bela.” D-ro Franciskus ne respondis.

La postan matenon Rikardo Selzer staris en la korto kiam du junaj viroj en striaj, lanaj vestoj levis la knabinan korpon, volvitan en pajlomato, sur lignan ĉaron. Al la patrino staranta tie li donis monon. “Por floroj,” li murmuris.

La virino dankis lin kaj aldonis: “La doktoro ja estas unu el la anĝeloj. Li finis la laboron de Dio. Mia filino estas bela.”

Kion ŝi volis diri? Ŝia filino mortis antaŭ ol la operacio komenciĝis. Li etendis la manon kaj levis angulon de la mato. Kie antaŭe sur la vizaĝo estis monstraĉo nun troviĝis neta vico de etaj kudroj, kaj la supra lipo kaj nazo estis nun delikatformaj. La knabino ja estis bela. Senvorte kaj pensoplana Rikardo mallevis la maton, kaj la ĉaro forknaris.

FORTURNITA EMBARASO

(adaptita de bone konata rakonto)

Pli ol jarcento pasis ekde la okazaĵo mem, do nun unu el la skandaloj de mia familio povas esti malkaŝita. Estas tre dube ĉu, antaŭ tiom da tempo, la tri koncernaj fratinoj povis antaŭvidi mondon en kiu ilia historio povos esti krude rakontata en publika presaĵo. Je tiu tempo oni povis nur subdiri ĝin en virinaj salonoj; tie oni flustris ĝin sufiĉe ofte, ke ĝi atingis la orelojn de mia avino. Ŝi sciigis min.

Maria, Margareta kaj Miriama Kingsli estis fraŭlinoj de “certa” aĝo. Ili vivis iom apartan vivon, regule ĉeestis la diservon, vizitis tiajn malsanulojn kie estis akceptate ke fraŭlinoj vizitu, legis la plej senkolorajn romanojn, kaj kelkfoje gastigis aliajn virinojn per teo. Kaj unufoje ĉiun semajnon ili gastigis viron... kuraciston.

Maljuna doktoro Harmon estis vidvo kaj entuziasma ŝatanto de la kartludo visto. Dum jaroj la virinoj avido atendis la ĉiusemajnan vesperon de ludado... la riton de starigo de la verdkovrita tablo, la du horojn de silenta ludado, kaj la finajn kelkajn minutojn de konversacio, dum kiuj d-ro Harmon trinkis glason da madejra vino antaŭ ol diri bonan nokton al ili.

Dum dek tri jaroj ili estis ludintaj sian ĉiusemajnan ludon; tiam la terura afero okazis. Ĉis hodiaŭ ni ne scias al kiu ĝi okazis... al Maria, al Margareta, aŭ al Miriama.

Ĉiu estis irinta al sia ĉambro kaj progresinta preskaŭ ĝis la fina stadio de enlitiĝo. Ili ne estis sekaj maljunaj fraŭlinoj, tute ne. Male. Ili estis virinoj de solideco havantaj dikajn konturojn. Estis ŝia trogranda pezo kiu kaŭzis la malfeliĉan sorton de unu el ili... ĉu Maria, Margareta, aŭ Miriama.

Subite tiun nokton, tra la kvieta domo sonis la frakaso de porcelano kaj krio de doloro. Du el la fratinoj rapidis al la litĉambro de la tria... ŝia identeco estas ankoraŭ enigmo... kaj trovis ŝin abunde sangantan pro severaj vundoj ĉe la malsupra parto de la dorso. Zigzagaj porcelanaj fragmentoj estis farintaj severajn vundojn, bedaŭrinde precize en tiuj lokoj kie la suferanta fratino mem ne povis prizorgi ilin. Pro instigoj de la aliaj du, ŝi baraktis kontraŭ sia natura pudoro sufiĉe por permesi ke ili penu trakti la situacion. Tamen la sango de la Kingslioj fluegis en terura kvanto el la korpo kuŝanta vizaĝmalsupre sur la lito.

“Ni devas venigi la kuraciston,” diris unu el la flegantaj fraŭlinoj. Tio estis ja ŝoka penso.

“Ho, sed ni ne povas!” diris la dua fratino. “Pensu pri la malhonoro! Povus esti ke ni devus klarigi al li kiel ĝi okazis!”

“Sed ŝi sangas ĝis la morto,” protestis la unua fratino.

“Prefere mi mortus!” kriis la vunditino. Tiam nova konsterna penso ektrafis ŝin. “Ho ve! Neniam povus mi denove fronti lin... kaj kio okazus al nia vistludo?”

Tiu estis nova aspekto de la kazo kaj sufiĉis por doni al ili paŭzon. Sed ili ne estis facile timigitaj.

Ni ne scias kiu el ili elpensis rimedon liberiĝi el la malfacilo... kaj verŝajne neniam scios. Ni ja scias ke estis Maria, kiel la plej aĝa, kiu ordonis ke la servistino Greta iru por venigi d-ron Harmon. Sed tio ne signifas, ke ne estis Maria mem kiu havis la akcidenton.


Greta kondukis d-ron Harmon al la litĉambro de f-ino Maria, sed tio kompreneble ne estas indiko, ke estis Maria kiu kuŝis tie. La kuracisto mem ne povis diveni kiu kuŝas tie; ĉio kion li vidis estis kuŝanta formo kovrita per littuko. En la centro de la tuko cirkla truo, futon en diametro, estis eltranĉita, nudigante la sidlokon de la vundo.

D-ro Harmon bezonis neniujn klarigojn. Li suturis la plej profundajn vundojn kaj prizorgis la minorajn. Finfine li rektigis sin. “Mi devos forigi tiujn suturojn,” li anoncis al la silenta figuro, kiu senmurmure estis tolerinta la operacion. “Mi venos la postan merkredon.”

Ĝis merkredo la tri fratinoj restis en la propraj ĉambroj. Tiun tagon Greta la duan fojon kondukis d-ron Harmon al la sama litĉambro. Tie troviĝis la kuŝanta figuro, tie estis la littuko kun sia truo. D-ro Harmon elprenis la suturojn. “La vundoj bone resaniĝis,” li diris. “Mi opinias ke ne necesos plua prizorgo fare de mi.”

La virino sub la littuko diris nenion. D-ro Harmon donis mallongan konsilon kaj foriris. Kelkajn tagojn poste li ĝojis ricevi letereton en la manskribo de f-ino Maria. “Kara Doktoro Harmon, ni ĉiuj ĝojegos se vi venos ĉi tiun semajnon, kiel kutime, por vistludi.”

Kiam d-ro Harmon alvenis, li trovis etan, tamen subtilan ŝanĝon en la aspekto de la salono. La rigidaj altdorsaj seĝoj, sur kiuj la tri fratinoj sidis, surhavis molajn komfortajn kusenojn. Estis neeble scii, kiu el la fratinoj vere bezonas la sian!



LA VIVO ESTAS TIA

1. *Ne forgesu*

Iun varmegan someran vesperon, maljuna paro sidis sur la doma verando. Iliaj du lulseĝoj staris apud malgranda, cirkla tablo. Tie ili sidis kaj balanciĝis, neparolante. Post tiel multe da jaroj kune konversacio vere ne necesis.

De tempo al tempo la viro eltiris sian poŝtukon kaj forviŝis la ŝviton de sia brovo. La edzino rimarkis lian malkomforton kaj fine diris: “Fragoj kun glaciaĵo estus bonvenaj, kara, ĉu ne?”

“Mmm,” respondis la viro, sed faris nenion.

Post paŭzo la virino iom riproĉe diris: “Nu, faru ion pri ĝi. La fragoj ne venos per si mem.”

Malrapide la edzo levis sin el la lulseĝo, prenis kadukan pajloĉapelon de sur hoko kaj ambliis for. “Ne forgesu, fragojn kaj glaciaĵon,” kriis post li la edzino. “Vi estas tiel forgesema.”

La minutoj pasis, la aero estis varmega, kaj la maljunulino endormiĝis. La paŝoj de ŝia edzo grimpanta la malaltan ŝtuparon vekis ŝin. “Jen,” grumblis li, varmega kaj malbonhumora, ĵetante sakon sur la tablon. “Jen via lardo!”

“Nur lardo?” demandis la edzino. “Sed kio pri la ovoĵ kiujn mi deziris?”

2. *Triki aŭ ne triki*

Je la komenca tago de la universitata kurso juna virino, sidanta en la unua vico, demandis la profesoron: “Sinjoro, ĉu vi permesus ke mi triku dum viaj prelegoj? Ŝajne mi povas tiamaniere pli bone koncentri mian atenton.”

La profesoro vere severe rigardis ŝin. “Juna sinjorino,” li fine diris, “antaŭ multaj jaroj alia studentino faris la saman peton, kaj mi konsentis. Poste ŝi demandis la grandon de miaj ŝuoj. Pro tio mi nun havas multajn parojn da ŝtrumpetoj, edzinon, tri infanojn, du hundojn, kanarion kaj multajn grizajn harojn. Ne, mi petas, ne triku!”

3. *Okazaĵo en konfesejo*

Pastro Braŭn eniris la preĝejon frue tiun matenon. Li volis fari konfeson al si mem, nombrante siajn pekojn, konsiderante iliajn gravecojn, kaj starigante taŭgan pentofaradon por ĉiu.

Kviete li malfermis la pordon de konfesejo, kaj tuj konstatis ke li ne estas tie sola. Forta odoraĉo de drinkaĵo trafis liajn naztruojn kaj laŭta sono de ronkado atingis liajn orelojn. Iu certe dormis tie kaj verŝajne estis pasiginta

la tutan nokton tie. Nu, liajn planojn li devas forgesi kaj, kiel eble plej diplomate, pritrakti ĉi tiun novan situacion.

Kiam li glitigis la metalan barilon inter la du duonoj de la konfesejo la drinkulo evidente vekigis pro la sono. “Ho, veturigisto, ĉu ni atingis Espero-straton?” laŭte demandis dika voĉo, kaj la odoraĉo estis eĉ pli forta.

Pensante rapide la juna pastro respondis: “Ne. Ankoraŭ ne. Ĝi estos la posta haltejo. Mi avertos vin.” Post mallonga paŭzo li aldonis: “Ĉu vi ĝuis vian dormon?”

“Jes ja! Ĝi estis ĝuste tio, kion la kuracisto preskribis. Antaŭe mi sentis min malsana, sed nun mi povas lukti kun la tuta mondo.”

“Mi esperas ke tio ne estos necesa,” diris la pastro kaj, post momento, “Nu, jen via haltejo.” Li denove glitigis la barilon por fari la sonon de aŭtobuso. La drinkulo puŝis la lignan pordon kaj elstumblis.

“Dio estu kun vi, amiko,” diris post li pastro Braŭn.

“Ankaŭ kun vi, veturigisto. Vi estas bonulo.” Kaj per tiuj vortoj la viro malaperis, ankoraŭ ŝanceliĝante, tra la malferma preĝejo pordego.

4. *Brigo, kiel iuj ludas ĝin*

Ni ludis briĝon. Niaj kontraŭuloj faris la finan anoncon de ses keroj, kaj la ludo komenciĝis. Kiam la fantomo metis siajn kartojn sur la tablon, ni rimarkis ke ŝi havas en la atuta emblemo nur la ason. La anoncinto gajnis la unuan prenon. Kompreneble ĉiuj el ni sciis ke ŝi nun volos forpreni ĉiujn niajn atutojn.

Nu, ŝi konsideris... konsideradis. El sia mano ŝi tiris la reĝon de keroj (ni ne povis ne vidi ĝin), hezite skuis la kapon kaj debatis kun si. Poste ŝi eltiris la duon kaj dum longa tempo scivolis pri tio. Tiam la fanton. La atendo estis preskaŭ netolerebla. Kion ajn ŝi ludis ŝi devis gajni la prenon per la aso sur la tablo. Do, kial la hezito? La grandeco de ŝia nedecidemo estis tia, ke finfine mi subite kaj kun hororo aŭdis min diri: “Maria, ĉu vi veturigas aŭtomobilon?”

“Jes,” ŝi respondis, feliĉe ne komprenante la kialon de mia demando. Sed la aliaj komprenis, kiel iliaj ekspasmantaj lipoj atestis. Mi hontis.

Por esti justa mi devas aldoni, ke kiam la virino fine decidis kiun karton ludi (la duon, ĝuste), ŝi kapablis facile gajni la malgrandan ŝlemon.

5. *La kantistino*

Dum pluraj semajnoj la maljuna majstro suferadis, instruante la arton de kantado al la dika sinjorino. Ŝi havis malagrablan voĉon, malbelan figuron kaj malbonan humoron, sed ŝi havis ankaŭ grandegan memestimon kaj abundon da energio. Ŝia voĉo laŭte kriĉis la altajn notojn kaj bruege muĝis la malaltajn. Plurajn fojojn la majstro penis ĝentile proponi ke ŝi metu sian energion en alian fakon ol kantadon, sed liaj subsugestoj estis tro obtuzaj por ŝia kompreno.

Ĉi tiun tagon ŝi superis eĉ sin mem. Malofte ŝia voĉo kaj la piano registris la saman noton; do, ĉar la voĉo estis pli laŭta, la rezulto estis aĉa bruego. Finfine la majstro ne povis plutoleri la torturon. Li saltis de la benko, flankenĵetis la brakojn, kaj en voĉo preskaŭ ploranta kriis: “Sinjorino, mi ludas la blankajn klavojn; mi ludas la nigrajn klavojn; sed vi... vi kantas en la fendoj!”

6. *Hiacintoj*

Estis malagraba tago kaj la maljuna sinjoro malfeliĉis sub la griza ĉielo. Pasante florbutikon li hazarde eniris ĝin, kaj la varmo tie lin iom trankviligis. Kial li vagas tien, ŝajne sencele? Estas jaroj ekde kiam li lastfoje vizitis tian butikon. Ho jes, nun li memoras. Kiam li estis juna, antaŭ multaj jaroj, estis lia kutimo aĉeti florojn por sia kara Elizabeta. Kiel bela ŝi estis! Kaj kiel multe ili amis unu la alian! Jes, ofte li portis florojn al ŝi, kaj ĉiam ŝi ricevis ilin kun novaj surprizo kaj ravo. Hiacintoj estis ŝiaj plej ŝataj. Kial? Io pri poemo, ĉu ne? Jes, la simpla eta poemo kiun ŝi deklamis al li frue en ilia amikeco. Kiel ĝi iris?

Se el via dolaramas' ne plu
restas ankoraŭ iuj ajn krom du,
retenu unu, sed per la dua sen tim'
aĉetu hiacinton por l' anim'.

Tio estis antaŭ longa tempo. Tiel multe da jaroj sen ŝi. Tamen la memoro estas freŝa kvazaŭ estus nur hieraŭ. Kial esti malfeliĉa? Ŝi estas ankoraŭ kun li; ŝi vere neniam lasis lin. Kaj en la estonteco ŝi restos kun li. Do, kial ne aĉeti florojn kaj porti ilin hejmen al ŝi? Jes, li faros tion.

“Ĉu mi povas helpi vin?” demandis la floristino.

“Jes, mi petas. Mi ŝatus havi rozkoloran hiacinton.”

La virino montris al li plurajn belajn plantojn. Du el ili estis speciale belaj. “Vi estas bonŝanca,” ŝi diris. “Hodiaŭ la hiacintojn ni vendas je duonprezo. Ĉu vi ŝatus havi du?”

Li malfermis la buŝon por diri ne, kiam li subite suprenrigardis kaj ekvidis maljunan sinjorinon starantan proksime kaj aspektantan iom malfeliĉa. Ideo venis al li. Alproksimiĝante al ŝi, li levis la ĉapelon kaj diris: “Sinjorino, mi aĉetas hiacinton por mia edzino. Ĉu vi afable permesus, ke mi donu unu ankaŭ al vi? Tio donus al mi grandan plezuron.”

“Ho, kiel afabla vi estas. Hodiaŭ estas mia naskiĝtago, kaj ĉiam mia edzo kutimis aĉeti florojn por la okazo. Antaŭ jaro li mortis kaj nun mi sentas min tre soleca. Jes, mi petas. Jes, kun ĝojo mi akceptos ilin. Dankon, nekonata amiko.”

Do la maljuna sinjoro aĉetis du hiacintojn kaj du homoj reiris al siaj hejmoj multe pli feliĉaj ol kiam ili lasis ilin.

LA MALPACIENCA MOTORISTO

(vera rakonto)

Oni fine decidis pavimi la tutan ŝoseon antaŭ la domo de ges-roj Bolter... certe ne antaŭ ol estis necese. Unu flanko de ĝi estis jam elfosita, lasante nur unu padon por trafiko. Ĉar ilia domo staris lasta ĉe la malsupro de la iom kruta vojo, la Bolteroj devis atingi tiun straton per eta flankvojo kaj veturi supren sur la maldekstra, do malĝusta, duono de la strato. Veturantoj jam atingintaj la supran vojkruciĝon kaj volantaj malsupreniri kutimis atendi ĝis la suprenvenantaj preterpasis ilin, antaŭ ol daŭrigi la propran veturon.

Unu tagon s-ino Bolter estis preskaŭ ĉe la kruciĝo kiam ŝi rimarkis grandan luksan aŭtomobilon enhavantan junan viron, kiu evidente intencis insisti pri siaj rajtoj. Li jam duone turnis la aŭton en "sian" padon por bloki la alian veturilon.

Kion fari? Ne estis spaco por du veturiloj, kaj ŝajne la viro havis neniun intencon retroiri. Li nur minace grimacis al ĉi tiu virino, kiu ŝajne eĉ ne scias distingi la dekstran manon de la maldekstra kaj uzas la malĝustan padon.

S-ino Bolter kun streĉita vizaĝo malfermis la apudan fenestron kaj etendis la manon por malfermi ankaŭ la kontraŭan. Tre zorge ŝi kalkulis la distancon, ambaŭflanke, inter radoj kaj padrandoj. Tiam ŝi tre malrapide komencis lasi la aŭtomobilon ruliĝi malantaŭen. Ĝi gajnis rapidon, do, timigite, ŝi haltigis ĝin per la krizbremso kaj malŝaltis la motoron. Post tio ŝi eliris por kontroli denove la spacon inter la veturilo kaj la vojrandoj. Ree en la aŭto ŝi reŝaltis la motoron, malrapide liberigis la bremsojn, kaj, kun kapo ekstere, tre zorge malantaŭen moviĝis, turnante la stir-radon unue dekstren, poste maldekstren.

Dume la juna viro atendis... atendadis. "Stulta virinaĉo!" li kriis. "Kial oni permesas tiajn homaĉojn sur urbaj stratoj?" La tutan tempon li grumbladis, kaj en momento de ekstrema agaco eĉ laŭte hupis. Kia malŝparo de tempo!

Finfine s-ino Bolter atingis la etan malsupran flankvojon. Kiel sago el arko la luksa aŭtomobilo preskaŭ samtempe trafis tiun saman punkton. Sed egale rapide la alia aŭto pasis ĝin ĉe la angulo. Hupante kaj preskaŭ flugante ĝi denove supreniris la malĝustan duonon de la strato kaj malaperis.

"Dio mia!" elspiris la viro tute konsternita. "Kion ŝi ĵus faris al mi?" Li ne sciis ke dum la Dua Mondmilito, kiam mankis viroj, s-ino Bolter estis unu el la plej bonegaj taksiistinoj en la tuta urbo.

REĜO DAVIDO

(vera rakonto kun ĉefa familia nomo ŝanĝita)

Ŝajnas, ke kelkaj geinfanoj retenas memoron de antaŭa ekzisto pli daŭre ol la normala infano. Tiel estis en la kazo de trijara Davido Marteno, kiu loĝis en Jerusalemo. Lia patrino plendis al la edzo, bone konata dentisto, ke la infaneto parolas nur ĵargonon al ŝi, kiam la patro estas for en la laborejo. Li parolas normale inter aliaj geinfanoj kaj kiam la patro estas hejme, ŝi diris. Nur kiam la du estas solaj li ĝenas ŝin per laŭtaj admonaj vortoj, kvazaŭ li donus ordonojn al armeo.

Pro ofta petado de la patrino, d-ro Marteno decidis konsulti psikiatron. Pli frue, tiun tagon de la konsulto, li rimarkis ke Davido konstruis per ludblokoj strangan fortikaĵon. Kiam li demandis pri kio temas, torento da ĵergono estis la tuta respondo. D-ro Marteno ŝajnis rekoni du aŭ tri vortojn, inter ili la malnovan hebrean vorton por templo.

La intervjuo kun la psikiatro estis malsukceso, kvankam d-ro Marteno aŭdigis sonbendon de la matena konversacio kun la filo. Tamen venis pli da sukceso kiam li aŭdigis ĝin al la muzea kuratoro, specialisto pri antikvaj manuskriptoj. Tiu plurfoje tre zorge aŭskultis la bendon kaj deklaris ke la vortoj estas en la antikva hebrea lingvo, kaj ŝajne estas la vortoj de reĝo admonanta siajn adeptojn ke ili sekvu lin al gloro. La kuratoro diris ke ĝi memorigas lin pri mencio en la Sanktaj Skribaĵoj de okazaĵo en la vivo de Reĝo Davido, kiam tiu petis helpon kontraŭ tiuj kiuj kontraŭstaras la konstruadon de la templo en Jerusalemo... taskon kiun, parenteze, la filo Salomono devis fini. La kuratoro diris ke li ne scias ke tia teatraĵo ekzistas, kaj li surpriziĝis ke aktoro kun tiel flua kono de antikva hebreo vivas. "Kiu li estas?" demandis li. "Mia trijara filo," mallaŭte respondis d-ro Marteno.

Dum la knabeto kreskis li fariĝis pli normala, sed kelkfoje falis en trancojn. Estis rimarkate, ke la trancoj ŝajne venis plej facile kiam la fenestroj de lia ĉambro estis malfermaj kaj la vento blovis el la nordoriento, kie iam kuŝis la originala fortikaĵo de Reĝo Davido.

Esperante tute ekzorci la spiriton de Reĝo Davido el la vivo de la nun kvinjara filo, la gepatroj faris vojaĝon al Ateno por montri al Davido la ruinojn de tute malsama religio. Sed kia tempesto! La knabo hurlis tondrokriojn al la gepatroj kaj akuzis ilin pri montrado de "paganaj temploj kun ĉizitaj figuroj de stultaj etaj dioj!" Kiaj vortoj el kvinjarulo! La ferioj estis fiasko.

La knabo ne volis manĝi, nur plori kaj furioziĝi, do la familio tuj hejmeniris, decidante tute ignori pluajn trancojn.

Tamen, iom da tempo post la vojaĝo, la patro denove konsultis psikiatron. Tiu sugestis ke la knabo interesiĝu pri muziko, kiel faris Reĝo Davido mem. Post kelkaj vizitoj al muzikisto Davido montris muzikan talenton, sed malmultan intereson. Tamen dum leciono li ekvidis harpon antaŭe ne rimarkitan. Ekscitite li kaptis ĝin kaj komencis palpludi strangan melodion kun eĉ pli stranga ritmo. La ludado havis fortan trankviligan efikon sur lin.

Venis la 15-a de majo 1967, kiam tuta Israelo festis la deknaŭan datrevenon de sia sendependeco. Muziko, kantoj, dancoj kaj piroteknikaĵoj distris la homamasojn. Dum la bruado Davido sidis silenta. Tiu dato signifis nenion por li. Sed subite li petis ke la patro konduku lin al Monto Ziono, kaj tie, ĉe la tombo de Reĝo Davido, li profetis la sestagan militon baldaŭ venontan. “Ne malesperu,” Davido kuraĝigis la patron. “La venko estos nia. Dio gvidos nin. Havu fidon.” Kaj tiel estis.

Monaton poste la nun sesjara Davido, en profunda tranco, gvidis paradon laŭlonge de la Valo de Spiritoj ĝis la muroj de la malnova Jerusalemo. “Reĝo Davido” promesis montri al la aliaj en kia maniero li kaptis la urbon de Ur Salin (Jerusalemo) el la manoj de la kanaanaj malamikoj. (Tiu milita ŝtatrenverso ankoraŭ estis mistero eĉ inter spertuloj.)

En la Kaverno de Giĉon la knabo kondukis ilin al amaso da ŝtonegoj. Li suprenmontris kaj en voĉo de reĝo diris: “Tie estas la vojo.” Arkeologia studento el la grupo malkovris mallarĝan ŝakton. La postan tagon dudek kvar tiaj studentoj suprengrimpis la trairejon kaj eliris 180 metrojn pli alte en la centran korton de Moskeo El Omar sur Monto Moria. La studentoj detale desegnis la sekretan vojon kiu, mezvoje, unuiĝis kun unu el la putoj de Monto Moria, kaj kiun oni povis sekvi nur per vadado. Laŭ unu el ili, “Tiu estas la plej bona, plej rapida kaj plej efika rimedo konkeri tiun fortikaĵon. Mi certas ke Reĝo Davido mem devis tiamaniere venki Ur Salim.”

Kiel povis knabeto scii pri afero, kiun spertuloj priargumentis dum jarcentoj? Kial la mondo ne aŭdis pli pri li? Nu, kiam li estis tre juna la gepatroj timis tion, kion povus fari al li eĉ bonintencaj kuracistoj, edukistoj, psikiatroj ktp. Nur unu-du amikojn, kiuj promesis sekretecon, ili fidis. Krom tio, ili volis ke la knabeto vivu kiel eble plej normalan vivon inter siaj kunuloj. Ili kredis ke la infano fine preterkreskos siajn “memorojn”.

Post kiam okazis la sestaga milito estis eĉ pli necese silenti, ĉar kaj araboj kaj israelanoj pretendis rajtojn je Jerusalemo, kaj la etoso inter la du popoloj

estis elektra. Do nun, en la fruaj naŭdekaj jaroj, estas eble ke inteligenta junulo ankoraŭ loĝas kaj laboras en Jerusalemo. Se vi lastatempe vizitis tiun urbon eble vi eĉ vidis lin, nesciante. Ĉu li entute forgesis sian prapasintecon kaj pensas nur pri komercaj aŭ profesiaj aferoj? Aŭ ĉu, eble, promenante kun amatino dum bela somera vespero, li ankoraŭ subite miras ke li frivole parolas kun junulino, kiam li devus esti en la palaco prizorgante sian regnon?

ŜANĜO DE CELO

(vera rakonto krom pri minoraj detaloj)

Amikino mia, nun morta, dum sia vivo ofte rakontis al mi fascinan okazaĵon el la historio de prapatrino sia. Mi bone memoras la nomon de tiu prapatrino kaj la ĉefajn faktojn de la rakonto, sed la detalojn mi bedaŭrinde forgesis. Do mi devos provizi tiujn per propraj fabrikaĵoj. Jen, do, “ŝia” rakonto.

Mia prapatrino, Ani Kampbel, estis unu el tiuj kompatindaj infanoj kiuj apartiĝis de la gepatroj dum la amasa elmigro el Usono baldaŭ post la Deklaro de Sendependeco en 1776. Multe da lojalistaj homoj preferis forlasi la komfortojn de la amataj hejmoj por resti britaj regnanoj en la fremda lando Kanado.

La apartiĝo okazis dum la irado al malgrandaj boatoj, portontaj la elmigrantojn al velŝipoj. Oni unue akceptis la infanojn en la boatoj kaj nur poste la gepatrojn. Sed okaze boato postlasis gepatran paron pro manko de spaco. Malofte, sed kelkfoje, infano kaj gepatroj atingis malsamajn ŝipojn. Ŝtormaj ventoj blovis iujn ŝipojn for de la ĝusta vojo, kaj kelkaj infanoj neniam retrovis la gepatrojn.

Tia estis la kazo de la kvarjara Ani. La velŝipo en kiu ŝi vojaĝis, atingis sufiĉe ŝirmatan havenon kaj neniam da vivoj perdiĝis. Provizoran hejmon oni trovis por Ani ĉe la familio Kasel, sed post longa, malsukcesa serĉado de ŝiaj gepatroj, tiu domo fariĝis ŝia daŭra hejmo. Ges-roj Kasel bone traktis ŝin. Ili manĝigis ŝin, donis al ŝi la malnovajn vestaĵojn de la du propraj filinoj, permesis ke ŝi aŭskultu la lecionojn de la instruisto kiu persone studdirektis la filinojn, kaj, kiam Ani povis iomete legi kaj skribi, ili afable permesis ke ŝi legu la malpli multekostajn librojn kaj skribu sur la fenditajn ardezojn. Por repagi ilin ŝi faris taskojn por la tuta familio de la matenoj ĝis la noktoj.

Sinjoro Kasel estis sufiĉe riĉa viro. Li posedis bazaron, el kiu li negocis la vendadon de preskaŭ ĉiaj vendeblaĵoj al komercistoj, fiŝkaptistoj kaj dommastrinoj. Li havis ankaŭ duan sur la alia flanko de la duoninsulo ĉe Mevo-Haveno. Tiun direktis juna viro nomata Ian Kemron (skota nomo).

Okaze estis necese ke s-ro Kemron vizitu ges-rojn Kasel rilate la laboron. Renkontinte la filinojn, li nature volis edziĝi kun unu el ili, do li petis permeson. Tamen, kiel s-ino Kasel severe diris al la edzo: “Li estas bona komerca helpanto por vi, certe, sed li estas nur servanto. Neniu filino mia edziniĝos kun nura servanto!” Kaj tio estis definitiva.

S-ro Kasel iom komprenis la sentojn de Ian kaj kompatis lin. Kion fari? Tiam li havis bonan ideon: Ani estas nun dekkvar-jara, beleta, modesta junulino, kiu bone scipovas prizorgi hejmon. Do, kial tiuj du ne geedziĝu?

Neniu demandis pri la deziroj de Ani mem. Ŝi estis fraulino de “edzina aĝo” kaj Ian estis viro sufiĉe juna kaj bonaspekta por plaĉi al iu ajn. Krom tio, la salajro pagata al li de s-ro Kasel ŝajnus “fabela” al Ani. Do estis aranĝite. Ian Kemron venos perŝipe al la hejmo de la Kaseloj por la geedziĝo, kaj poste la paro iros al Mevo-Haveno por tie festi Kristnaskon.

Tamen neniu avertis la veteron pri la planoj. Malfrue en novembro ŝtormo ekblovegis kaj granda ŝipo rompiĝis ĝuste en la enirejo de Mevo-Haveno. Kompreneble ĝian ŝarĝon oni ne povis lasi al aliaj, do, laŭ ordono de s-ro Kasel, Ian devis resti kaj direkti la postsavan operacion. Do, anstataŭe, Ani kaj la juna pastro Ŝor, ĵus veninta el Anglio, devis fari la vojaĝon. La kompatinda pastro ĵus travivis kvin semajnojn de marmalsano, kaj neniu povis persvadi lin denove meti piedon sur ŝipon. Pro tio la du devis iri tere la tridek kilometrojn trans la duoninsulo ĝis la hejmo de Ian. Amiko ĉe apuda bieno havis unu ĉevalon kaj prunedonis ĝin.

“Vi rajdos kaj mi piediros,” galante diris la eta pastro.

“Ne, ni rajdos kaj ligos laŭvice.”

“Rajdos kaj ligos? Kion vi volas diri?”

“Nu, mi rajdos, eble kilometron, poste ligos la ĉevalon al arbo kaj piediros antaŭen. Vi sekvos niajn spurojn, rajdos, preterpasos min, kaj viaŭvice ligos la ĉevalon por mi.” Subite ŝi rigardis la ĉielon. “Neĝos,” ŝi iom time diris. Tiam, rimarkante ke la juna pastro ne havas eĉ koltukon por protekti sin kontraŭ la malvarmo, ŝi donis al li la propran, ĉar ŝia vintra mantelo havis grandan kolumon. Tiam ŝi forrajdis kaj li, pro la arboj kaj arbustaro, malfacile piediris post ŝi.

Komencis neĝi. Unue tio faciligis aferojn. Sed baldaŭ la neĝeroj fariĝis pli kaj pli grandaj kaj densaj, kaj preskaŭ plenigis la ĉevalspurojn. Kiam la kompatinda eta pastro komencis ligi la ĉevalon la trian fojon granda, peza amaso da neĝo falis de branĉo de pinarbo rekte sur la ĉevalan kapon, kaj la terurita besto ekgalopis inter la arbojn. Kiam Ani atingis la pastron li estis preskaŭ preta plori. Ĉi tiu Kanadaĉo! Kion ankoraŭ li devos suferi pro sia fi-kuraĝo veni ĉi tien?

Nun ili havos neniun spuron por sekvi, ĉar la ĉevalo preskaŭ certe povos senti la vojon hejmen. Nu, la nura prudenta afero estos daŭre sekvi la saman direkton se eble. Ili tion faris. Subite la pastro haltis kaj, montrante tra la neĝeroj al io griza kaj malklara, demandis: “Kio estas tio?”

“Ho, Dio benu vin!” fervore kriis Ani kvazaŭ ŝi estus pastrino. “Ĝi estas kabano ia. Ni rapidu.”

Bonŝance la pordo estis fermita sed ne ŝlosita. Tuj ili eniris kaj ĉirkaŭrigardis. Maldika tavolo de neĝo, enblovita tra la fendetoj inter la murŝtupoj, kovris ĉion, sed balailo baldaŭ liberigis ilin de tio. Mallarĝa benko staris laŭ unu muro kaj sur ĝi kuŝis pluraj tre polvaj ursopeltoj. En angulo staris forno kaj seka ligno, tamen nenie ili povis trovi silikon kaj tindron por ekbruligi fajron. Ili estis tre malvarmaj kaj frostotremis. “Mi havas sandviĉojn, se vi estas tre malsata,” diris Ani, “sed mi sugestas ke estus pli bone unue varmigi nin kaj lasi tiujn por matenmanĝo.”

“Kiel ni povas varmigi nin sen fajro?” demandis la pastro.

“Mi montros ion al vi,” respondis Ani, kaj tuj komencis etendi la ursopeltojn sur la plankon, interkovre kaj peltoflanke supre. “Nun, kuŝigu vin tie kaj mi kuŝiĝos apud vi.” Ŝi ĉirkaŭbrakis lin, tiris unu finaĵon de pelto ĉirkaŭ ambaŭ, kaj komencis ruli ilin kune. “Volviĝado estas certa rimedo por fariĝi varmaj,” ŝi murmuris dormeme.

“Volviĝado?”

“Jes, mi klarigos tion en la mateno,” ŝi diris kaj tuj endormiĝis.

“Stranga kutimo sed ja efika,” li pensis, kaj baldaŭ ankaŭ li dormis.

Je la unua matenlumo ili vekigis pro la sono de henado ekstere. Ankaŭ la ĉevalo estis trovinta la kabanon. Ani malfermis la pordon kaj lasis ĝin enveni. Dum ili manĝis la sandviĉojn, donante ankaŭ al la besto porcion, la du konversaciis. Ani eksciis ke la pastro nomiĝas Ĝon Ŝor, kaj li eksciis pri volviĝado.

“Estas malnova kutimo,” komencis Ani. “Kiam juna gefianĉiĝinta paro trovis sin en situacio simila al tiu de la lasta nokto, ili trovis ian kovrilon kaj volvis sin en ĝi. Aŭ ili ĉirkaŭbrakis sin kaj dormis en profunda amaso de pajlo. Ili surhavis la vestojn, do ĉio estis en bonordo laŭ publika opinio.

“Ho, bone,” respondis Pastro Ĝon. “Do ni povas daŭrigi la finajn kilometrojn, kaj ĉio estos en bonordo ĉe s-ro Kemron.”

“Ne,” diris Ani kun grimaco. “Unue li ne plaĉas al mi. Kaj due s-ro Kemron ne akceptus min.”


“Ne akceptus vin! Kial ne?”

“Ĉar mi ne faris la volviĝadon kun li, sed kun vi.”

“Ĉu tio faras diferencon?”

“Jes, kompreneble. Krom tio mi ne volas edziniĝi kun li.”

“Kial vi venis, do?”



“Ĉar s-ro Kasel estis tiel insista.”

“Nu, vi devos reiri al Plaĝa Haveno kaj daŭrigi la vivon tie.”

“Mi ne povas, ĉar s-ino Kasel ne plu akceptos min... kaj neniu alia.”

“Kion, do, vi faros?”

“Mi ne scias.” Ŝi paŭzis, tiam aldonis: “Kaj ankaŭ vin ili ne akceptos, kiam ili aŭdos ke vi pasigis la nokton kun mi.” Plia paŭzo. “Tamen mi scias ke oni bezonas novan pastron ĉe Roka Golfeto.”

“Sed kio pri vi?” Li komencis konstati ke li eĉ ne deziras loĝi en malsama loko ol ŝi. Ŝi estas beleta, interesa junulino kaj tre kapabla. Sed laŭte li diris nur: “Efektive la klaĉo sekvos ankaŭ min.”

Ŝi profunde rigardis en liajn okulojn kaj poste mallevis la proprajn. Tiam, parolante hezite, ŝi diris: “Se ni... geedziĝus, ne gravus al iu ajn. Mi... scipovas kuir kaj baki kaj kudri, kaj sufiĉe bone dommastrumi... Mi prizorgus vin.”

“Vi, benita knabino, vi estus aminda, perfekta edzino, mi certas. Kaj mi farus mian plejblon por meriti vin.” Li kliniĝis, prenis ŝiajn manojn en la proprajn kaj kisis ilin.

Do estis decidite. Ili rajdos kaj ligos reen al Plaĝa Haveno kaj petos ke la dua pastro, tiu de la “Nova Penso”, geedzigu ilin. Poste ili vojaĝos per la eta marborda boato ĝis Roka Golfeto.

Ĵus antaŭ ol eliri Ani diris al Ĝon: “Mi pensas ke vi nun rajtas kisi min,” kaj ŝi levis la buŝon al li. Li ridetis kaj arde faris.

La suno brilis kaj la ĉevalo malpacienis esti hejme. La neĝo ne plu falis, do ili ekiris. Ĉi-foje Ani insistis ke Ĝon rajdu la unuan kilometron. Ŝi rigardis ĝis li estis preter vido kaj prenis el sia vestpaketo malgrandan objekton: la edzdonacon de s-ro Kasel al Ian. Ŝi rigardis ĝin kun sento de naŭzo kaj levis la brakon por ĵeti ĝin for en la arbaron. Sed venis pli bona ideo: ŝi reeniris la kabanon kaj metis ĝin apud la forno. Eble venos ĉi tien iu kiu ne scios pri volviĝado kaj bezonos ĝin. Ĝi estis... tindroskatolo.

LA KVINJARA AVO

(vera rakonto, laŭ hinda onidiro)

Se vi iam vojaĝos tra nordokcidenta Hindio kaj ne sekvos la kutiman turistan vojon, estas eble (se ne probable) ke vi atingos certajn du vilaĝojn. Tie vi eble aŭdos la ofte menciitajn nomojn Rajiv kaj Sumer Singh, kaj unu el la plej strangaj travivaĵoj iam ajn rakontitaj.

Kiam mi la unuan fojon aŭdis la rakonton antaŭ pli ol dudek jaroj, Rajiv estis kvinjara knabeto, la plej juna infano en familio apartenanta al la Argarvala kasto en Sirsaganj. Antaŭ tri jaroj, kiam li estis nur dujara etulo, pli aĝa knabo vidis lin malproksime de la hejmo kuranta norden. La junulo gvidis lin reen al lia domo.

“Kien vi intencis iri?” demandis la patrino.

“Al mia hejmo,” venis la tuja respondo.

“Sed, Rajiv, ĉi tiu estas via hejmo.”

“Ne,” asertis pozitive la dujarulo, “mi iris al mia propra hejmo.”

“Kie tiu estas, karuleto?” ŝi volis scii.

“En la vilaĝo Daŭlatganj.”

Oni akceptis ĉi tiun okazaĵon kiel produkton de infana imago ĝis kelkajn tagojn poste, kiam simila afero okazis, kaj denove la trian fojon. Por liberigi lin el liaj strangaj pensoj la patrino kuraĝigis lin paroli pri sia “propra hejmo”. La knabeto diris ke lia nomo estas Sumer Singh, ke en Daŭlatganj li posedas malgrandan domon kiun li mem konstruis, kaj ke li havas edzinon kaj unu filinon. “Ŝia edzo kaj la du infanoj loĝas kune kun ni. Ni apartenas al la Kaĉia kasto.”

La familianoj ege amuziĝis pro ĉi tiuj fantazioj ĝis sekva provo lia iri hejmen. Tiam la afero komencis ĝeni ilin kaj ili konsultis la vilaĝan saĝulon. Tiu diris kelkajn preĝojn kaj promesis ke ĉio estos bona ekde tiam. La saĝulo nur parte sukcesis, ĉar Rajiv daŭrigis kuri “hejmen”, sed ne tiel ofte.

Je la tempo kiam Rajiv atingis la aĝon de kvar, ĉiuj en la najbarejo konis lian historion, kaj homoj venis ĉiun tagon por vidi lin kaj meti al li demandojn. La respondoj estis ĉiam tiel pozitivaj, kaj li havis tiom da scio pri plenaĝulaj aferoj kaj pri la kutimoj de la Kaĉioj, ke multaj spertuloj komencis kredi ke Rajiv memoras antaŭan vivon kaj ke li ja devas esti la reenkarniĝo de la mezaĝa viro Sumer Singh.

Familiaj amikoj starigis komitaton por kontroli la aferon. Ili eksciis ke ekzistas vilaĝo Daŭlatganj, sesdek kvin kilometrojn norde, en kiu loĝas

komunumo de Kaĉioj. Ili vizitis la vilaĝon kaj trovis veraj ĉiujn asertojn de Rajiv. La domanaro estis tia, kia la knabo priskribis ĝin, kaj la enhavaĵoj kongruis en ĉiuj detaloj. Ili eĉ trovis la etan nigran kofron, kiun Rajiv aĉetis en la vilaĝo Bhogaon kaj sur kiun “oni pentris mian nomon por du-tri pliaj moneroj.”

Dum antaŭa demandado Rajiv menciis ke li, Sumer Singh, prunteprenis monon de la loka uzuristo por la domkonstruado. La komitato konfirmis tion kaj ankaŭ alian negocon rilate barilon inter la bienetoj de Rajiv kaj najbaro. Kiam la komitato raportis ke ŝajne Rajiv estas la reenkarniĝo de Sumer Singh, la familio akceptis la novaĵon kun definitiva malplaĉo. La Kaĉioj estis membroj de pli malalta kasto ol la Argarvaloj kaj eble postulus Rajiv por si mem. Kompreneble, do, la gepatroj faris tiom kiom eble por senkreditigi la tutan aferon kaj ne plu permesis ke neparencoj vidu lin.

Dume, post la vizito de la komitatanoj, la Kaĉioj komencis aŭdi la onidirojn pri Rajiv kaj faris proprajn enketojn. Ili volis vidi la infanon, sed la gepatroj ne permesis tion. Do, iom post iom kreskis inter la du familioj kverelo, kiu fine atingis la orelojn de la policistoj. La poliestro decidis mem paroli kun la infano, sed la gepatroj kontraŭstaris tion. Nur kiam li donis firman certigon, ke li nur volas preventi pluan malakordon inter la du familioj, ili akceptis lin en la domon.

Tiu viro estis iom psikologo. Unue li ridetis al la infano, gestis pri la granda alto de tia juna knabo, kaj donis al li nekutiman frandaĵon. Nur post tio li komencis la demandadon. Laŭ ĉiuj detaloj la rakonto kongruis kun tiu, kiun li jam aŭdis ĉe la oficejo. Laste li demandis de la knabeto: “Kiel kaj kie vi mortis?”

“Mi mortis en la registara malsanulejo en Fartegarh,” li respondis.

“Kial vi estis en malsanulejo? Kaj kial en tiu, ne en la pli proksima malsanulejo en Mainpuri?”

“Mi havis severan doloron en la orelo. Doktoro Ŝarma de la distrikta malsanulejo jam prizorgis min, sed ne sukcesis forigi la infekton kaj doloron. Oni konsilis min iri al tiu en Fartegarh, ĉar tie troviĝis spertulo pri tiaj malsanoj.” La poliestro konfirmis ke d-ro Ŝarma ja estis la kuracisto en Mainpuri antaŭ kvin jaroj, kaj ke li ja sendis malfacilajn kazojn al la specialisto en Fartegarh. Sed ĉu kvinjarulo sciis tion?

“Dum kiom da tempo vi restis en la malsanulejo?” demandis li.

“Dek unu tagojn. Tio kostis kvarcent rupiojn, inkluzive de la operacio.”

“Diru al mi, mi petas, tion kio okazis.”

“Mi mortis sur la operacia tablo,” estis la simpla respondo. Kaj tio estis la fino; li ne volis pluparoli.

La onklo diris ke estas ĉiam tiel: li respondas tre volonte dum iom da tempo kaj subite haltas. Li aldonis ke la infano ŝajne ne memoras la samajn detalojn ĉiun fojon, kaj ke li iom post iom ŝajne forgesas plurajn. Poste la poliestro havis du-tri aliajn okazojn paroli kun la infano. Ĉiam esence la sama rakonto, sed ne necese kun ĉiuj detaloj. Tamen neniam la knabo kontraŭdiris siajn antaŭajn rakontojn.

Estis facile kontroli la informojn ĉe la du malsanulejoj. La indiklibroj registris ilin, kaj pluraj flegistinoj, kuracistoj kaj helpantoj memoris la kazon de Sumer Singh. Nur Sumer Singh mem povus scii tion, kio okazis en la operacia teatro... kaj Rajiv priskribis tion kun detaloj kiujn li neniam ŝanĝis.

Finfine la poliestro decidis, ke nenio firmigos la aferon krom efektiva renkontiĝo inter Rajiv kaj la tuta familio de Sumer Singh. Kompreneble la gepatroj de Rajiv donis nur tre malvolontan permeson, kaj la tuta Argarvala komunumo kontraŭstaris ĝin. Estis, laŭ ili, neeble ke Rajiv iam ajn estis en la vilaĝo de la Kaĉioj, kaj certe tiuj neniam vizitis Sirsaganjon. Tamen la poliestro oficiale postulis ĝin, kaj scivolo, plus la konsilo de la ĉefa vilaĝa saĝulo, finfine persvadis la gepatrojn konsenti al la renkonto – sed nur sub la certa kondiĉo ke Rajiv restu ĉe ili, kio ajn okazu!

Do okazis tre stranga kaj impona kunveno. Ĉeestis ĝin la tuta familio de Sumer Singh, inkluzive de liaj gepatroj, vidvino, filino, bofilo kaj du nepoj. Kompreneble Rajiv sciis nenion pri la afero. Li eniris ĉambron en kiu jam sidis ĉiuj parencoj kune kun familiaj geamikoj, lokaj saĝuloj kaj pluraj policanoj.

Kun grandega miro la juna knabo ĉirkaŭrigardis la ĉambron. Tiam subita ŝanĝo okazis ĉe li... ne fizika ŝanĝo, sed unu de sinteno. La rigardantoj ne plu vidis infanon, sed dignan plenaĝulon. Malrapide li marŝis al la patro de Sumer Singh kaj tuŝis la piedojn laŭ la antikva hinda kutimo de respekto. Poste li faris same al la patrino de Sumer Singh kaj kviete murmuris: “Panjo.” Nun li rigardis la vidvinon, dolĉe ridetis, kaj forturnis sin. Kiam oni demandis lin kiu estas tiu sinjorino, li montris embarason kaj mallevis la kapon. Lia respondo estis, “La patrino de Ram Kali.”

Tio estis tipa konduto de viro el la Kaĉia kasto. Antaŭ la gepatroj viro neniam agnoskas edzinon alimaniere ol kiel la patrino de sia plej aĝa infano.

Poste oni fingromontris al la filino de Sumer Singh. Tuj la maniero de Rajiv ŝanĝiĝis kaj li dolĉe diris: “Tiu estas mia amata filino.”

“Kiel vi scias tion?” demandis unu.

“Rigardu ŝian dekstran antaŭbrakon,” li respondis. “Vi trovos tie mian nomon. Kiam ŝi estis dek-trijara kaj edziniĝonta, ni ĉeestis la foiron en Bhogaon kaj oni tatus ŝin.”

La vizaĝo de Ram Kali montris surprizon kaj grandan ĝojon. Ŝi suprentiris sian manikon kaj tie ja troviĝis la nomo Sumer Singh. “Mi tiel multe amis mian patron,” ŝi preskaŭ singultis. Kaj subite ŝi rapidis al Rajiv, metis la frunton sur liajn piedojn kaj flustris: “Paĉjo, kara Paĉjo.” Tiam, al la du adoleskaj filoj nelerte starantaj apude, ŝi ordonis: “Tuŝu la piedojn de via avo,” kaj ili humile obeis. Rajiv milde ridetis al la du grandaj junuloj antaŭ si, tuŝis iliajn kapojn kaj digne diris: “Longtempe vi vivu!” (precize la ĝusta respondo de avo en tiaj cirkonstancoj).

Post tio neniu plu dubis ke la korpo de la juna Rajiv entenas la animon de Sumer Singh. Laŭ la malsanulejaj notoj Sumer Singh mortis du horojn antaŭ la naskiĝo de Rajiv... cent kilometrojn for.

Post la renkontiĝo neatenditaj paco kaj amikeco sentigis sin inter la du familioj, ĉefe dank’ al la saĝeco de la patro de Sumer Singh. Tiu estiminda maljunulo stariĝis kaj diris: “Sumer estis tre bona filo, tre bona edzo kaj tre bona patro. Li estis honesta homo multe respektata en la vilaĝo, kaj lia morto estis vera perdo al multaj. Pro tio la saĝa Dio decidis ke li finu la interrompitan vivon je pli alta nivelo. Nia familio ne havas la rimedojn por doni al Rajiv la kvaliton de vivo kiun li ricevos en sia nuna familio. Do, retenu mian filon, Sinjoro,” li diris rigardante la patron de Rajiv. “Mi petas nur ke ni vidu lin de tempo al tempo, kaj, kiam venos mia vico, ke vi sendu vian filon por ekbruligi mian funebran ŝtiparon, laŭ la tradicio.”

La vizito ĝoje finiĝis. Rajiv baldaŭ reiris al sia kutima infana vivo kaj post mallonga tempo tute forgesis la antaŭan. Ĉio ĉi tio okazis antaŭ pli ol dudek jaroj. Kiu scias, kio okazas nun al viro preskaŭ tridekjara... se li ja ankoraŭ eĉ vivas!

TEATRAĴETOJ

MERKURIO KAJ LA ARBOHAKISTO

Roluloj:

JOHANO	arbohakisto
MERKURIO	kuriero de la dioj
KARLO	frato de Johano, iom pli riĉa
MARIA	edzino de Karlo
PEĈJO	la filo

Sceno 1

Ĉe riverbordo. Johano hakas arbojn apud rivero, kaj subite lia hakilo falas en la riveron.

JOHANO [kun kriego] Ho, ne! Mia hakilo! Ho, kia malfeliĉo! Kion mi povas fari sen ĝi?

MERKURIO [ekaperante] Kio okazis, homo?

JOHANO Ho, mi perdis mian hakilon. Ĝi flugis el la manoj en la riveron... kaj mi ne povas naĝi. Mi ne scias kion fari sen ĝi.

MERKURIO Mi trovos ĝin por vi. [Li plonĝas en la akvon kaj reaperas kun brilanta ora hakilo.] Ĉu tiu estas via?

JOHANO Ne, tiu bela hakilo ne estas mia. La mia ne estas ora.

Merkurio denove plonĝas en la akvon kaj ĉi-foje revenas kun arĝenta hakilo.

MERKURIO Ĉu tiu estas via?

JOHANO Ne, bedaŭrinde. Tiu estas tre bela, sed la mia ne estas arĝenta.

MERKURIO Nu, la tria fojo estas ĉiam bonŝanca, do eble nun mi sukcesos. [Li denove plonĝas en la riveron kaj ĉi-foje reaperas kunportante la ĝustan hakilon.]

MERKURIO Ĉu mi finfine trovis vian propran hakilon?

JOHANO Ho, jes, multan dankon, sinjoro. Nun mi povas denove labori.

MERKURIO Vi estas tre honesta. Pro tio vi povas reteni ĉiujn tri hakilojn. Adiaŭ, honesta homo! [Li malaperas.]

JOHANO [al la ĉielo] Ho, dankon, dioj. Kiel bonŝanca mi ja estas!

Sceno 2

Post pluraj tagoj, ĉe la hejmo de Karlo.

- PEĈJO [kuregante en la kuirejon kaj preskaŭ faligante la patriron]
Panjo, divenu kion! Onklo Joĉjo ĵus estis en la kukejo kaj aĉetis kremkukojn!
- MARIA Kremkukojn? [al la edzo] Ĉu vi aŭdis tion, Karlo? Via frato aĉetas kremkukojn! Ni mem ne havas monon por tiaj manĝaĵoj, sed li, la malriĉulo, ŝajne havas ĝin. Kiel li... ?
- PEĈJO [interrompante ŝin] Jes, Paĉjo, mi eĉ ne konas la guston de kremkukoj, sed ili aspektas tiel bongustaj. Ĉu mi povas havi unu, Paĉjo... Paĉjo?... Panjo?
- MARIA Atendu knab', ĝis via patro havos tempon respondi.
- KARLO Mi ne scias kiel li gajnis tiom da mono... sed mi certe ekscios. Morgaŭ mi vizitos lin kaj postulos klarigon. Intertempe, jes, ni aĉetos tri kremkukojn je kiom ajn alta prezo, kaj almenaŭ ekkonos la guston de ili. Rapidu, Peĉjo, kaj aĉetu ilin. [Li donas monon al Peĉjo.]

Sceno 3

Denove ĉe la riverbordo. Johano hakas arbojn kaj fajfas. Karlo venas kunportante hakilon.

- KARLO [vokante al Johano] Ho, Joĉjo!
- JOHANO [malsuprenjetante la hakilon kaj proksimiĝante al la frato]
Ho, bonan matenon, frato... fremdulo! Estas longa tempo de kiam mi lastfoje vidis vin. Ĉu vi bonsanas? Kaj kiel fartas Maria kaj Peĉjo?
- KARLO Ni estas ĉiuj sufiĉe bonsanaj. Kaj vi, Joĉjo, vi ŝajnas esti ĉe la mondosupro! Vi fajfas dum vi laboras, kaj, laŭ onidiro, elspezas vian monon por kremkukoj. Kio okazis ĉe vi?
- JOHANO Nu... lastan ĵaŭdon, dum mi laboris, subite la hakilo lasis la manojn kaj falis en la riveron. Kiel vi scias, mi ne scipovas naĝi, do mi ne sciis kion fari. Bela junulo aperis kaj plonĝis en la akvon por reakiri ĝin. Li trovis

MERKURIO KAJ LA ARBOHAKISTO

tri hakilojn: oran, arĝentan, kaj mian propran. Afable li donis al mi ĉiujn tri. Mi vendis la arĝentan hakilon. Tio estas ĉio. Bonŝance, ĉu ne?

KARLO Frato, mi multe bezonas pli da mono. Ankaŭ mi perdis mian hakilon. [*ridetas*]

JOHANO Tio ne estas bona ideo, Karlo.

KARLO Estas bonega ideo, laŭ mi. [*Li subite levas sian hakilon, ĵetas ĝin en la akvon, kaj tuj komencas kriegi.*] Ho, mi perdis mian hakilon! Kiel mi nun povas labori?

MERKURIO [*aperante*] Kio estas?

KARLO Mia hakilo... mi perdis ĝin en la profunda akvo. Kiel mi povas labori sen ĝi?

MERKURIO Mi trovos ĝin. [*Li plonĝas kaj reaperas kun ora hakilo.*] Ĉu tiu estas via?

KARLO Ho, jes, dankon, sinjoro. [*Li etendas la brakon por la hakilo.*]

MERKURIO [*kolere*] Mensoga homaĉo! Plonĝu mem por via hakilo! [*Li ĵetas la oran for en la riveron kaj tuj malaperas.*]

LA ALIA SAĜULO

(adaptita de la novelo “The Other Wise Man” de Henry van Dyke)

Roluloj:

ARTABANO 40-jara mago ĉe la Templo de Zoroastro en Ekbatano, Persio (Zoroastro estis la profeto de Mazda, la “bona dio” de fajro – do, de lumo kaj vero.)

ABGARUSO maljuna mago, tre bona amiko de Artabano

VUNDITA JUDO, PATRINO KUN BEBO, KAPITANO, SOLDATOJ, RABENO, DU JUDOJ, HOMAMASO, JUNULINO

Sceno 1

Ekster la impona domo de Artabano en Ekbatano. Artabano portas blankan, lanan robon super silka tuniko, kaj blankan, pintan ĉaŝon havantan longajn pendantajn pecojn. Sur la brusto montriĝas la maga emblemo: ora, flugildesegnita cirklo, kiu signifas ke li estas ŝpertulo pri la steloj.

ARTABANO [*venante el la domo*] Mi kontrolu. Ĉu mi havas miajn donacojn por la naskota reĝo? [*serĉas en sia zombendo kaj eltiras saketon*] Jes, jen ili. [*rigardas ĉiun, laŭvice, dum longa tempo*] Ho, kia bela, blua safiro! Kaj kia rubeno, tiel fajre ruĝa! Kaj, ho, mia perlo de granda prezo! Mi ja esperas ke la nova reĝo akceptos kaj aprobos ilin. [*Li ĵus remetis ilin en la zombendon, kiam aperas Abgaruso.*]

ABGARUSO Ho, mia filo, mi ne maltrafis vin. Bone. Ĉu certas, do, ke vi iros?

ARTABANO Jes, kara amiko.

ABGARUSO Mi tiel multe bedaŭras, ke mi estas tro maljuna por akompani vin. Domaĝe ke neniu alia amiko povas kuniri.

ARTABANO Nu... se mi havus iliajn bonajn kialojn por resti hejme, eĉ mi eble ne povus iri. Sed la signoj estas ĝustaj kaj mi ĵuris iri.

ABGARUSO Eble la lumo de vero estas en tiuj signoj. Iaokaze estas pli bone sekvi stelon kaj, hazarde, malsukcesi, ol ne havi celon. Kaj tiu, kiu volas vidi mirindaĵojn, ofte devas esti preta vojaĝi sola.

- ARTABANO Dankon, amiko. Memoru ke mia fidela ĉevalo Vasda estos kun mi kaj portus min, se necese, ĝis la mondfino. Memoru ankaŭ, ke nur dum dek tagoj mi vojaĝos sola. Post tio mi renkontiĝos en Babilono kun miaj kolegoj kaj amikoj, Kasparo, Melkioro kaj Baltazaro.
- ABGARUSO Restas, do, mia filo, nur doni al vi miajn benon kaj amon. [*metas manon sur la ŝultron de Artabano*]
- ARTABANO [*ĉirkaŭbrakante Abgaruson*] Dankon, tre kara amiko. Ĝis revido kaj la estonta rakontado de ĉiuj miaj travivaĵoj.
- AMBAŬ [*gestante*] Ĝis!

Sceno 2

Apud soleca vojeto inter Ekbatano kaj Babilono. Artabano surgenue prizorgas la vundojn de judo evidente atakita de banditoj. Li jam finis surmeti kelkajn bandaĝojn kaj nun donas al la viktimo kontraŭdoloran dozon kune kun akvo el leda botelo pendanta ĉe lia zono. Poste li iom sidigas la viron, subtenante lin per brako, kaj donas al li malgrandajn pecojn de pano.

- ARTABANO Bone ke mia ĉevalo vidis vin kaj flankensaltis. Alie vi certe estus mortinta. Ŝi portos vin al juda domo kaj mi donos sufiĉan monon por havigi al vi kuraciston kaj loĝadon.
- JUDO Vi ja estas nobla viro! Ĉu mi kuraĝas demandi kien vi iras sola?
- ARTABANO Mi estas mago kaj scias ke, ĉi tiun jaron, naskiĝos bebo kiu fariĝos granda reĝo. Mi iras por omaĝi al li kaj prezenti donacojn. Laŭ ĉiuj signoj li naskiĝos en Jerusalemo, do mi iras tien.
- JUDO Neniam mi povos repagi vian malavarecon, sed mi ja povas korekti tre gravan eraron vian. Dum jarcentoj niaj hebreaĵaj profetoj antaŭdiris ke la mesio... via reĝo... naskiĝos, ne en Jerusalemo, sed en la urbeto Bet-Leĥemo.
- ARTABANO Mi elkore dankas vin, amiko, pro tiu grava informo! Tio estas la plej bona repago kiun vi povus fari... Nun ni devas serĉi domon. Mi helpu vin stariĝi. [*fajfas*] Venu, Vasda!

TEATRAĴETOJ

Sceno 3

Kampo apud templo proksima al Babilono. Artabano sidas kun mesaĝo en la mano.

ARTABANO Do, Kasparo, Melkioro kaj Baltazaro estas jam for, kaj mi maltrafis ilin. Ili promesis atendi min nur dek tagojn antaŭ ol forlasi Babilonon. Tiu afero pri la judo malŝparis tiom da tempo! Sed mi ne povis ne helpi lin... Do, morgaŭ mi ekiros kune kun kamela karavano. Por tio mi devis pagi per mia blua safiro. [*suspiras*] Nun mi havas nur la rubenon kaj la perlon por la beba moŝto.

Sceno 4

Bet-Leĥemo; ekster la dometo de juna patrino portanta bebon ĉe la sino.

ARTABANO [*ridetante*] Bonan tagon! Ĉu vi povas helpi min, mi petas? Eble vi vidis tri fremdulojn, aŭ aŭdis pri ili... Magoj ili estas, kiuj vizitas Bet-Leĥemon por vidi la nove naskitan reĝon.

PATRINO Mi aŭdis ke ili venis portante donacojn, sed tuj foriris laŭ alia vojo. Mi aŭdis ankaŭ ke la gepatroj kaj bebo fuĝis... al Egiptio, laŭ onidiro. Niaj viroj timas ion malbonan... imposton aŭ ion similan... kaj estas ĉiuj for en la montoj gardante la bestarojn kontraŭ la romiaj soldatoj.

Subite en la distanco aŭdiĝas bruego de krioj kaj de kurantaj soldatoj. Laŭta virina voĉo kriegas.

VOĈO La soldatoj de Herodo! Ili mortigas niajn bebojn per glavoj!

La patrino rapidegas en la domon por kaŝi la infaneton. Artabano, mildaspekte, starigas sin en la pordotruon, ŝtopante ĝin.

KAPITANO [*alproksimiĝante al li*] Ĉu interne estas virino kaj infano?

ARTABANO [*rigardante profunde en la okulojn de la kapitano, dume ofertante la rubenon*] Mi loĝas sola kaj volas resti tia, en paco. Mi donacos ĉi tion al la prudenta kapitano, kiu permesos tion. [*tenas la juvelon en brila sunradio*]

KAPITANO [*avide rigardas kaj prenas ĝin; laŭte ordonas al la soldatoj*]

Antaŭen! Neniu infano ĉi tie.

Sceno 5

Aleksandrio, multajn jarojn poste, en la domo de la rabeno.

- ARTABANO . . . Do vi nun komprenas ke, dum multaj jaroj, mi vane serĉis la reĝon tra tuta Egiptio. Mi fariĝas maljuna, laca kaj senespera. Kion mi nun faru?
- RABENO Vi serĉas vian Reĝon en malĝustaj lokoj. Vi devus serĉi inter malriĉuloj, laboristoj, sklavo, mizeruloj kaj tiaj. Li ne estos potenculo kiel Josefo en Egiptio kaj Salomono en Jerusalemo. Li ne loĝos en palaco. Li starigos novan tipon de regno . . . tiun de kompatato kaj amo.
- ARTABANO Dankon, bona amiko. Mi malŝparis multajn jarojn, sed vi donas al mi novajn esperon kaj kuraĝon. Mi nun sentas ke iam, ie, mi trovos lin kaj adoros lin.

Sceno 6

Jerusalemo; sezono de la hebrea pasko, tridek tri jarojn ekde kiam Artabano, nun 73-jara, forlasis sian hejmon. Homamaso kuras al la damaska pordego.

- ARTABANO Denove en Jerusalemo, kie mi jam tiel ofte serĉis lin. Mi scivolos pri tio kio okazos hodiaŭ. [*haltigas du pasantajn judojn*] Kio okazas? Kien iras ĉiuj?
- UNUA JUDO Ni iras al Golgota. Ĉu vi ne aŭdis? Oni krucumos du famajn rabistojn kune kun Jesuo de Nazar. . .
- DUA JUDO [*interrompante lin*] . . . bonega viro, kiu faris multon por helpi malriĉulojn. Tiuj amas lin.
- ARTABANO Kial, do, oni krucumos lin?
- UNUA JUDO Ĉar la pastroj diras ke li nomas sin la Filo de Dio, kaj Pilato insistas ke li nomas sin Reĝo de la Judoj. [*La du rapidas antaŭen, kaj Artabano malrapide sekvas ilin.*]
- ARTABANO [*ekscitite*] Nun eble mi finfine vidos lin . . . kaj eble la perlo aĉetos lian liberecon.

Sceno 7

Jerusalemo; ekster la garddometo ĉe la damaska pordego. Aro da soldatoj trenas taŭzitan junulinon. Vidante Artabanon kaj rekonante la blankan ĉapon kaj oran cirklon sur lia brusto, ŝi subite eskapas siajn kaptintojn, surgeniŝas antaŭ Artabano, kaj ĉirkaŭprenas liajn genuojn.

JUNULINO Ho, kompatu min, mi petas, kaj savu min pro nia dio de amo kaj pureco... ĉar ankaŭ mi estas ano de Zoroastrismo. Mia patro ĵus mortis, kaj ili volas vendi min por pagi liajn ŝuldojn.

ARTABANO [*dum momento hezitas; malrapide eltiras la belan perlon kaj rigardas ĝin; fine levas la junulinon kaj metas la perlon en ŝian manon*] Jen via elaĉeta mono, filineto. Estas la lasta trezoro kiun mi retenis por la reĝo.

Subitaj mallumo kaj tertremoj. Sonoj de falantaj ŝtonoj. Polvo en la aero. Bruego ĉie. Artabano kaj la junulino trovas rifuĝon apud muro de la garddometo. Granda tegmenta ŝtono falas kaj trafas Artabanon ĉe la templo. La junulino kliniĝas super li, sed lasas lin por serĉi pli sekuran kaŝlokon. Subite aŭdiĝas voĉo, dolĉa kaj mallauĝa; ĝiaj vortoj estas aŭdataj nur de Artabano.

VOĈO Mi malsatis kaj vi manĝigis min; mi soifis kaj vi donis al mi akvon; mi estis fremdulo kaj vi amikiĝis kun mi.

ARTABANO Ne, moŝto, mi ne vidis vin malsata kaj malsana. Mi ne donis al vi vestaĵojn. Mi serĉis vin tridek tri jarojn, sed neniam vidis vian vizaĝon, kara Sinjoro.

VOĈO [*laŭte kaj dolĉe*] Vere mi diras al vi, ke kiam vi faris ion por unu el miaj mizeruloj, vi ja faris ĝin por mi.

ARTABANO [*radiante miron kaj ĝojegon*] Post ĉio mi finfine vidis mian amatan reĝon... kaj li tiel ame akceptis miajn donacojn. [*faras longan, feliĉan suspirojn kaj mortas*]

KVAR TEATRAĴETOJ PRI FRUA KALGARIO

La postaj kvar teatraĵetoj estis verkitaj por la centjara datreveno de la kanada provinco Kalgario en 1975. Ĉiuj estas veraj historietoj.

1. MANKO DE PRUVAĴO

Roluloj:

JERRY [ĜERI] POTTS, DU RAJDPOLICANOJ,
TRI KONTRABANDISTOJ, DU VIRINOJ

Sceno 1

Kabano sur la prerio en la nuntempa provinco de Alberta, proksime al Fortikaĵo Macleod [maklaŭd']. Estas ĉirkaŭ 1874, tuj post la alveno de la rajdpolicanoj, kies devo estas la kaptado de kontrabandistoj de viskio. Eniras Jerry Potts, gvidisto por la policanoj, kaj poste du policanoj enĵusantaj du kontrabandistojn mankatenuitajn.

JERRY Nu, jen ĝi, finfine.

UNUA POLICANO Jen du el ili... kaj la pruvaĵo. [*La du policanoj metas plurajn pezajn pakaĵojn kaj unu sakon en angulon.*] Nun ni serĉos la trian. Dume vi restu ĉi tie, Jerry, kaj prizorgu tiujn du. Ĝis revido!

JERRY Ĝis. [*La policanoj foriras.*]

UNUA KONTRABANDISTO Estu bonulo, Jerry, kaj liberigu nin. Estas tro malvarme por mankatenoj.

JERRY Nur se vi promesas ne provi eskapi. Mi respondecas pri vi. Ĉu vi promesas?

UNUA KONTRABANDISTO Mi promesas, je mia honoro.

DUA KONTRABANDISTO Ankaŭ mi.

JERRY Via honoro valoras neniom. Tamen mi akceptas viajn promesojn. [*liberigas ilin; al la unua*] Vi eliru kaj alportu sekan lignon por la fajro. [*tiu foriras; al la dua*] Vi pretigu dormlokojn tie en la angulo. Uzu kion ajn vi povas trovi. Mi prizorgos manĝaĵojn.

Paŭzo dum ili faras tiujn taskojn. La unua kontrabandisto eniras portante brakplenon da ligno kaj skuante neĝon de sur la ŝultroj.

UNUA KONTRABANDISTO Neĝventego komenciĝas. Ĝi estos severa.

TEATRAĴETOJ

Sceno 2

La sama. La fajro brulas, krudaj planklitoj kuŝas pretaj en angulo, kaj la tri viroj manĝas. Subite aŭdiĝas obtuza bato. La pordo malfermiĝas kaj du virinoj enstumblas. La tri viroj rapidas por helpi ilin.

UNUA VIRINO [anhele] Ho... ni... ho... finfine... rifuĝejo... ni apenaŭ atingis ĝin. Ŝi [montrante la alian virinon] preskaŭ mortas; prizorgu ŝin, mi petas, dum mi varmiĝas.

Ŝi mem tiras seĝon al la fajro dum la viroj portas la alian virinon al planklito. Jerry portas kovrilon al la sidanta virino kaj poste iras al la alia por froti ŝiajn manojn kaj piedojn.

DUA KONTRABANDISTO Jerry, ŝi bezonas trinkon da viskio. Ni malfermu botelon, ĉu?

JERRY [kiu multe ŝatas trinki] Kompreneble. Ni havas vizitantojn kaj certe devas taŭge gastigi ilin. Malfermu plurajn botelojn, por ke ni ĉiuj povu festi ĉi tiun nekutiman okazon.

UNUA KONTRABANDISTO Kaj eble, post manĝo kaj trinkado, la sinjorinoj afable rakontos kiel okazis la preskaŭa pereo.

Sceno 3

La sama loko, post tri tagnoktoj. La samaj tri personoj estas sur la scenejo. Ĉiuj estas ebriaj. Malplenaj boteloj kuŝas ĉie, kaj la kabano estas malnetega. Jerry ŝanceliĝas al la pordo, malfermas ĝin kaj rigardas eksteren.

JERRY [ebrie] Tri tagojn ĉi tie. Nu, finfine la neĝo ĉesis. Nun, se nur iu venos kun ĉevaloj. Aŭ se nur viaj ĉevaloj, sinjorinoj, volonte revenos por vi. [ĉirkaŭrigardas] Ni ne plu havas manĝaĵojn kaj restas nur ĉi tiu duonbotelo da viskio. [stulte rigardas ĝin] Kien ĝi iris? [pene refermas la pordon kaj tuj rulfalas sur la plankon]

UNUA KONTRABANDISTO Kiel vi nun fartas, fraŭlino?

DUA VIRINO Sufiĉe bone, dankon. Unu afero, tamen. Mi estas tro varma! [Ŝi komencas demeti bluzon, sed la alia virino firme malebligas tion.]

KVAR TEATRAĴETOJ PRI FRUA KALGARIO

UNUA VIRINO [kaĵole] Retenu ĝin, Manjo. La fajro mortas kaj vi baldaŭ plendos pri malvarmo.

Iu frapas, kaj la du rajdpolicanoj eniras kun la mankatenuita tria kontrabandisto.

UNUA POLICANO Uf! Kia vetero!

DUA POLICANO [ĉirkaŭrigardante] Kaj kia malordo!

UNUA POLICANO [severe] Jerry Potts, kio okazis? Kaj kiuj estas la sinjorinoj?

JERRY Mmmmmi... nne...

UNUA KONTRABANDISTO Ho, lasu lin. Li estas bonkorulo. La sinjorinoj perdis siajn ĉevalojn kaj ni ĉiuj perdis tri tagojn.

UNUA POLICANO [rigardante ĉiujn botelojn kaj homojn] Kaj eble ni policanoj perdis nian reputacion laŭ...

DUA POLICANO [interrompante] La tutan! Vi drinkis la tutan pruvaĵon!

* * *

2. LA NOMADO DE FORTIKAĴO KALGARIO

Roluloj:

KOLONELO BRISEBOIS, RAJDPOLICANOJ, BESTOKAPTISTOJ, INDIĜENOJ, BLANKULOJ, SINJORINO GLENN, SINJORINO LIVINGSTONE

Sceno 1

Novembro 1875. La stabejo de la fortikaĵo. Kolonelo Brisebois [brizbo] sidas malantaŭ granda skribotablo kaj daŭre rigardas paperfolion, suprenlevante ĝin kaj ridetante pro la aspekto.

KOLONELO [stariĝante kaj paŝante tien-reen] Do, jen ĝi. Oni nomis unu fortikaĵon honore al Kolonelo Macleod [maklaŭd] kaj alian honore al Kolonelo Walsh [ŭalŝ]. Estas nur juste... kaj logike... ke mia fortikaĵo portu la nomon Brisebois. [denove rigardas la paperon kun admiro] Jes, mi tre fieras pri tio. Nu, mi tuj komencos uzi ĝin. Mi skribos invitojn por la kristnaska festo. [Li sidas, ankoraŭ ridetante, kaj ekskribas.]

Sceno 2

La 25-an de Decembro 1875. Kristnaskfesto ĉe la fortikaĵo. Multaj homoj ĵus finis la kristnaskan vespermanĝon, inter ili rajdpolicanoj, bestokaptistoj, indiĝenoj de ambaŭ seksoj, kaj blankuloj. Ili ĉiuj babilas kaj la rezulta bruoj estas surdiga.

KOLONELO [stariĝas kaj frapas por silento] Geamikoj, vi evidente jam komprenas kiel bonvenaj vi ĉiuj estas. Ĉi tiu estas tre feliĉa okazo... la unua festo en la fortikaĵo... kaj ni tutkore esperas ke ĝi estos nur la unua el multaj. [fieri] Pro tio, do, mi petas ke antaŭ la dancado vi ĉiuj staru kun mi kaj tostu la feliĉan estontecon de Fortikaĵo Brisebois.

Ili ĉiuj stariĝas, multaj flankenrigardante kaj levante la brovojn.

ĈIUJ Al Fortikaĵo Brisebois!

Sceno 3

Marto 1876. Hejmo de farmisto John Glenn. S-ino Glenn sidas kaj kudras. Iu frapas, kaj virino eniras deskuante neĝon de sur la ŝultroj. Tiu estas s-ino Livingstone, edzino de najbara farmisto.

S-INO G. [rapidante renkonti ŝin] Ho, kara, kia bonvena surprizo. Mi pendigos vian mantelon... jen... nun, sidigu vin, kara, kaj rakontu al mi ĉiajn novaĵojn. Sed, unue, kiel fartas via granda familio?

S-INO L. Tro bone, dankon. Ili estas tiel energiaj kaj viglaj, ĉiuj dek kvar el ili, ke mi tute laciĝas pro la bruoj. Mi ĝojas lasi ilin dum iom da tempo.

S-INO G. Mi tuj boligos akvon por teo. Tio malstreĉos vin. [faras teon] Nun, pri novaĵoj?

S-INO L. La plej grava estas pri nomo por la fortikaĵo. Ĉu vi jam aŭdis?

S-INO G. Ne. Kio pri ĝi? Ĉu ĝi ne estas Fortikaĵo Brisebois?

S-INO L. Ŝajne ne. Oni diras ke Kolonelo Brisebois lastatempe ricevis ordonon de Helpkomisaro Irvine nomi la fortikaĵon Calgarry [kalgari]. Evidente Kolonelo Macleod sugestis tiun nomon al la komisaro.

KVAR TEATRAĴETOJ PRI FRUA KALGARIO

- S-INO G. Kalgari... Mmmm... Kial oni elektis tiun nomon?
S-INO L. Ĉi estas malnova skota nomo kiu multe plaĉas al Kolonelo Macleod. Oni diras ke la vorto signifas “klara, fluanta akvo” – do tre taŭga, ĉu ne?
S-INO G. Povra Kolonelo Brisebois. Li tiom fieris uzi sian propran nomon. Vi memoras la okazon de la kristnaskfestoj?
S-INO L. Jes, mi memoras ĝin. Mi kompatis lin tiam pro lia fiero, sed mi kompatis lin nun eĉ pli.
S-INO G. Kompatinda homo. [*Ŝi donas teon kaj kukojn al la amikino kaj la du rebabilas.*]

* * *

3. LA LOTERIO

Roluloj:

VIRINO, VIRO, PRETERPASANTO, POLICANO, JUĜISTO, PADDY NOLAN

Sceno 1

Strato en frua Kalgario. Virino sidas malantaŭ tablo, super kiu pendas granda ora poŝhorloĝo. Viro staras antaŭ la tablo kaj la virino puŝas bileton al li. Preterpasanto haltas apude.

VIRINO Subskribu ĉi tie viajn nomon kaj adreson, sinjoro, mi petas. Multan dankon... kaj Dio benu vin. [*Ŝi donas al li duonon de la bileto.*]

PRETERPASANTO Kion vi faras? Kies horloĝo estas tiu?

VIRINO Ĝi apartenis al mia mortinta edzo. Mi loteriumas ĝin.

Policano aperis dum tiu parolado nerimarkite de la aliaj.

[*al la preterpasanto*] Ĉu vi volas aĉeti bileton?

PRETERPASANTO Kiom?

VIRINO Unu dolaron.

PRETERPASANTO Jes, mi aĉetos unu. [*Li eltiras dolaron el la poŝo sed la policano interrompas la negocon.*]

TEATRAĴETOJ

POLICANO Sinjorino, mi bedaŭras, sed mi devas aresti vin. Vi faras loterion, kaj vi scias ke tio estas kontraŭleĝa. Venu kviete, mi petas.

Sceno 2

Restoracio. Juĝisto kaj la irlanda juristo Paddy [padi] Nolan sidas kaj babilas.

PADDY . . . Parenteze, mi aŭdis hodiaŭ la plej tristan historion . . . veran, cetere. Ĝi ja rompas la koron nur aŭdi ĝin!

JUĜISTO Ho, kiun historion?

PADDY Tiun de vidvino kies edzo mortis antaŭ pluraj monatoj. Li lasis grandan familion kaj neniom da mono.

JUĜISTO Kiel la virino subtenas tian familion?

PADDY Ŝi laboras, laboregas, laboradas. Ŝi helpas aliajn virinojn . . . purigas domojn, lavas tolaĵojn, kuiras, kudras . . . por nur pagetoj, kompreneble. Iom post iom ŝi vendis la pliparton de la meblaro. Ŝia domo estas nun preskaŭ nuda. Kaj la infanoj . . . kompatinduloj . . . tiel malsataj kaj maldikaj ili estas . . . ja rompas la koron!

JUĜISTO Mi ŝatus helpi ŝin. Ĉu ŝi akceptus almozon?

PADDY Ho, certe ne. Ŝi ankoraŭ havas sian fieron . . . Ŝi decidis, finfine, vendi la lastan posedaĵon de la mortinta edzo, oran poŝhorloĝon. Tre eleganta ĝi estas . . . perbilette ŝi vendas ĝin . . . Jes, vi povus helpi ŝin; vi povus aĉeti, eble, du biletojn. Mi havas kelkajn. [*Li tiras ilin el la poŝo.*]

JUĜISTO [*kun monujo en la mano*] Kiom, Paddy?

PADDY Du dolarojn. [*ricevas la monon*] Dankon. [*stariĝas kaj ekiras*] Ĝis revido ĉe la tribunalo!

JUĜISTO [*sputetante*] Vi . . . vi . . . ho . . . vi . . . !

Sceno 3

La tribunalo. La juĝisto prezidas. La vidvino sidas en la akuzitejo. Paddy Nolan parolas kaj la juĝisto flankenplendas dum la unua frazo.

PADDY . . . Do, resume, ni havas ĉi tiun kompatindan virinon, kiu . . .

KVAR TEATRAĴETOJ PRI FRUA KALGARIO

- JUĜISTO [*interrompante*] Li trompis min, tiu ulo... vere trompis min!
- PADDY . . . faras ion por helpi sin mem. Homoj volas helpi tian virinon, do kion ili faras? Ion kontraŭleĝan. Jes, ankaŭ la aĉetantoj kulpas, via moŝto. Pro kompato ili partoprenas kontraŭleĝan agon... tiuj leĝobeaj homoj. Pro kompato, vi komprenas, Via moŝto... kiel faras eble eĉ vi mem je tia okazo. [*sidiĝas*]
- JUĜISTO [*batante per la martelo*] La proceso nun ĉesos. Lasu libera la akuzitinojn. La kunsido estas fermita. [*Li batas per la martelo kaj ĉiuj stariĝas dum li eliras.*]
- VIRINO [*al Paddy*] Ho, sinjoro, kiel mi povas danki vin? Dio ja benu vin!

* * *

4. PATRINO FULHAM

Roluloj:

GASTIGANTINO, ŜIA NEVINO VIRGINIA, ALIAJ VIRINOJ, D-RO MACKID, PATRINO FULHAM

Sceno 1

Kalgario, ĉirkaŭ 1895. Sur larĝa verando de impona domo fronte al la oficejo de la kuracisto d-ro Mackid [makid], kelkaj bone vestitaj virinoj sidas kaj trinkas teon.

- GASTIGANTINO Mi tiel multe ĝojas ke vi ĉiuj povis veni renkonti mian nevinon Virginia dum ŝia vizito.
- UNUA VIRINO Kiel vi ŝatas nian urbon?
- VIRGINIA [*kun multe da entuziasmo*] Ho, ĝi estas aminda! Kaj tiel malgranda!
- DUA VIRINO Se vi komparas ĝin kun via Toronto, jes. Tamen ĉi tie, en la Teritorioj, ĝi estas unu el la grandaj lokoj.
- VIRGINIA [*subite kaj kun grimaco*] Kio estas tiu terura odoraĉo?
- UNUA VIRINO [*kun rido*] Ho, Patrino Fulham evidente proksimiĝas. [*Ĉiuj ridas.*]

TEATRAĴETOJ

DUA VIRINO Jes, tie ŝi estas... kaj ŝajne lamas.
VIRGINIA Kio pri ŝi? Kial vi ridas? Kial ŝi tiel odoras?
GASTIGANTINO Ŝi bredas kaj vendas porkojn, kaj kolektas forĵetaĵojn el la hoteloj por nutri ilin.

Ili rigardas silente dum Patrino Fulham malrapide marŝas laŭlonge de la kontraŭa ligna trotuaro. Ĝuste kiam ŝi preterpasas la oficejon de d-ro Mackid, la kuracisto mem eliras por samdirekte marŝi. Li rimarkas, kiel la virino lamas, kaj vokas ŝin. Li estas juna, tre ĝentila viro.

D-RO MACKID Sinjorino Fulham!
PATRINO FULHAM Jes, doktoro?
D-RO MACKID Vi lamas. Ĉu eble mi povas helpi vin?
PATRINO FULHAM Mi ne havas monon por forĵeti al riĉaj kuracistoj.
D-RO MACKID Mi nur volas helpi vin. Ĝi kostos al vi neniom.
PATRINO FULHAM Ho, tiuokaze, dank'.

Li kondukas ŝin en la oficejon.

Sceno 2

En la oficejo de d-ro Mackid.

D-RO MACKID [tirante seĝon kaj piedbenketon] Sidigu vin, mi petas. Bone. Nun, malsuprentiru la ŝtrumpon.

Ŝi faras tion, montrante malpuregan piedon. La okuloj de la kuracisto larĝiĝas kaj li iom grimacas.

PATRINO FULHAM Jen ĝi, la malbenita kalkano. Pro la ŝuaĉo... ĝi frotis ĝin.

D-RO MACKID [parolante dum traktado de la veziketo] Vi pravas pri la aĉaĵo. Ĝi estas tiel malpura, ke mi miras pri la manko de infekto. Vi devus lavi ĝin pli ofte. [surmetas bandaĝon kaj denove parolas] Finite. Mi vetas, ke nenie en Kalgario troviĝas alia tiel malpura piedo!

PATRINO FULHAM Akceptite! Montru vian dolaron. Jen la mia.

La kuracisto demande rigardas ŝin, dum ŝi malsuprentiras la alian ŝtrumpon, montras eĉ pli malpuran piedon, kaj etendas la manon al li.

KVAR TEATRAĴETOJ PRI FRUA KALGARIO

D-RO MACKID Jen ĝi. [*Li skuas la kapon pro miro, dum li transdonas dolaron.*] Prizorgu tiun kalkanon, sinjorino; ne forgesu.

PATRINO FULHAM [*leviĝante kaj montrante la dolaron*] Kial? Ju pli ofte mi devas viziti vin des pli baldaŭ mi riĉiĝos! [*Ŝi eliras laŭte ridegante.*]

POEMOJ

RELEVIĜO

Antaŭ monato mortis li tre aĝa,
post plena vivo, kaj volonte.
Revenigis lin la kuracistoj
malsana sed vivanta nur dirante.
Konstante flegistino zorgas lin,
sperta, dolĉa, tamen ne utila,
ĉar li malofte sentas ŝin apude
pro l' tortur' persona kaj brutala.
Multe ĝenis lin, antaŭ lia morto,
aŭdi pri l' mizer' de l' Tria Mondo,
sed, je l' moment' de ĉiu nadlopik',
mortas sen lit' patrino tie kiel hundo.
Ankaŭ ĝenis lin ke la scienc',
mirakle savi vivojn scipovante,
kvazaŭ skorpi' heroajn homojn trafas
per dorsa bomb', aĉulojn dum-savante.
Kaj li scivolis kia estos la fin'...
mondloĝantaro preter la manĝrimed'...
kaj miris ke la junular' kuraĝas
infanojn naski dum tia impostkreskad'.
"Pripensu," diris li, "la koston por malsanaj,
krimuloj kaj la nekapablaj mense."
Esperis li, ke post lia propra utilec',
oni ne retenos lin sence.
Antaŭ monato mortis li tre aĝa,
post plena vivo, kaj volonte.
Revenigis lin la kuracistoj
malsana sed vivanta nur dirante.

1958 (*anglalingve*); 1987 (*esperantlingve*)

HOMO SAPIENS

Pratempe ĉe l' utero de la mar'
Potenco trafis ion ĝis la viv':
en akva unuĉela solec' do
ekestis nia prapatro en la driv'.

Tio iĝis duoj,
la duoj kvaroj,
la kvaroj okoj
en sekundodaŭroj.
El tiu pramiraklo
ie en la akva dom'
malrapide, finfine evoluis
la nobla, saĝa kreitaĵo, Hom'.

Amebo, hidro, trilobit',
fiŝo, lacerto kaj dinosaŭr'
fekundis pli ol la tuta vegetaĵar',
por nutro mortigadis sen bedaŭr'.

Glacio, mamuto, la sabrodenttigro,
glacio, primatoj, Neandertalhom',
kavernoj, metioj, dum libertemp' artoj,
semado, komenc' de socio pro l' dom'.

La fajr', la plugil', la rado, la vel',
kalendar', alfabeto, potenca presil',
preĝejo, juĝej', parlament' kaj lernejoj' ...
homprogreson rimarkis siavice ĉiu il'.

Homa, ĉevala, akva kaj venta,
vapura, elektra, nuklea potenc':
vojaĝ' per piedo, kales' kaj ĉeval',
trajn', aŭtomobilo kaj aviadil':
Novaj' per najbaro, heroldo, ĵurnal',
radio kaj mirakla televidil'.



Mortigad' kavernhoma, invadoj de triboj,
landlimaj bataloj, tutmonda milit':
dum longaj epokoj kun sangama fort'
hom' cerbon ignoris, fieris pri mort'.

Hodiaŭ, pro lingvaj bariloj fortikaj,
pro malakord' grava pri gento kaj kred',
pro strangaj, konfliktaj ideologioj
hom' estas de ĉiu fremdulo la pred'.

Kontraŭ sia homa gent' malamika
li ĝenas sin ĉe la rakeda staci':
nedisciplinita mem, tamen paradas
memfidon pri kosma la ekspedici'.

Pritraktu lin milde, Potencoj eksteraj:
detenu tondradon de via koler':
pripensu la ĉiam provantan scivolon
kaj egan kuraĝon de tiu pulver'.

Rigardu vi reĝe lian nematurecon
tra l' eternec' de via tempa lens':
tra spaco konduku lin ĝis la memvenko
kaj rajto al nom' Homo ja sapiens!

1965

LA KANTANTA BIRDETO

Li estis tia hom', kiu sub la ter'
hakante polvan karbon ĉirkaŭ si,
tiris ĉielon bluan el sia anim',
kantantan etan birdon krome en ĝi.

Tiom potencaj liaj spirit' kaj vort':
ĉiu kolego laboreganta tie
Voĉon sonigis en pli pura aer',
birdkanton ravan ŝveligante ĉie.

1961

AŬTUNA ODO

Ho kara, vasta, bela, ĉarma lando,
mia Kanado! Tiel ridetante
vi etendiĝas de la mara rando
trans stepojn kaj arbarojn, kunportante
viajn riĉaĵojn sur kaj sub via brusto
ĝis de alia mar' la sala gusto.

Tiom mi amegas parton mian,
kie sunhelaj tagoj ĉiam ridas,
kie sur blua ĉielo benon Dian
ĉe ŝinukarko mi tiel ofte vidas...
tiu arko, kiun la milda ŝinukvento
blove desegnas en la okcidento.

Aŭtuna gloro tra la land' troviĝas
kvazaŭ vasta brilo de fajraro:
folioj multkoloraj disbloviĝas
flirte en la korojn de l' homaro:
sorĉas silenta solentim' la koron,
kaj kreitaĵoj faras Di-adoron.

Kritikantoj, plendu se vi volas.
Mi, male, alte taksas la bonŝancon
loĝi tie, kie mi parolas
libere, ĝoje plonĝas en la dancon
de vivo, kaj ricevas ĉiun specon
de bono... krome l' aŭtunbelecon!

1962

PRINTEMPA HEROLDO

Aŭskultu, vi, aŭdu,
jen mi, Dafodilo,
per mia trumpet'
anoncante printempon.

Aŭskultu mesaĝon
plenplenan de ĝoj',
"Persefona amata
eliras Hadeson.

Plutono severa,
nevole cedante
l' edzinon, ebligas
burĝonan kreskadon."

Herold' de revivo
per ora trumpeto,
flugil-ornamita,
triumfe mi blovas.

Rapidu, vi, dancu
kaj kantu kaj semu
ĉi tiun printempon
la semojn de amo...

la semojn de amo
en ĉiun homkoron.
Mallonge mi blovos
per mia trumpeto.

1963

LAMENTO

Rigardu mire ŝin, kiu vere devis morti,
tiom malsanega iam estis ŝi:
per hom-kun-Di-miraklo ŝi estas fortiĝinta,
kaj nun mortdevulino staras inter vi.

Rigardu ankaŭ min, marasman, kompatindan,
tiom malsanega nuntempe estas mi:
dolore mi sopiras la morton dezirindan,
sed Morto nur fingrumas, mokridante "Fi".

Strange kiel la sorto katmusas kaj petolas
je la homaj vivoj, kiel atestas ni:
vivante bonsanega ŝi ĝojas; sed se volas
iu homo morti, certe estas mi.

1962

TRADUKOJ

TRE GAJA KRISTNASKO

de Morley Callaghan

Post noktomezo je antaŭkristnasko centoj da homoj preĝadis ĉe la kripo de la Eta Jesuo. Ĝi staris dekstre de la altaro sub branĉoj de ĉiamverda arbo en la Preĝejo de Sankta Maleaĥio. Tiun nokton jam okazis falo de malseka neĝo, kaj vidiĝis kota vojeto ĝis la kripo. Silvanus O'Mera, la maljuna sakristiano kiu estis helpinta pretigi la kripon, kaj Pastro Gorman, la dika ruĝvizaĝa paroĥa pastro, konsentis ke tiu estas la plej vivsimila kristnaska sceno kiun ili iam ajn vidis en la preĝejo.

Sed frue en la kristnaska mateno Pastro Gorman kuris al O'Mera, kun la vizaĝo sensanga, la manoj tordiĝantaj, kaj kriegis: "Terura afero okazis. Kie estas la Eta Jesuo? La kripo estas malplena."

O'Mera, pia senkulpa mirema maljunulo kiu multe preĝadis kaj sentis sin tre proksime al Dio en la preĝejo, konfuziĝis kaj flustris: "Kiu povus preni ĝin? Kien preni ĝin?"

"Rigardu mem la kripon, ulo, se vi ne kredas min," diris la pastro, kaj li ekprenegis la sakristianon, marŝigis lin en la preĝejon kaj montris ke ja mankas la figuro de la Eta Jesuo.

"Iu prenis ĝin, kompreneble. Ĝi ne forflugis. Sed kiu prenis ĝin, jen la demando," la pastro diris. "Kiam vi lastfoje vidis ĝin?"

"Mi scias ke la lastan nokton ĝi ankoraŭ restis," O'Mera diris, "ĉar post la noktomeza meso, kiam ĉiuj aliaj estis jam for, mi vidis s-inon Farel kaj ŝian knabeton ĉi tie surgenuajn. Kiam ili stariĝis mi deziris al ili gajan Kristnaskon. Vi ne opinias ke ŝi tuŝus ĝin, ĉu?"

"Kia stultaĵo, O'Mera. Troviĝas neniu pli bona virino en la paroĥo. Mi manĝos ĉe ŝi tiun ĉi vesperon."

"Mi rimarkis ke ŝi volas hejmeniri, sed la knabeto deziras tie ĉi apud la kripo resti kaj preĝi. Post ilia foriro mi mem iomete preĝis, kaj la Eta Jesuo ankoraŭ restis."

Denove prenegante O'Meran perbrake la pastro ekscitate flustris: "Devas esti ago de ateistoj. Ne estas la unua fojo, je kiu ili atakis nin. Memoru la fajron en la preĝejo."

O'Mera diris nenion. Li estis lojala, kaj ne ŝatis memori al la pastro ke la fajro en la preĝejo antaŭ kelkaj monatoj okazis pro la postaĵo de cigaredo kiun la pastro lasis en poŝo dum ŝanĝo de la ornato. Li perpleksiĝis kaj dum

tempeto silentis, fine frustrante: “Eble iu vere volis forpreni Dion, ĉu vi konsentas?”

“Preni Lin el la preĝejo?”

“Jes. Forpreni Lin.”

“Kiel oni povus preni Dion el preĝejo, ulo? Ne estu stulta.”

“Tamen eble iu ja kredis ke oni povas, komprenu.”

“O’Mera, vi parolas kvazaŭ idioto. Ĉu vi ne konstatas ke vi tute cedas al la ateistoj per tiaj diraĵoj? Ĉu vi kredas ke figuro estas Dio mem? Ĉu ni adoras idolojn? Nepre ne. Do, neniom plu da tio. Se ateistoj unufoje penis bruligi la preĝejon, ili ne ĉesos ĝis ili profanos ĝin... Dio helpu min. Kial tio devas okazi en mia preĝejo?” Li multe ekscitiĝis kaj forrapidis kriante: “Mi telefonos al la policejo.”

Ŝajnis kiel komenco de malagrabla Kristnasktago por la paroĥo. Policistoj venis, perpleksiĝis, kaj intervjuis ĉiujn. Raportistoj alvenis. Ili fotografis la preĝejon kaj Pastron Gorman, kiu ĵus finis prediki, je surprizego de la ĉeestantaro, pri vandala perfortado al la domo de Dio. Grupoj de homoj en dimanĉaj vestoj staris ekster la preĝejo kaj serioze interparolis. Ĉiuj scivolis pri tio kion la ŝtelinto faros kun la figuro de la Eta Jesuo. Ĉiuj sentis sin vunditaj, agitataj kaj mirantaj. Certe estos io ege riparolinda en la najbarejo dum la kristnaska manĝado.

Sed Silvanus O’Mera foriris sola kaj malfeliĉa. De tempo al tempo li eniris la preĝejon kaj rigardis la malplenan kripjon. Li havis multajn strangajn pensojn. Li diris al si ke, se oni vere dezirus dolorigi Dion, nur tia volo dolorigus Lin, ĉar kia alia rimedo troviĝas por vundi Lin? La pasintan nokton li havis la senton ke Dio ŝvebas tute ĉirkaŭ la kripo; nun ŝajnis kvazaŭ Dio estus tute for.

Estis ne nur pro la foresto de la figuro; estis pro tio ke iu perfortis tiun sanktan lokon kaj forpelis Dion. Li diris al si, ke oni ja povus fari agojn kiuj donus al Dio la emon forlasi lokon. Estis malfacile scii kie troviĝas Dio. Kompreneble Li ĉiam restos en la preĝejo; tamen kien malaperis tiu parto de Li, kiu antaŭe ŝajnis esti tute ĉirkaŭ la kripo?

Tiu ne estis demando proponenda al la grupetoj de konsternitaj paroĥanoj sur la trotuaro ekster la preĝejo. Tiuj preferis montrafringumi, pufigi la vangojn kaj babili pri tio kio okazis al Dio en Meksikio kaj Hispanio.

Sed, kiam ĉiuj hejmeniris por la tagmanĝo, O’Mera mem eksentis sin iom malsata. Li eliris. Starante antaŭ la preĝejo kaj sentante sin dankema pro la kvanto de neĝo por la infanoj je Kristnasko, li ekvidis tiun bonegan kaj eminentan

virinon, s-ino Farel, kaj ŝian knabeton. Ili alproksimiĝis. Sur la vizaĝo de s-ino Farel estis severa kaj kolerema esprimo, kaj ŝiaj paŝegoj estis tiel longaj kaj furiozaj ke la kvinjarulo, kies manon ŝi strikte tenis, apenaŭ povis alkonformigi sin kaj samtempe tiri sian grandan ruĝan sledon. Kelkfoje, kiam la knabo penis sin malantaŭen klini, li fariĝis plumbopeza, kaj ŝi tiregis liajn piedojn de sur la tero dum li plend-ploretis: “Ho ve, ho ve, lasu min libera.” Lia ruĝa neĝmantelo estis tute neĝkovrita, kvazaŭ li estus ruliĝinta sur la vojo.

“Gajan Kristnaskon, s-ino Farel,” O’Mera diris. Kaj li kriis al la knabo: “Ne feliĉa je Kristnasktago? Kio okazis, fileto?”

“Veran gajan Kristnaskon, s-ro O’Mera,” la virino kvazaŭ ekmordis. Ŝi ne kutimis atenti la sakristianon, ĉiam farante al li nur kapklineton, kaj nun ŝi estis tro kolera kaj ĉagrenita por ĝeni sin pri li. “Kie estas Pastro Gorman?” ŝi demandegis.

“Ankoraŭ en la policejo, mi kredas.”

“En la policejo! Dio helpu nin! Ĉu vi aŭdis tion, Joĉjo?” ŝi diris. “Ho Dio, estas terure. Kion mi devas fari?”

“Kio okazis, s-ino Farel?”

“Mi ne faris ion ajn,” la infano diris. “Mi ja intencis reveni, kredu al mi, sinjoro.”

“S-ro O’Mera,” ekparolis la virino kvazaŭ venante per granda alto malsupren al la nivelo de negrava simpla maljunulo, “eble vi povus fari ion por ni. Rigardu tion sur la sledo.”

“O’Mera rimarkis ke malnova mantelo kovras ion sur la sledo kaj, kliniĝante por ĝin levi, li vidis la figuron de la Eta Jesuo. Li tiel ĝojiĝis ke li nur suprenrigardis al s-ino Farel, mirante skuis la kapon kaj diris: “Denove ĝi estas ĉi tie, kaj neniu difektis ĝin.”

“Mi hontas, mi hontegas, s-ro O’Mera. Vi ne scias kiel multe mi ĉagreniĝas,” ŝi diris, “sed la infano vere ne sciis kion li faras. Estas hontego al ni, mi scias. Estas mia kulpo ke mi ne pli bone edukis lin – kvankam Dio scias ke mi penadis emfazi al li respekton al la preĝejo.”

Ankoraŭ ne kredante, O’Mera demandis: “Ĉu vi volas diri ke li vere portis ĝin el la preĝejo?”

“Li faris, li vere faris tion.”

“Imagu tion. Nu, knabo, tio estas terura ago,” O’Mera diris. “Pro kia kialo?” Tute perpleksiĝinte, tamen tiel malŝarĝite revidi denove la figuron de la Eta Jesuo, li ne povis ne meti la manojn dolĉe sur la knabetan kapon.

“Ĉio reboniĝos, ĉu ne?” demandis la knabo.

TRADUKOJ

“Estis frue ĉi-matene, tuj post lia ellitiĝo, preskaŭ la unua ago de la kristnaska tago,” interrompis la patrino. “Evidente li rekte eniris, levis ĝin, kaj prenis ĝin al la strato.”

“Sed kio igis lin fari tion?”

“Sensenca li estas pri tio. Li diras ke li devis fari tion.”

“Kaj mi devis, ĉar estis promeso,” la infano diris. “La lastan nokton mi promesis al Dio ke, se Li devigos Panjon donaci al mi grandan ruĝan sledon, al Li mi donacos la unuan veturon.”

“Ne pensu ke mi tiajn stultajn aferojn instruis al li,” s-ino Farel diris. “Mi estas certa, ke li intencis nenian ĉagrenon. Li tute ne komprenis kion li faras.”

“Jes, mi ja komprenis,” obstine diris la infano.

“Silentu, infano,” ŝi kriis, skuetante lin.

O'Mera surgenuiĝis ĝis la okuloj estis ĝuste kontraŭ tiuj de la infano, kaj ili rigardis unu la alian ĝis amika interkompreno. Tiam la maljunulo dolĉe demandis: “Sed kial vi volis fari tion por Dio?”

“Ĉar ĝi estas bonega sledo, kaj mi kredis ke Dio ŝatos veturon sur ĝi.”

O'Mera levis la figuron de la Eta Jesuo kaj rigardis la ruĝan sledon. Subite li havis senton de granda ĝojo, de stranga bonega novaĵo, senton ke ĉi tiu povus esti la plej mirinda Kristnasko en la tuta historio de la urbo, ĉar certe Dio estis kun la infano dum tiu ĝoja senzorga feria sledveturado, kiam la knabeto kuris laŭlonge de la strato tirante la sledon. Kaj O'Mera, kun la vizaĝo brila pro ĝojo kaj la okuloj plenaj de solena timo, turnis sin al la virino kaj firme diris: “Lasu lin libera, kaj diru nenion plu al li. Li pravas. Mi kredas ke tion Dio ja vere ŝatis.”

MORLEY CALLAGHAN (1903-1990)

Morley Callaghan [morli kala han] naskiĝis en Toronto, kie li pasigis la pliparton de la vivo. Tie li ĉeestis la Kolegion de Sankta Mikaelo, la Universitaton de Toronto, kaj la Lernejon de Juro ĉe Osgoode Hall. Dum la kolegiaj jaroj li laboris kiel raportisto por ĵurnalo kaj komencis verki novelojn.

Li pasigis la jaron 1928-29 en Parizo, kie dank' al amiko lia, la fama Ernest Hemingway, eldonistoj de malgrandaj literaturaj gazetoj akceptis kaj publikigis plurajn el liaj verkaĵoj. Poste, en Usono, la bone konata verkisto F. Scott Fitzgerald faris similan komplekson al li.

En la Dua Mondmilito Callaghan aniĝis al la Reĝa Kanada Mararmeo kaj faris specialajn taskojn sub la egido de la Nacia Filmkomisiono. Poste li vojaĝis tra Kanado kiel estro de la radia programo "Citizens' Forum" (Forumo de Civitanoj).

Li revenis al Toronto kaj restis tie dum la resto de sia vivo, verkante romanojn kaj novelojn kaj estante ofta populara partoprenanto ĉe radiaj programoj. Dum sia longa vivodaŭro li gajnis multajn imponajn premiojn kaj medalojn de la registaro kaj diversaj asocioj, kaj honorajn titolojn de pluraj universitatoj. Li edziĝis en 1927 kaj havis du filojn.

DU POEMOJ

de E. J. Pratt

EROZIO

Jarmilon bezonis la maro por skizi
granitajn trajtojn ĉe tiu klif'
sur ties krutaĵon, eskarpon kaj bazon.
Kia giganta hieroglif'!

Nur unusolan horon bezonis
la sama mar', dum ŝtorma invad',
granitajn sulkojn sur virinvizaĝon
meti. Kia hororskulptad'!

MEVOJ

Flugis ili, kaj dum moment' ĉizita,
mankis al la lingvo vortkompar'...
senbriliĝis ebur', arĝent' kaj kristalar'.
Sur blua horizonto gravurita
la friso sen ia konkuranto restis,
ĉar la flugila sintenado estis
tia, ke ĝia pureco makuligus
la neĝan parabolon, nebuligus
la drivon de la brilaj steloj
kontraŭ ĉielon de indig' tropika.
Unu post alia, ĉiu unika,
propran lokon trovis sur la ŝveloj,
kies krestoj kaptis spektron de la sun',
aŭ en verdaj kavoj ferlis mil flugilojn.
La mond' ne naskas el la ter' liliojn
blovatajn pli libere en florar'
ol tiuj sovaĝorkideoj de la mar'.

E. J. PRATT (1882-1964)

Edwin John Pratt estas unu el la plej elstaraj poetoj de Kanado. Li naskiĝis en Newfoundland sesdek sep jarojn antaŭ ol ĝi fariĝis provinco. Lia patro estis pastro kaj do, laŭ la kutimo de pastroj, devis transloĝiĝi ĉiun kvaran jaron al alia fiŝkaptista vilaĝo. Kiam E.J. estis juna viro li ĉeestis la Metodistan Kolegion de Sankta Johano; poste li preĝis kaj instruis en foraj komunumoj. Li tiam ekstudis ĉe la Universitato de Toronto kaj doktoriĝis pri teologio en 1917. Li instruis ĉe ĝia Viktoria Kolegio ĝis 1953.

D-ro Pratt edziĝis en 1918 kaj havis unu filinon. De 1936 ĝis 1942 li estis redaktoro de CANADIAN POETRY MAGAZINE (Kanada Poezia Gazeto). Li interesiĝis pri la verkoj de junaj verkistoj kaj kuraĝigis tiujn kiuj montris talenton. Por si mem li gajnis rekonon per siaj rakontaj, historiaj poemoj.

En 1930 Pratt ricevis honorajon de la Reĝa Asocio de Kanado, kaj en 1940 la medalon Lorne Pierce. En 1946 li fariĝis Komandoro de la Ordeno de Sankta Mikaelo, kaj en 1961 ricevis la medalon de la Kanada Konsilio kune kun honora doktoriĝo ĉe la Universitato de Toronto.

PRERIA ANEMONO

(*Anemone patens*)

de Annora Brown

el ŝia libro *Old Man's Garden* (Ĝardeno de maljunulo)

Antaŭ jarcento kaj duono Alexander Mackenzie [aleksander makenzi] staris sur la bordo de Pacifiko tenante per la fingroj malgrandan purpuran floron kun molhara tigo. Li similigis ĝin al eta flava butono havanta ses purpurajn sepalojn. Por li, eĉ tiam, malgraŭ sia fremdeco, ĝi estis signo ke lia longa vintro de mallibereco finiĝis, kaj ke la tempo por agado alvenis. Li pretigis la boatojn kaj provizojn, kaj iris trans la montojn por ekvido de Pacifiko kaj por grava rolo en la historio de kontinento.

Ekde tiam ĉi tiu malgranda preria anemono, kiu spitas la malvarmajn ventojn de printempo, fariĝis la simbolo de libereco kaj agado, de la spriteco de la frua sezono, al multaj miloj da homoj.

Laŭ greka tradicio Anemoso, la vento, utiligis delikatajn etajn florojn por anonci sian alvenon en printempo. Ĉi tiujn florojn Platono klasigis inter la anemonojn. Dum la sekvaj jarcentoj oni aplikis tiun nomon al la tuta familio de plantoj kun similaj ecoj. Kiam, sur la okcidentaj kampoj de la nordamerika kontinento, botanikistoj trovis plantojn kun ĉiuj trajtoj de tiu familio, ili klasigis ilin kiel preriajn anemonojn: laŭvorte, florojn de la preria vento.

Dume, tamen, la floro fariĝis konata al aliaj homoj ne tiel spertaj botanike, kaj tiuj penis trovi por ĝi nomon jam familiaran laŭ ilia ĝisnuna scio. Homoj el Anglio, sentante ke ĝi memorigas ilin pri la plej fruaj razenaj floroj hejme, nomis ĝin *crocus* (krokuso), dum vojaĝantoj el Francio aŭ aliaj eŭropaj landoj, donis al ĝi la nomon “paska floro” laŭ simila tiea specio, tiel nomata ĉar ĝi floras je Pasko kaj ĉar ĝiajn purpurajn petalojn oni uzis por tinkturi paskajn ovojn.

La nomo “anseridoj”, kiun preriaj infanoj donis al la lanugaj burĝonoj, estis ege taŭga, sed la indiĝena nomo estis eĉ pli bona. La indiĝenoj (indianoj), nemalhelpite de la greka tradicio kaj la sentimentaleco de la malnova mondo, havis perfektan genion por elekti la plej poeziajn kaj signifoplenajn nomojn por aĵoj ĉirkaŭ si. “Oreloj de la Tero” ili nomis ĉi tiujn lanugajn orelojn, kiuj, kiel eble plej frue post la degelo de la neĝamasoj, sin suprenpuŝas por anticipi la unuan malfortan susuron de somero.



Ĉi tiu floro de printempo, ĉi tiu preria anemono, havas tiel firman tenadon en la koroj de homoj, kie ajn ĝi estas indiĝena, ke estas nur logike ke multaj rakontoj evoluis pri ĝi. La jena legendo klarigas de kie ĝi ricevis la peltmantelon, kiu estas tiel aminda trajto. Komprenoble la sciencemuloj klarigos ke la pelto estas ne por doni varmon sed, pli ĝuste, por protekti la floron kontraŭ etaj rab-insektoj. Tamen, kiel floramantoj, ni havas la privilegion ignori tiajn regulojn de kaŭzo kaj efiko, kaj ĝui la rakonton nur pro ĝia poezieca valoro.

Kiel la preria anemono ricevis sian peltmantelon

Wapi [ŭapi] frostotremis kaj tiris sian robon pli strikte ĉirkaŭ sin. Estis malvarme tie sur la monteta deklivo, sed la tremo estis pli pro timo kaj soleco ol pro malvarmo. Ĉiam antaŭe li estis dorminta en la tipi (vigvamo, tendo) de la gepatroj, kie la patro povis protekti lin.

Sed fine la patro estis decidinta: “Wapi ne plu estas infano. Estas tempo ke li iru al la montetoj por sonĝi kaj fariĝi viro.”

Do jen li, sola, sur monteta supro, la mistera stelaro super li, la longa vico de ankoraŭ dormantaj montoj for en la okcidento, kaj nenio ĉirkaŭ li krom senlima malpleneco.

La antaŭan matenon li estis irinta kun gaja koro. La neĝoj de la vintro estis nur lastatempe degelintaj, la suno estis varma; kaj ĉu li ne sonĝos ĉi-nokte mirindan sonĝon, kiu ŝanĝos lin de lia ĝisnuna knabeco al lia estonta vireco? Tamen nun la ĉielo eklumiĝis pro la denove venanta tago, kaj dum la tuta nokto li estis kuŝinta, ne kun brilaj vizioj, sed kun malluma spaco kaj soleco kaj timo.

La montoj ŝanĝiĝis de malhela malvarma grizo al pala rozo, tiam al purpuro, kaj fine al brilanta bluo, sed Wapi, senmova kaj melankolia, ankoraŭ kaŭris sur la monteta pinto. Tri pluajn noktojn kiel la ĵus pasintan li devas pasigi, tiam reen iri al la patro kaj amikoj kaj diri ke li ne estas viro, sed nur malkuraĝulo, kiun la Granda Spirito trovis malinda eĉ por sonĝo.

La tago komencis varmiĝi, kaj la sento de granda laceco kaj malsukceso leviĝis, kiel ĝi ĉiam faras en la ĉeesto de la sundio. Krome, Wapi estis ne plu sola. Li estis trovinta amikon. Apud li sur la monteta pinto sidis bela floro, tiom blanka kiom la neĝo kiu nun kuŝis sur la deklivoj de la malproksimaj montoj antaŭ sia somera vojaĝo al la norda lando. La floro malfermis sian koron por saluti la oran sunon, kaj balanciĝis kaj kapjesis al Wapi, ĝis lia afliktita menso trankviliĝis pro la paco de bluaj montoj kaj ventlavita preria herbo.

Wapi sidis kaj rigardis la korvojn okaze flugantajn tien kaj reen, kaj vidis akcipitron kiu faris larĝan cirklon alte super li, kaj aŭskultis la susuron de kreskaĵoj sub li, kaj fine komencis pensi gravajn pensojn. Tiel pasis la tago.

La montoj fariĝis rozkoloraj, poste grizaj. La suno glitis malsupren malantaŭ ili, lasante denove al Wapi la mallumon kaj la stelojn, sed ne la malplenecon, ĉar nun li havas amikon, la blankan floron, apud si.

“Eta frato,” diris li, “estas malvarme por tiel delikata beleco dum ĉi tia nokto. Mi kuŝos proksime al vi kaj ŝirmos vin per mia varma robo, sed mi devas zorgi por ne premeĝi vin per mia peza korpo.”

Do, dum unu parto de lia menso dormis kaj ripozis, la alia parto gardis la floron.

Kiam la mallumo de la nokto estis ĵus fariĝinta preta renkonti la lumon de la tago, la floro parolis: “Hieraŭ, Wapi, vi estis malĝoja ĉar vi timiĝis. Tiu, kiu neniam konas timon, estas stultulo. La saĝulo lernas venki ĝin kaj profiti de ĝi.”

Wapi sidiĝis kaj kliniĝis super la floro por pli bone aŭdi tion kion ĝi eble ankoraŭ diros, sed la floro nur kapjesis kaj balanciĝis pro la matena venteto.

La tutan tagon Wapi meditis pri la diro de la floro, kaj tiun nokton, kiam li kuŝiĝis por dormi, li denove ŝirmis ĝin per sia robo el pelto. Denove, ĝuste kiam la Matena Stelo rigardis la prerian panoramon, la floro parolis.

“Vi havas noblan koron, Wapi. Ĝi gvidos vin al gravaj celoj.”

La sekvantan nokton, ankoraŭfoje ŝirmate sub la peltmantelo, la floreto denove parolis. “Saĝeco kaj milda koro faros el vi faman gvidanton. Tamen, kiam vi kurbiĝos pro ĉagrenoj kaj zorgoj, memoru ke sur proksima monteta pinto vi trovos pacon kaj saĝecon.”

Tiam Wapi endormiĝis kaj vidis, malklare, multajn viziojn de tio kio okazos kiam li fariĝos ĉefo de sia tribo, kaj lia popolo fariĝos feliĉa, kontenta kaj prospera.

Antaŭ ol leviĝi por reiri al sia popolo, li pensis denove pri la floro. “Eta frato,” li diris, “dum tri noktoj vi konsolis min en mia soleco kaj portis al mi viziojn. Diru al mi, nun, tri el viaj deziroj, por ke mi povu peti ilin por vi de la Granda Spirito.”

La floro, kapjesante, respondis: “Preĝu, mi petas, ke mi havu la purpuran bluan de la foraj montoj en miaj petaloj, por ke la homoj deziru mian kuneston kaj trankviliĝu. Due, mi havu etan oran sunon por teni ĉe mia koro, kaj por ĝojigi min dum malbrilaj tagoj kiam la sundio kaŝas sin. Laste, mi havu varman mantelon similan al via peltrobo, por ke mi povu fronti la malvarmajn

ventojn blovantajn de la degelanta neĝo kaj povu doni al la homoj komforton kaj la esperon ke pli varmaj ventoj sekvos.”

Plaĉis al la Granda Spirito ke la unua penso de Wapi estis por la floro, kaj liaj preĝoj estis plenumitaj. Nun, kovrante la deklivojn, miloj da posteuloj de la eta blanka amiko de Wapi frontas la malvarmajn ventojn de frua printempo, kun la koloro de la foraj montoj en siaj petaloj, brila suno en ĉiu koro, kaj varmaj molharaj roboj sekure volvitaj ĉirkaŭ ili.

ANNORA BROWN (1899-1987)

Annora Brown [anora braŭn] naskiĝis proksime al Red Deer (Ruĝa Cervo), Alberta, sed pasigis la unuan duonon de la vivo pli sude, en Macleod [maklaŭd]. Ŝia patro antaŭe estis rajdpolicano tie, do inter la familiaj geamikoj troviĝis pluraj indiĝenoj. Estis de ili ke Annora lernis la multajn legendojn kiujn ŝi poste rakontis en la libro el kiu la supra rakonto estis tradukita.

Ekde frua aĝo Annora skizis kaj pentris la florojn, birdojn kaj pejzaĝon apud la Rivero de la Maljunulo. Poste, dum kvar tre feliĉaj jaroj, ŝi studis ĉe la Kolegio de Arto en Toronto, bonŝance havante tie du membrojn de la fama “Grupo de Sep” kiel instruistojn. Ŝi licenciĝis kun honoroj.

La deprima periodo de la “malpuraj tridekaj” kaj la serioza malsano de ŝia patrino koincidis. Kiam la patrino finfine mortis, Annora kaj la maljuniĝanta patro iel sukcesis subteni sin. Estis dum la lastaj de tiuj jaroj ke Annora verkis OLD MAN’S GARDEN. Ĝi estas libro en kiu Annora priskribas ĉiujn florojn kaj arbojn de la regiono, kaj enhavas desegnon por ĉiu el ili. Nun tiu libro estas trezoro por kolektanto.

Kiam la patro mortis, Annora decidis transloĝiĝi al Viktorio, Brita Kolumbio, kie multaj el ŝiaj geamikoj jam loĝis. Ŝi aĉetis bieneton en kiu kreskis altaj arboj kaj sovaĝaj floroj. Dum tiu periodo ŝi produktis, kune kun pentraĵoj, “serigrafiaĵojn”, kaj verkis aŭtobiografon titolitan SKETCHES FROM LIFE (Skizoj el la Vivo).

La pentraĵoj de Annora Brown pendas en multaj galerioj en Kanado kaj Usono. La Glenbow Foundation (Fondaĵo Glenbow) en Kalgario posedas pli ol ducent ŝiajn akvarelojn pri floroj.

Noto pri la aŭtorino

Betty Salt naskiĝis en Anglio, sed dum preskaŭ la tuta vivo loĝis en Kalgario, Kanado. Ŝi estis instruistino en elementaj lernejoj tie dum pli ol kvardek jaroj.

Frue en 1961 ŝi komencis lerni Esperanton pere de koresponda kurso. En la aŭtuno samjare ŝi entuziasme instruis ĝin vespere en kalgaria altlernejo. En 1965 ŝi, kune kun unu el tiuj unuaj klasanoj, Dorothy Hawley, ĉeestis la 50-an (Jubilean) Universalan Kongreson en Tokio, kio estis por ŝi neforgesebla travivaĵo.

Dum pluraj jaroj Betty estis kasisto de la Kanada Esperanto-Asocio kaj prezidanto de la kalgaria E-grupo. Ŝi estis granda mecenato de UEA kaj de la skolta Esperanto-movado. En 1980 la Komitato de UEA distingis ŝin per Honora Membreco de UEA.

*La kanada esperantistino Betty Salt (1907-1994),
Honora Membro de UEA, konatiĝis dum sia vivo
kiel entuziasma loka aktivulo kaj grandanima
mecenato de la Esperanto-movado. Ŝi estis dotita
ankaŭ per la talento verki, kion atestas jena kolekto
de ŝiaj postlasitaj rakontoj, teatraĵetoj kaj poemoj,
kaj de kelkaj tradukoj el la kanada literaturo.
Senpretendaj sed belstilaj, ili posedas ĉarmon,
kiu facile kaptas la leganton, ankaŭ tiun malpli
spertan, dank' al la relative facila lingvaĵo.*

ISBN 92-9017-068-9



9 789290 170686